


POLLANDO

KAJ
GDAŃSK



Kraków

Monumento de Kościuszko sur Wawel

POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO
KRAKÓW 1927

ILUSTRITA GVIDLIBRO TRA POLLANDO


KAJ
LIBERA URBO DANZIG (GDAŃSK)

ELDONITA DE
POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO

HAVEBLA ĈE: Eldona Sekcio de Pola Studenta
Esperantista Societo,
WARSAWA, LESZNO 99 m. 5

Administrejo de „Pola Esperantisto“,
KRAKÓW, SMOLEŃSKA 9

KRAKÓW — 1927
PRESITA ĈE DRUKARNIA NARODOWA, KRAKÓW



913 (4/8)
338 (438) (050) = 922

ANTAŬPAROLO

Ĝis nun ni ne havis esperante skribitan gvidlibron tra Polujo. Estis eldonita nur libreto pri Kraków por la VIII Kongreso, ne parolanta pri aliaj partoj de nia lando. Ja tiu ĉi lando estis tiam en tute aliaj kondiĉoj. Nune ni el tuta liberigita Pollando plenkore salutas karajn gesamideanojn kaj bonvenigas ilin en Warszawa, kie estos fermita XIX jubilea Danziga Internacia Kongreso Esperantista. La priskribo komenciĝas per du kongresaj urboj: Warszawa kaj libera urbo Danzig (Gdańsk).

La gvidlibro ne estas traduko de iu ajn ekzistanta verko: ĝi estas skribita originale, ĉerpante el plej certaj fontoj. La plej grandan parton de tiu ĉi verko plenumis esperanta junularo de tuta Polujo. Parte skribis ĝin eminentaj neesperantaj fakuloj. La libro estas malgranda; ĝi eble ne sufiĉe priskribas ĉion necesan por turisto. Sed ĉiu komenco estas malfacila. Ni esperas estonte fari necesajn plibonigojn.

Ekzekutiva Komitato
de Pollanda Esperanto-Delegitaro

NUNTEMPA POLUJO

Ĉiu, kiu deziras paceme kunlaboradi kun ĉiuj nacioj devas ekkoni novan Eŭropon iĝintan post la granda milito. Unu el plej notindaj distingiloj de nova Eŭropo estas staranta en mezo de la Eŭropa karto restarigita Pollando; ĝi ne ekzistis en la antaŭmilita politika eŭropa karto, kvankam tute ne estas nova kreaĵo. Ĝi ekzistis ja dum okcent jaroj antaŭ granda milito. Depost la milito ĝi aperis sur la karto nur tial, ke ĝi neniam ĉesis ekzisti, vivadi, bataladi. Tiu ĉi batalado atingis sian celon, ĉar devis ĝin atingi. Estas ja afero tute memkomprenebla por ĉiu, kiu havis malfermitajn okulojn.

En la nova Eŭropo Pollando estas unu el pli grandaj ŝtatoj.

Komparante eŭropajn ŝtatojn laŭ ilia grandeco, ne alkalkulante koloniojn ekster Eŭropo, ni rimarkas, ke inter 27 eŭropaj ŝtatoj nur 6 estas pli grandaj laŭ la spaco — nur 5 laŭ la nombro de loĝantaro. Plejmulto da eŭropaj ŝtatoj ne povas esti komparata kun Polujo nek laŭ spaco, nek laŭ nombro da loĝantaro. (V. Tabelo A).

El supre diritaj datoj ni vidas, ke Pollando apartenas al ŝtatoj dense loĝatigitaj. Efektive, en la tuta Eŭropo de la Atlantiko ĝis Uralo loĝas meze 42 personoj je 1 km²; Pollando enhavas 70 personoj je la sama tereno. (V. Tabelo B). Sekvas, ke la nivelo de la ekonomia kulturo, kvankam ne tiel alta kiel ekzemple en Britlando, estas iom pli alta ol tuteŭropa meza nivelo. Alie Pollando ne povus eknutri tiom multnombran loĝantaron.

Cetere por juĝi ĝuste ekonomiajn fortostreĉojn jam efektivigitajn en Pollando, oni devas kompreni tute neordinarajn malfacilaĵojn, kiujn restarigita Polujo devis kontraŭbatali, kaj ankoraŭ kontraŭbatalas.

Dum ses jaroj Pollando estis tereno de senĉesa milito. Batalantaj armeoj marŝadis tra Pollando laŭlonge kaj laŭlarĝe, antaŭen kaj malantaŭen, elĉerpante tutan landon per rekvizicioj kaj ofte detruante ĝin pro strategiaj vid-

punktoj. En 1915 Rusoj reirante orienten, bruligis centojn da vilaĝoj kaj forkondukis kun sia militistaro, perforte, milojn da loĝantaro — por lasi al la venkintoj tute neniigitan dezerton. Poste la germana militista estraro neniigadis polan industrion, rompante maŝinojn en fabrikoj aŭ sendante ilin en Germanujon. Fine, kiam en 1918 aliaj nacioj povis jam libere respiradi post la finita milito, Polujo batalis kun Rutenoj kaj Rusoj. Denove komenciĝis tragika kadrila danco: Poloj iris orienten ĝis Kijów, Rusoj venis tute proksime al Varŝava. Fine oni forpuŝis Rusojn orienten trans la riveron Bug. Okcidentaj du trionoj de Pollando denove iĝis preskaŭ dezertaĵo.

Ĉu estas mirinde, ke Pollando post ĉio tio malriĉiĝis? Kaj tamen jam hodiaŭ Pollando ne pli estas malriĉa lando.

Ĉar cetere ne mankas ĉe ni en Polujo materialo por konstruo. Ekonomie Pollando estas, de la naturo mem, riĉe donacita. Ĝi posedas vastajn fruktodonajn ebenaĵojn kaj konvenan klimaton; somero estas por la greno nek tro varma nek tro mallonga; pro tio Pollando povas iĝi grenejo por la okcidento de l' industria Eŭropo, kiu jam nun profitas ne nur de la pollanda greno sed ankaŭ de la diversaj specoj de nutraĵo. Naturo donacis Pollandon per vastaj arbaroj; do la eksporto de la ligno jam nun kovras la bezonojn de Anglujo, Holandujo kaj de aliaj malriĉaj je arbaroj landoj.

Krom tio suda monta kaj submonta Pollando estas riĉa je kostaj mineralaĵoj: petrolo, parafino, tera gazo, zinko, fero kaj plumbo, enhavas salon kuirejan kaj tre valoran por agrikulturo kaliaĵon. Antaŭ ĉio Polujo posedas tre abundajn karbajn minejojn. Grandan kvanton da karbo Pollando eksportas al najbaraj landoj: Skandinavio, Baltaj Ŝtatoj, Aŭstrio, Italujo.

Sur la bazo de tiuj naturaj riĉaĵoj, jam ĉirkaŭ la mezo de la XVIII jarcento disvolviĝas en Pollando fabrika industrio. Jam kelkafoje tiu industrio estadis en kritika situacio: sed ĉiam ĝi renaskiĝis, kaj verŝajne en mallonga tempo pli multe disvastiĝos. Verdire la industrio pola devas hodiaŭ akomodigi al tute aliaj kondiĉoj. Tute aparta politika konstruo de la nuntempa Rusujo permesas nur tre limigitan eksporton en tiun ĉi landon. Sed falis fine tiuj limimpostaj baroj, kiuj disigis Pollandon: Varŝavaj kaj Lodzaj fabrikoj vendiĝas hodiaŭ en Kraków, Poznań kaj

Lwów. Krom tio Pollando posedas hodiaŭ propran aliron al maro kaj povas uzi malkostan maran vojon, kiu tre multe valoras. Hodiaŭa Polujo povas fari propran komercan politikon eksterlandan, fari konvenajn interŝtatajn kontraktojn kaj eksportadi siajn fabrikojn en landojn malpli industriajn.

Sed ne nur rilate la industrion kaj komercon Polujo transformiĝis, sed ankaŭ rilate l' administracion. Tiu ĉi dua transformiĝo precipe estas profunda. Antaŭ la granda milito nek en la rusa ŝtato nek en la prusa estis Poloj allasataj al politikaj oficoj. Oficojn do ekokupis Poloj, kiuj neniam antaŭe estis oficistoj. Parton de la kreiganta oficistaro formis polaj oficistoj el antaŭa Galicio. Sed ili estis tro malmultenombraj kaj krom tio ilia tradicia oficrutino ne ĉiam sufiĉis. Pro tio la grandan parton de l' oficoj ŝtataj oni devis lasi al la oficistoj nespertaj en ilia fako. Se tamen la oficoj en Polujo funkcias regule, tio estas signo de granda plastikeco en psiko de Poloj. Tiu ja plastikeco de psikologio estas granda valoro en tempo de plirapidigita historia evoluo, kiel la nuntempe travivata.

Simile la lernejaron en nova Polujo oni devis almenaŭ en tri kvaronoj krei. La rusaj ŝtataj lernejoj oficiale tute ne aprobis ekzistadon de la pola lingvo; la germanoj polan lingvon el lernejoj forpelis kaj subpremis. Dum la milito Rusoj-instruistoj forlasis la landon; post fikso de la nova limo germanaj instruistoj grandnombre elmigris. Oni do devis krei la tute novan instruistaron — de l' homoj, antaŭe private aŭ eĉ kontraŭleĝe instruintaj. Grandegaj antaŭenpuŝoj, faritaj de pola lernejararo en tiel malfavoraj cirkonstancoj, estas la laŭdmonumento de l' Nacio.

Ankaŭ la scienca laboro de polaj scienculoj estis dum la nacia mallibereco treege malfaciligita. Nune oni faris al ili novajn pli vastajn fundamentojn. Antaŭ la milito estis en la mondo nur du polaj universitatoj: en Krakovo, kaj Lvovo. Nuntempe estas kvin: en Varŝavo, Krakovo, Lvovo, en Poznań kaj Vilno. Bonaj politeknikoj polaj estas en Varŝava kaj Lvovo; estas la agrikulturaj akademioj kaj ankaŭ la minejstuda akademio. Ministerio de l' Publika Klerigado ĉiame subvencias sciencajn esplorojn. Dank' al tiuj novaj kondiĉoj pli vaste ol antaŭe disvolviĝas krea laboro de

polaj sciencistoj en ĉiuj fakoj: de geologio ĝis la lingvistiko, de astronomio ĝis arkeologio.

Proporcie plej malmulte suferis en Polujo la belaj artoj. Artistoj en ĉiuj nacioj estas la plej kosmopolitema parto de inteligentularo. Al ili helpo de propra ŝtato estas plej malmulte bezonata. Ili ankaŭ sen ĝi plej bone scias al si helpi. Pro tio do la ŝanĝoj en tiu fako post reaktiro de sendependeco estas en Polujo plej malmulte videblaj. Tamen ankaŭ la belaj artoj nuntempe en Polujo pli libere inspiras kaj disvolviĝas ol tiam, kiam ĉiuloke oni devis memori pri malfido kaj nefavoreco de rusaj aŭ prusaj ŝtatestroj.

Eĉ se mi diris, ke en Polujo artistoj estis pli kosmopolitemaj ol aliaj inteligentuloj, tio ne rilatas ĉiujn senescepte. Ekzemple inter polaj pentristoj estis tiuj, por kiuj la nacia patrioteco estis fonto de grandaj inspiracioj. Mi menciuj nur pri historiaj pentraĵoj de Jan Matejko. Rilate polan poezion, do por ĝi dum lasta centjaro ĉefa fonto de l' inspiroj estis bataloj por ricevo de nacia sendependeco. Pro tio la afero de nacia mallibereco estis eble de neniu alia poezio tiel profunde pritraktita kaj tiel ĉiufanke, kiel de la pola. Mi pensas ne nur pri grandaj romantikuloj dum unua duono de XIX jc. kiel Adam Mickiewicz, kies monumentoj okupas la honorajn lokojn en centroj de multaj polaj urboj, aŭ kiel Juliusz Słowacki, kiu mortis eksterlande, sed kies cindrojn oni nuntempe solene veturigis patrolandon, por lokigi ilin apud la polaj reĝoj. Mi pensas ankaŭ pri poetoj kaj precipe pri grandaj romanverkistoj de pli posta tempo. Ĉe ili oni rimarkas motivon de melankolio por reaktiro de la nacia sendependeco eĉ tie, kie oni ĝin eĉ ne supozis. Se Sienkiewicz okupiĝis pri iamaj jarcentoj kaj priskribadis heroajn batalojn de estinta pola militistaro, do en li kaj liaj legantoj vekiĝis la espero de estontaj venkoj el la estintaj. Se Reymont ekmiregis la mondon per klara psikologio en siaj priskriboj de la vilaĝana vivo, do li vidis en tiuj ĉi vilaĝanoj polaj la sanajn, nedetruibajn radikojn, el kiuj devos kreski estonta grandeco de la nacio. Se en romanoj de Sieroszewski ni plej ofte vidas Siberion aŭ Malproksiman Orienton, do Sieroszewski estis en Siberio kiel politika malliberulo, kaj tiu kruela kaj senkompata estraro, kiu multajn suferojn kaŭzas al liaj herooj, tiu estas la rusa ŝtatestro. Kaj ĉe tiaj aŭtoroj, kiel Stefano Żeromski kaj Andrzej Strug motivo de l' batalo

por nacia sendependeco klare okupas la unuagradan lokon, kvankam ĝi ligiĝas, precipe ĉe Strug, kun motivo de malaprobo de sociala maljusteco.

Polujo ĉiam estas preta kunlabori por fortigi la pacon en Eŭropo, sed ĝi ne volas kaj ne povas pereji. Polujo en ĉiu momento estas preta solidariĝi kun ĉiuj nacioj de l' civilizita mondo, sed nur kiel egala kun egaloj.

Tabelo A. Supraĵo		Nombro de loĝantaro je 1 km ²	
Francujo	551.1 km ²	Belujo	245.2
Germanujo	472.1 "	Britlando	186.1
Pollando	388 "	Germanujo	127.4
Italujo	313.3 "	Italujo	126.8
Rumunujo	295 "	Ĉeĥoslovakujo	96.8
Ĉeĥoslovakujo . .	141 "	Francujo	71.2

Nombro de loĝantaro en milionoj		Tabelo B. Arbaro por 100 ha de la tuta supraĵo	
Germanujo	59.9	Germanujo	27.0 ha
Britujo	47	Polujo	20.4 "
Francujo	39	Francujo	18.7 "
Italujo	37.8	Usono	10 "
Polujo	27.2	Britujo	4.8 "
Hispanujo	20		
Rumunujo	16.8		
Ĉeĥoslovakujo	13.6		

WARSZAWA

Historio. Komencoj de Warszawa (legu: Varŝava) estas historie necertaj. Laŭ tradicio la urbo fondiĝis en XI jarcento, laŭ historiaj pruvoj en XIII, kiam Warszawa fariĝas ĉefurbo de unu distrikto en duklando Mazowsze (Mazovŝe). En 1307 ĝi jam havis defendan kastelon, posedis du preĝejojn: de S-ta Johano (apud la katedralo) kaj de S-ta Georgo (ne ekzistas) kaj en la sama jaro ĝi estis ĉirkaŭita per muro. En unua duono de XIV jc. fariĝas Warszawa posedaĵo de unu linio de Mazoviaj Piastoj, kiuj ĝin konsideras sia sidejo. La ŝituo apud rivero Wisła (Vistulo) akcelas la disvolviĝon de la urbo.

Ĉirkaŭ duonjarcenta regado de Janusz I. princo de Mazowsze estas plej bona epoko en la historio de la malnova Warszawa, kiu ampleksis tiam spacon inter str. Podwale, str. Mostowa, Vistulo kaj la kastelo.

Ĉe la norda flanko jam en XIV jc. naskiĝas dua urba sidejaro, al kiu princo Janusz donas urbajn rajtojn. Tiamaniere elkreskas la Nova Urbo, kiu longtempe posedas apartan magistraton kaj apartan urbestron.

Ĉe komenco de XV jc. Warszawa fariĝas ĉefurbo de tuta Mazowsze kaj post morto de lastaj mazoviaj princoj (1526) ĝin ekposedas la polaj reĝoj kaj la kastelo fariĝas reĝa.

En 1569 jaro Zygmunt Waza, pola reĝo, konsideras Warszawa la ĉefurbo de la lando kaj de post tiam komenciĝas ĝia bonega disvolviĝo.

Pli grandan signifon ekhavas Warszawa en XVI jc., kiam oni komencas kunvoki ĉi tien la komunajn sejmojn* de Polujo kaj Litovujo, kiam oni ĉi tie elektas novajn reĝojn.

En 1656 jaro dum tritaga batalo kun Svedoj apud Warszawa, estis detruitaj plej belaj palacoj, domoj kaj tiama akvokonduko**. Danĝero por la urbo fariĝas rapida disvolviĝo de Praga, antaŭurbo, kuŝanta ĉe la dekstra bordo de Vistulo, kiu elmontras grandan komercan konkurencon. Depost tiu tempo Praga progresas en la disvolviĝo, ĝis kiam

* Sejmo — pola parlamento, pole: sejm.

** Unua akvokonduko en mezocentjaro estis konstruita de Mikolaj Kopernik, fama astronomo en Frauenburgo.

Suvorov ĝin ne ĉesigis per la fama buĉado de la loĝantaro en 1794 jaro.

Bonega epoko de la urbo estas regado de Stanisław August Poniatowski, la lasta reĝo (1764—1795), kiam la loĝantaro kreskis ĝis 80.000, kiam ĝi ricevis multajn belegajn palacojn kaj fariĝis grava fokuso de arto, literaturo kaj scienco.

En la jaroj 1788—1792 sidas ĉi tie la Kvarjara Sejmo, kiu decidas kaj publikigas la 3-an de majo 1791 famekonatan konstitucion, unu el la unuaj en Eŭropo.

Post la tria dispartigo de Pollando en 1795 jaro Warszawa estis okupata de Prusoj, fariĝis ĉefurbo de provinco, nomita Suda Prusujo. Regado de Prusoj finiĝas en 1806 jaro, kiam en Warszawon eniras la franca armeo de Napoleono kune kun pola legio, estrata de princo Józef Poniatowski.

Laŭ packontrakto en Tilsit en 1807 jaro Warszawa fariĝas ĉefurbo de Varŝava Duklando. Du jarojn poste ekokupas ĝin Aŭstroj post batalo apud Raszyn; en 1813 post la malvenko de Napoleono ĉi tien eniras Rusoj. Inter 1815—1831 Warszawa estas ĉefurbo de t. n. Kongresa Reĝlando. En tiu epoko aperas en la urbo multaj novaj klasikaj konstruaĵoj. Pluan disvolviĝon ĉesigas pola ribelo en 1831 jaro, kiu finiĝas per kapitulaco de Warszawa post brava defendo de generalo Sowiński. Post likvido de la ribelo Warszawa fariĝas gubernia urbo.

Dum la eŭropa milito la urbo estis okupita en 1915 jaro de Germanoj, kiuj restis ĉi tie ĝis 1918 jaro. En 1920 j. estis apud Warszawa granda batalo kun bolŝevikoj, kiu finiĝis per ilia malvenko.

* * *

Warszawa nuntempe kalkulas 1,000.000 loĝantojn. Kiel ĉefurbo de Pollando, ĝi estas sidejo de prezidanto de la Respubliko, sejmo, ministerioj kaj aliaj centraj aŭtoritatoj.

El altlernejoj ĝi havas Universitaton, Politeknikon, Superan Komercon Lernejon, Superan Lernejon de Agrikulturo, Lernejon de Politikaj Sciencoj, Liberan Polan Universitaton kaj Muzikan Konservatorion.

* * *

Karaktero de urbo. Warszawa konsistas el kelkaj malnovaj partoj. Apud rivero Vistulo en la norda flanko estas Malnova Warszawa, plena de stilaj domoj, havanta




Warszawa *Kastela Placo kun Kolono de Zygmunt III*

malnovan ĉefplacon kaj multajn mallarĝajn stratojn. Sude, laŭlonge de str. Krakowskie Przedmieście, Aleo Ujazdowska kaj str. Marszałkowska etendiĝas novaj kvartaloj kun grand-urba, moderna karaktero. Ne posedas ĝin kuŝanta okcidente de Malnova Urbo la hebrea kvartalo, konsistanta el kelkaj stratoj ĉirkaŭ str. Nalewki. Sur la dekstra bordo de Vistulo estas antaŭurbo Praga, en kiu loĝas precipe laboristoj. La similan karakteron havas ankaŭ antaŭurboj kaj kvartaloj: Wola, Mokotów, Czerniaków, Powiśle k. a.

Vizitadon de la urbo plej bone estas komenci de kuŝanta inter la Nova kaj Malnova Kastela Placo (Plac Zamkowy), kie staras 20-metra Kolono de Zygmunt III, starigita de lia filo reĝo Władysław IV en 1644 jaro. La skulptaĵon faris Klemens Molli.

Orientan flankon de la placo okupas Reĝa Kastelo, alikonstruita en XVII jc. el antaŭa gota kastelo de princoj de Mazowsze. Detruita dufoje de Svedoj, kelkfoje bruligita, ĝi ruiniĝis kaj ne povis servi kiel reĝa rezidejo. Tial Jan Kazimierz rezidis en palaco Kazimierzowski (nuntempa Universitato), kaj Jan Sobieski, fama venkinto de Turkoj apud Vieno en Wilanów. Dum la regado de Stanisław August ĝi estis alikonstruita sub gvido de arkitekturo Merli. Pentraĵn ornamaĵojn donis Bacciarelli, Plersch kaj Canaletto, skulptan Monaldi kaj Le Brun. La kastelon detruis Rusoj forveturigante en 1915 j. artistajn verkojn kaj historiajn memoraĵojn. La riĉaj aranĝaĵoj estas laŭ Riga traktato revenigataj.

La ĉefa ornamo de reprezenta salono sur unua etaĝo estas pentraĵoj sur arkaĵoj, belegaj pargetoj kaj mozaikoj. Plej vasta kaj plej bela estas bala salono, dekoraciita per duoblaj kolonoj, super kiuj troviĝas originalaj „lornaj fenestroj“. Belega plafono de Bacciarelli, skulptaĵoj de Le Brun, bela pordo estas vera ornamo de tiu salono. Pezaspektaj estas ornamaĵoj en la apuda kavala salono; ili, skulptitaj en ligno kaj origitaj, donas al la salono seriozegan karakteron. La muroj estas kovritaj per historiaj pentraĵoj de Bacciarelli. Plej proksima al la franca modelo estas trona salono, kies ornamo estas latoj, sur kiuj estas belege skulptitaj floroj kaj tre delikataj, blankaj, marmoraj kamenoj. Malgranda, okangula apuda ĉambro „konferenca“ estas konsiderata perlo de stilo de Stanisław August. La murojn ornamas arabeskoj de Plersch sur ora



Warszawa

Kavalira salono en la Reĝa Kastelo

fono, inter kiuj estas portretoj de tiamaj monarĥoj. Revelacio estas reĝa dormoĉambro, kovrita per taksusa ligno de flav-ruĝa koloro, simila al mahagono kaj per malhel-blua materio sub ora ŝnura reto. La tutaĵo kolorista estas originala kaj mirinda. Al la interesa montriĝo de stilo de Stanisław August apartenas certe reĝa biblioteko, okupanta tarase konstruitan parton.

Sur la korto oni povas vidi belegajn kanonojn el XVI kaj XVII jc., devenantaj el kastelo de princoj Radziwiłł en Nieśwież. La kastelo estas vizitebla ĉiutage inter 10–15 h., en dimanĉoj kaj festotagoj inter 11–14 h. Nuntempe la Kastelo estas rezidejo de la Prezidanto de la Pola Respubliko.

Iom pli malsupre estas palaco „Pod Blachą“, iama rezidejo de princo Józef Poniatowski, kiam li estis ministro de milito de Varsovia Duklando (1807–12). Ĝi estas duetaĝa palaceto, konstruita en komenco de XVIII jc. de Jan Dominik Lubomirski. Ĝia fasado, ornamita per skulptaĵoj, havas ecojn de stilo de Stanisław August. Antaŭe ĝia tegmento estis


kovrita per lado kaj de tio devenas la nomo („pod Blachą“ — sub lado). Apude estas videbla ponto de Kierbedź, konstruita en 1865 j.

De la kastelo iras str. Świętojańska, ĉe kiu troviĝas katedralo de S-ta Johano, gota konstruaĵo el XIV jc., alikonstruita en XIX jc. Pro graveco de la enlandaj okazintaĵoj, kiuj en ĝi montriĝis kaj pro historia riĉeco de ĝia internaĵo, ĝi estas apud preĝejo de S-ta Mario en Kraków la plej grava. Inter la monumentoj distingiĝas tiu de Stanisław Małachowski, marŝalo de la kvarjara Sejmo, unu el la kreintoj de konstitucio de 3-a majo (ĝin skulptis Laboureur, disĉiplo de Thorvaldsen). En la ĉefa altaro bildo de Palma el 1619, apude marmora tombomonumento de la lastaj princoj de Mazowsze, kaj sub la ĥorejo mozaika portreto de ĉefepiskopo Poniatowski, pentrita de Rafael. En kripto sub sakristio estas sarkofago kun korpo de mondfama pola verkisto Henryk Sienkiewicz (mort. en 1916), kies restaĵojn oni veturigis tien ĉi en 1924 jaro el Svisujo.

Apude estas baroka preĝejo de Jezuitoj el XVII jc., kiu havas multajn pentraĵojn de Szymon Czechowicz, pola pentristo. Turo de l' preĝejo estas konsiderata kiel plej bela en Warszawa. Ĝi estas videbla nur de la ĉefplaco.

Vidindaj estas ankoraŭ ĉe str. Świętojańska domoj Nr. 6 — antikva, mallarĝa, arkaĵa koridoro kaj karakteriza korto — kaj Nr. 29/31, kie super la pordego estas reliefe skulptita ŝipo, sufiĉe granda. Depost tre malnova tempo tiu domo estas nomata „sub ŝipo“ — ĉi tie de tiam troviĝis plej fama en la urbo tenejo de vino, kies posedantoj jam dum la regado de Władysław IV komercis kun Venetia kaj Oriento.

Tra str. Świętojańska ni eniras en la koron de Malnova Warszawa, sur Ĉefplacon de la Malnova Urbo, ĉirkaŭita de domoj el XVII jc. Tiu placo estis iam fokuso de la urba vivo, ĉi tie troviĝis urbodomo (detruita en 1817 jaro — ĉi tie staras nun fontano) kaj domoj de plej eminentaj urbanoj. Al la plej interesaj apartenas Domo de Baryczkowie Nr. 32, konstruita en 1633 jaro, apartenanta nun al „Societo de zorgo pri restaĵoj de l' pasinteco“. Bela portalo, longa arkaĵa vestiblo, salono kun karakteriza kolono interfenestra, plej bela en la Malnova Urbo ŝtuparo, donas al la domo karakteron de tipo de ĉi tiea arĥitekturo el XVII jc. Sekve domo Nro 27 kun fama vinejo de Fukier, fondita



Warszawa

Katedralo de S-ta Johano

en XVII jc. Ĝi estas ĝis nun posedaĵo de lia posteulo. En la koridoro pendas ŝipo, signo de transmara komerco. Rimarkinda estas korto kun galerio en karaktero de renesanco. La domo ekzistas de post XVI jc. Sekve domo Nro 31 de princoj de Mazowsze, plej malnova restaĵo de arkitekturo el XIV jc. Nun ĝi apartenas al Societo de historiamantoj, kiu la tutan domon bele renovigis. Rimarkinda estas renesanca pordo kaj desegnaĵoj, ornamantaj la fronton super la fenestroj. Vidindaĵo de tiu domo estas tre profunda kelo, kie estas konservata restaĵo de malnova bastiono. Oni eniras en la domon de str. Wąski Dunaj Nro 1 (viziti ĉiutage dum bonvetero). Str. Wąski Dunaj ligas la Ĉefplacon kun str. Podwale. Vidindaj domoj: Nro 8 kaj 12.

Kontraŭ str. Świętojańska kuŝas str. Nowomiejska, kie estas vizitindaj domoj Nro 11 „Sub Sinjoro Jezuo“ kaj Nro 7 kun pordo, havanta artistajn feraĵojn.

Ĉe maldekstra flanko de str. Nowomiejska, irante de la Ĉefplaco, estas str. Podwale, ĉe kiu en la domo Nro 15 estas Nacia kaj Milita Muzeoj, viziteblaj ĉiutage inter 11—15 h. (krom lundo). Irante tra str. Nowomiejska ni renkontas maldekstre str. Długa, dekstre str. Mostowa, kies plilongigo estas str. Boleść, kondukanta ĝis la Vistula bordo. De la krucumiĝo de stratoj Mostowa kaj Boleść disiras tri stratoj: maldekstren Rybaki, dekstren Brzozowa kaj Bugaj. Ni iras tra str. Brzozowa, kiu etendiĝas ĉe rando de monto, sur kiu staras Warszawa. Pro tio la domoj de la strata flanko estas multe pli malaltaj ol de la alia. Tiu ĉi strato ligas str-ojn Mostowa kaj Celna. Plej karakteriza el la stratoj de la Malnova Urbo kondukas maldekstren al str. Bugaj, dekstren al str. Krzywe Koło, kiu aliras al la ĉefplaco — ĝi nomiĝas Kamienne Schodki (Ŝtona Ŝtuparo), mallarĝa trairejo, el ŝtonego.

Ĉe angulo de str. Celna kaj de la Malnova Urbo en domo Nro 2 loĝis en 1536—1612 fama pola predikanto pastro Piotr Skarga Powęski.

Ni eniras en str. Jezuicka, kie troviĝas Arkivejo de Malnovaj Dokumentoj (Nro 1) kaj Pedagogia Muzeo (Nro 4). Nun ni venas tre belan placeton Kanonja. Ĉi tie troviĝis iam tombejo ĉe paroĥejo de S-ta Johano. Unu restaĵo estas monumento de S-ta Mario, staranta malantaŭ la katedralo. Vidindaj domoj estas nun Nro 8, iam posedaĵo de Staszic, kie troviĝis Societo de Sciencamikoj; Nro 18,



plej mallarĝa domo en Warszawa (ĉe fronto 1 fenestro). Tra str. Dziekanja ni venas al str. Świętojańska, sekve al la kastela placo, de kie al str. Piwna, paralela al str. Świętojańska. Ĉi tie la domoj konservis sian antikvan karakteron. El ili estas interesaj domoj Nro 18 (pola aglo skulptita en ŝtono), domo Nro 19 kun fasado en stilo de Stanisław August kaj domoj Nro 34—45. Ĉi tie troviĝas baroka preĝejo de S-ta Marcin el XIV jc. Ĉe fino de str. Piwna estas str. Piekarska, traigita de tre mallarĝa kaj interesa str. Ryckerska. Ĉe krucumo de str. Piekarska, Ślepa kaj Podwale estas placo nomata „Piekielko“ (Infereto).

Ni revenas tra str. Piekarska kaj Zapiecek kaj ni ree ektriviĝas sur la ĉefplaco. Ni iras tra str. Nowomiejska, kies plilongigo estas str. Freta. Ĝi trairas Ĉefplacon de Nova Urbo kaj finiĝas ĉe str. Franciszkańska. Tie troviĝas preĝejo de S-ta Spirito el XIV jc., duaflanke preĝejo de S-ta Jacek el XVII jc. Sur la ĉefplaco de la Nova Urbo troviĝas baroka preĝejo de S-ta Kazimierz el XVII jc. kun belegaj freskoj, altaroj kaj ambono, apude gota preĝejo de S-ta Mario el XV jc.

Plilongigo de str. Freta estas str. Zakroczymska, kiu finiĝas ĉe granda Plac Broni (Placo de armilaro), malantaŭ kiu kuŝas domoj kaj fortikaĵoj de Citadelo, konstruita laŭ ordono de caro Nikolao I post la ribelo en 1831 jaro kaj celita kontraŭ la urbo. Tial oni detruis la kvartalon Zolibórz, konsistantan el dekkelke da stratoj, ĉe kiuj staris multaj kortegoj kaj palacoj el la tempo de Stanisław August kaj de Kongresa Reĝlando. En Citadelo estas tiel nomata „X pavilono“, malliberejo por politikaj kulpuloj, ĉeloj, en kiuj sidis membroj de Nacia Registaro el 1863 jaro kaj ĉelo, kie longtempe estis malliberigita marŝalo Józef Piłsudski. Sur la deklivoj de Citadelo estas „Ekzekuta loko“, kie estis mortigitaj multaj polaj naciaj herooj. Kontraŭ str. Zakroczymska oni starigis en 1916 jaro krucon kiel memorraĵo de mortigo de diktatoro Traugutt kaj membroj de la Nacia Registaro (1864 j.). Nune oni detruis la citadelon kaj konstruis novan kvartalon Zoliborz, ĝardenan urbo.

Ni revenas al str. Długa, tra kiu ni venas al placo de Krasiński (Plac Krasińskich), kie okulfrapas belega domo, estinta palaco de Krasińscy, baroko el fino de XVII jc. Nun sidas en ĝi Plej Supera Juĝejo. La

placo estis iam korto de l' palaco, ĉe kies alia flanko etendiĝas ĝardeno, nun nomata ĝardeno de Krasiński.

La palaco estis posedaĵo de familio Krasiński ĝis 1765 jaro, kiam ĝi estis vendita al la Respubliko. La fronto ĉe la placo estas ornamita per basreliefo: duelo de Marcus Aurelius kun Gallus, ĉe la ĝardeno: alveno de Caesar al Roma. La palaco estas unu el plej belaj en la urbo.

Post vizito de la palaco kaj ĝardeno ni iras tra str. Miodowa. Ĝi estas unu el plej malnovaj stratoj ekster la Malnova Urbo, ĉar ĝi ekzistis jam en XVI jc. Maldekstre staras preĝejo de Kapucenoj, kiun fondis en XVII jc. reĝo Jan III Sobieski por memoro de defendo de Wien. En ĝia kapelo en empir-stila sarkofago estas koro de tiu reĝo.

Nemalproksime troviĝas palaco nomata „Ĉefepiskopa“ (Nro 13), domo Nro 15 estas palaco de Pac, fondita en 1673 jaro de princo Jan Radziwiłł. Tiun palacon aĉetis poste Pac, generalo de pola armeo, alikonstruis ĝin laŭ plano de Marconi kaj ornamis ĝian duonrondan pordegon per granda gipsa basreliefo de Ludwik Kaufman, disĉiplo de Canova. Tiu reliefo, prezentanta konsulon Flaminio, anoncanta liberecon de grekaj urboj en Korinto, estas tre vidinda. En 1835 jaro la palaco fariĝas registara posedaĵo, en kiu ĝis nun estas Distrikta Juĝejo.

Apud angulo de str. Miodowa kaj Senatorska troviĝas Ministerio de Agrikulturo en ĉefepiskopa palaco, kiu en kelkaj salonoj konservis ornamaĵojn el la tempo de Stanisław August.

De tie ni iras al str. Krakowskie-Przedmieście (Krakovskje Pjedmjesce — Krakova antaŭurbo). Apude estas la kastela palaco, de kiu ni komencis la vizitadon de la malnova urba kvartalo. Nun ni iras tra str. Krakowskie Przedmieście, unu el la plej ĉefaj stratoj de Warszawa, ĉe kiu staras palacoj, ŝtataj domoj, preĝejoj kaj kelkaj monumentoj.

Kontraŭ str. Miodowa estas preĝejo de S-ta Anna, baroko el 1749 jaro, kun tre interesa internaĵo.

En la najbara domo estas Etnografio-naturscienco Muzeo kun kolektaĵoj, koncernantaj la etnografion de Pollando. Apude staras baroka statuo de Dipatrino, kiun starigis arĥ. Belotti en 1683 jaro por memoro de defendo de Wien.

Plue ni vidas ŝtonan monumenton por dankemo

al Ameriko (el 1922 jaro) kaj apude monumenton de Adam Mickiewicz, starigitan per publika mono en 100-a datreveno de lia naskiĝtago, 1798, laŭ projekto de Cyprian Godebski.

En domo Nro 4648, palaco el XVII jc. kunsidas la Ministraro. Kontraŭ str. Królewska estas rokoka preĝejo de Vizitandinoj kun bela stila internaĵo. Sub Nro 2628 troviĝas Universitato, sur la loko de antaŭa somera kortego de princoj de Mazowsze. En 1635 jaro Władysław IV fondis ĉi tie sufiĉe grandan palacon, kiu estis ruinigita dum la pol-svedaj militoj. Renovigita en 1660 jaro de Jan Kazimierz konservis la nomon de Palaco de Kazimierz. Kiam en 1724 j. August II ekestis posedanto de la palaco, sur ĝia korto aperis kelkaj pavilonoj, destinitaj je sidejo de la saksa soldataro. Fine aĉetis ĝin Stanisław August, destinante ĝin por Kavalira Lernejo, kies edukito estis Tadeusz Kościuszko. Post dispartigo de la lando sidis ĉi tie sciencaj institucioj kaj altlernejoj, ekz. en 1815–30 j. Reĝa Universitato kaj Liceo, en 1862–69 Ĉefa lernejo, poste rusa Universitato.



Warszawa Palaco de Staszic kun monumento de Kopernik

An'aŭ la domo estas Universitata Biblioteko, konstruita laŭ plano de Jabłonowski kaj Szyller.

En unu el la pavilonoj troviĝas Zoologia Muzeo, vizitebla dimanĉe je 10–13 h., ĵaŭde 10–14 h.

Ĉe fino de str. Krakowskie-Przedmieście staras preĝejo de S-ta Kruco, kiu dividiĝas je supra kaj malsupra (kripto). Ĉi tie estas korpoj de diversaj eminentuloj, inter kiuj estas princo Adam Czartoryski kaj pastro Piotr Baudouin. Ĉi tie ankaŭ troviĝas epitafio de Chopin, Słowacki, verkisto Kraszewski k. m. a. La internaĵo estas tute roma kaj havas aspekton de monumenta arĥitekturo. El la vidpunkto de monumenta skulptaĵo estas rimarkinda statuo de Kristo sur la ŝtuparo antaŭ la preĝejo, kun mano norden direktita.

Antaŭ la preĝejo estas monumento de pola mondfama astronomo Kopernik (projekto de Thorvaldsen), starigita per publika mono laŭ penado de Staszic en 1830 jaro. Malantaŭ la monumento estas str. Oboźna, apud kiu staras Pola Teatro.

Ĉe str. Krakowskie-Przedmieście troviĝas domo de Societo de scienc-amikoj, fondita de Staszic en 1820 j., antaŭe empira (projekt. de Corazzi). Rusoj aliĝis ĝin je bizantia stilo. Post nuntempa renovigo ĝi ricevis la antaŭan aspekton.


Ĉe la sama strato staras kelkaj palacoj de pola aristokratio, inter kiuj estas sub Nro 15 domo de grafoj Potocki el XVIII jc., sub Nro 32 domo de Maurycy Potocki.

Ni iras nun tra plilongigo de str. Krakowskie-Przedmieście, nomata Nowy Świat. De ĝi maldekstren iras str. Ordynacka, ĉe kiu estas Muzika Konservatorio, malfermita en 1861 jaro. Ĝi sidas en estinta defenda kastelo el XVI jc.

Irante tra str. Warecka, dekstre ni atingas placon de Napoleono, kie troviĝas ĉefoficejo de Poŝto kaj Telegrafo.

Irante tra Nowy Świat pluen, ni atingas aleon Jerozolimska, kiu maldekstren kondukas al plej longa kaj plej bela ponto en Warszawa, ponto de princo Józef Poniatowski, konstruita en 1913 jaro Detruita dum la milito, ĝi estas tute rekonstruita. Trans la ponto troviĝas granda parko Skaryszewski.

Ĉe la fino de str. Nowy Świat troviĝas preĝejo de S-ta Aleksandro sur placo de Tri Krucoj (Plac Trzech Krzyży).



Palaco en parko Łazienki

Warszawa

Ni eniras en aleon Ujazdowska. Maldekstre troviĝas parko Ujazdowski, Botanika Ĝardeno kaj plue parko Łazienki. Łazienki estas plej bela parko de Warszawa kaj ĝia ĉefa ornamo estas belega, kvankam negranda palaco de Stanisław August el XVIII jc. La palaco enhavas kolektaĵojn de belartoj. Ĉi tie laboris arh. Merlini, Kamsetzer, pentristoj Bacciarelli kaj Piersch, skulptistoj Pinck, Monaldi, Le Brun k. a. En ĝia konstruado plej gravan rolon ludis la reĝo mem. La internaĵo estas tre vizitinda. Precipe belaj estas salono de Salomono, iam dormoĉambro de la reĝo, ornamita per pentraĵoj de Bacciarelli, bala salono kun pompea ornamaĵo de Kamsetzer, skulptaĵoj de Antono d'Este kaj rotundo sub kupolo, ornamita per statuoj de polaj reĝoj. En verda ĉambro estas ciklo de belulinaj portretoj el la tempo de Stanisław August.

La salonoj konservis siajn aranĝojn el la tempo de la lasta reĝo. Norde de la palaco staras monumento de Jan III Sobieski el 1787 jaro (laŭ proj. de Pinck). En Łazienki troviĝas ankoraŭ palaceto de Myśliwicki, en kiu iam loĝis princo Józef Poniatowski kaj Blanka Dometo, en kiu loĝis Stanisław August antaŭ finkonstruo de la palaco. Apud la palaca lago estas sentegmenta teatro, simila al grekaj amfiteatroj. En Łazienki troviĝas ankoraŭ monumento de Fryderyk Chopin, videbla de aleo Ujazdowska.

Kontraŭ Łazienki, ĉe aleo Ujazdowska troviĝas estinta oficira lernejo, nun lernejo de korpa edukado, studio ĉe la Universitato.

Ĉe fino de aleo Ujazdowska troviĝas empira palaco Belvedere el 1822 j. ĉirkaŭita de belega ĝardeno.


Tra strato Bagatela ni rapidas al placo de Lublina Unio (Plac Unji Lubelskiej), kie troviĝas stacidomo de apud-urba fervojo, iranta al Wilanów kaj Grójec.

De tie iras str. Marszałkowska tra placo de l' Savinto (Plac Zbawiciela), sur kiu troviĝas preĝejo de la sama nomo.

De str. Marszałkowska maldekstren iras str. Śniadeckich, kiu kondukas al domoj de Politekniko kun tre belaj internaj arkaĵoj.


Str. Marszałkowska trairas modernan kvartalon de la urbo, konstruitan en XIX jarcento.

Ni venas al aleo Jerozolimska. Maldekstre troviĝas Ĉefstacidomo. Irante pluen, ni renkontas str. Sienkiewicza, kiu kondukas al str. Jasna, kie sub nro 5 estas Filhar-



Warszawa

Monumento de princo Józef Poniatowski



Warszawa

Tombo de Nekonata Soldato


monio kun bela kaj granda koncerta salono. Tra str. Moniuszki ni revenas al str. Marszałkowska, kiu finiĝas per vertikala str. Królewska kaj Saksa Ĝardeno. Ni turniĝas dekstren kaj tra str. Królewska ni venas al placo de Małachowski, ĉe kiu sub nro 3 troviĝas Muzeo de Belartoj.

De tie ni rapidas al Saksa Placo (Plac Saski), kiu estis antaŭkorto de Saksa palaco el XVIII jc., rezidejo de polaj reĝoj el saksa dinastio: August II kaj August III. Nun troviĝas en ĝi Generala Stabo de la pola armeo.

Sur la palaca fono estas videbla monumento de princo Józef Poniatowski, starigita en 1923 j. Ĝi estas verko de Thorvaldsen el 1831 jaro. Malantaŭ la monumento troviĝas tombo de Nekonata Soldato, kies restaĵon oni venigis el tombejo de defendantoj de Lwów.


Malantaŭ de palaco etendiĝas la Saksa Ĝardeno, jam menciita, kun aĝaj arboj kaj skulptaĵoj el XVIII jarcento.

Tra str. Wierzbowa ni venas al unu el plej belaj placoj de Warszawa — Teatra Placo (Plac Teatralny). Ĉi tie troviĝas urbodomo kaj magistrato (iam privata palaco el 1725 j.), dekstre bela empira Granda Teatro (Teatr Wielki), kon-



Teatra placo

Warszawa



Warszawa

Granda Teatro



Warszawa

Ministerio de Financoj

struita en 1833 laŭ projekto de Corazzi. En ĝi troviĝas opero. En la sama domo troviĝas Nacia Teatro (Teatr Narodowy), renovigita, post forbrulo, en 1924 j.

Ni iras de tie ĉi tra str. Senatorska, kie ni preterpaŝas preĝejon de S-ta Antono. Sub nro 40, en estinta palaco de Mniszech, troviĝas Komercista Klubo, en kies salonoj juna Chopin koncertludis. Duaflanke — Palaco de Zamojski. Ĝi estas estinta Blua Palaco, konstruita de August II por lia neleĝa filino Anna Orzelska.

Str. Senatorska finiĝas per empira palaco de Ministerio de Financoj. Tra str. Rymarska ni iras al str. Leszno, kie estas vidindaj: kalvinana gota preĝejo el XIX jc. kaj katolika baroka preĝejo de S-ta Mario el XVII jc.

De tie tra str. Tłomackie, ĉe kiu troviĝas vidinda renesanca sinagogo el XIX jc., ni venas al str. Bielańska, kie sub nro 5 estas Teatro de Nowości, en kiu troviĝas opereto. Ni revenas al la konata Teatra Placo.

En hebrea kvartalo ĉe str. Okopowa (tramveturilo nro 19) troviĝas hebrea tombejo, kie ripozas restaĵoj de la aŭtoro de Esperanto Dro Ludoviko Lazaro Zamenhof.

Sur la tombo estis en la jaro 1926 malfermita monumento, fondita de la tutmonda esperantistaro.

Ĉirkaŭaĵo de Warszawa.

Wilanów (legu Vilanuv), vilaĝo apud Vistulo, situita unu mejlon de Warszawa estis posedaĵo de la reĝo Jan III Sobieski, kiu veniginte ĉi tien el Italujo artistojn, starigis palacon en itala stilo kaj ĉirkaŭis ĝin per belega ĝardeno. La palaco estas ornamita per bildoj kaj diversaj dekoraĵoj. Por vizitanto interesaj estas kelkaj ĉinaj ĉambroj, rememorigantaj per ĉiu detalo la Bluan Staton.

Vidindaj estas **Królikarnia** kun palaco, konstruita de Thomalis, kortegano de la reĝo Stanisław August, **Ja-
błonna** kun belega ĝardeno kaj palaco, finkonstruita de princo Józef Poniatowski kaj **Bielany** kun preĝejo kaj monaĥejo el 1639 jaro, kun la tombo de konata patrioto Stanisław Staszic.

Ĉapitro II

Ekskurso al Poznań, Pomeranio (Pomorze) kaj Danzig (Gdańsk)

1. DE WARSZAWA AL POZNAŃ

De Warszawa al Poznań ni veturas sur novkonstruita fervoja linio. Survoje ni renkontas **Łowicz** (legu: Uoviĉ), kiu en antaŭaj tempoj estis ĉefurbo de tiama duklando de Łowicz, kampara fruktodona lando. De tiam konserviĝis ĝis nun diverskoloraj popolaj kostumoj. Hodiaŭa Łowicz estas distrikta urbo, kalkulanta 16.000 loĝantojn.

Poste ni renkontas distriktajn urbojn: **Kutno**, fervoja centro, el kiu oni povas veturi en 5 direktojn, **Koło**, **Ko-
nin** kaj **Września** (legu: Vjesnja). Sekve ni venas al Poznań.

Ni povas ankaŭ veturi tra Nasielsk, Sierpc, Toruń kaj Gniezno, sed tiu vojo estas multe pli longa. Krome ni povas ŝipveturi sur Wisła al Toruń, de kie ni venas al Poznań per fervojo. Survoje apud rivero Wisła sidas urbo **Płock**, memoranta tre malnovajn tempojn de Pollando. La hodiaŭa Płock estas distrikta urbo, kalkulanta 28.000 loĝantojn. El la vidindaĵoj ni povas citi la malnovan katedralon.

2. POZNAŃ

Historio. Kiel diras legendo, Poznań estis starigita en la loko, kie renkontiĝis dukoj de tri gentoj: Leĥ, Ĉeĥ kaj Rus. En X jarcento la urbo estis sidejo de unua historia reĝo de Pollando, Mieczysław I, kiu ĉi-tie starigis unuan pollandan kurion episkopan. Bolesław la Kuraĝa konsideras kiel sian ĉefurbon Kraków, kaj Poznań restas nur ĉefurbo de Poznanja Grandduklando.

Dum invado de Tataroj en XIII jc., de Svedoj kaj Germanoj en XVII kaj XVIII jc. la urbo estis detruita kaj bruligita. El la cindroj Poznań leviĝas baldaŭ, iĝante ĉefa urbo de la tre riĉa, agrikultura lando.

En la jaro 1793 dum la dua dispartigo de Pollando, Poznań estis kunigita kun Prusujo, en 1806 revenas al Varsovia Duklando kaj post la Viena Kongreso estis ree enkorpigita Prusujon.

Malgraŭ centjara okupado Poznań konservis sian polan karakteron kaj ĝis nun estas konsiderata kiel spirita fortikaĵo de poleco.

Nuna Poznań, kuŝanta apud rivero Warta, estas vojevodia urbo, havanta sidejon de ĉefepiskopo, universitaton malfermitan en 1919 j. kaj fervojan direkcion. 220.000-a loĝantaro konsistas el 95% da Poloj kaj 5% da Germanoj kaj Hebreoj.


Vidindaĵoj. Rondiĝo tra la urbo komenciĝas de Rynek (Ĉefplaco), kiu estas unu el la plej belaj placoj en Pollando.

Meze staras urbodomo, kvarangula konstruaĵo kun alta turo. Konstruita en 1300 jaro en gota stilo estis renovigita en XVI jc. en renesanca stilo. Ĝian belstilan internajon, el kiu distingiĝas Akcepta kaj Reĝa salonoj, oni povas viziti inter 9—12 h.

Sur la ĉefplaco interesa estas ankoraŭ gardistejo, konstruita de Raczyński kaj estinta palaco de Działyński.

De la ĉefplaco al Plac Wolności ni iras tra str. Nowa, lasante dekstre kastelon de Przemysław, duko de Poznań. En la kastelo estas nun ŝtata arĥivejo.

Centro de Poznań estas Plac Wolności (Placo de Libereco). Ĉe angulo de str. Nowa estas Muzeum Wielkopolskie (Grandpollanda Muzeo), novstila de 1904 jaro, sed havanta malnovajn vidindaĵojn: bildojn, kolektaĵojn



Poznań

Urbodomo



Poznań


Teatro

natursciencajn, kaj industri-belartajn. Okulon de vizitanto frapas nemalproksima greka fasado de Biblioteka Raczyńskich (Biblioteko de Raczyński), konstruita en 1840 kaj estanta plej riĉenhava libraro en Pollando.

Ĉe str. de S-ta Marcin estas preĝejo de la sama sanktulo el XIII jc. kaj apude monumento de Adam Mickiewicz, la unua monumento de la famekonata poeto. Ĉe str. Ratajczaka estas interesa Milita Muzeo, starigita antaŭ kelkaj jaroj.

Ĉe str. 27 grudnia (str. de 27 Decembro), ĉefa vivarterio de la urbo, estas Pola Teatro (nro 18) nun drama kaj komedia. Ĉe str. Mielżyńskich 26, estas Muzeo de Societo de Sciencamikoj. Apude estas domo de estinta germana Koloniza Komisiono kaj Granda Teatro (Teatr Wielki), en kiu estas prezentataj operoj.

Apud la stacidomo estas imperiestra kastelo, konstruita de Wilhelm II. por prusaj imperiestroj. La romanstila konstruaĵo, iom tro peza, imponas per sia grandeco. La internaĵo aranĝita novstile, konservas tamen ioman ar-



Poznań

La Kastelo

ĥaismon. Ĝi estas vizitebla inter 10 — 13 h. Universitato estas en antaŭa germana akademio, apud la kastelo kaj enhavas plej grandan koncertan salonon.

Ĉe fino de str. Jeznicka estas paroĥa preĝejo kun belstila, riĉe ornamita baroka internaĵo.

Plej malnova historie estas en Poznań la katedralo, staranta en orienta parto de la urbo. Ĉar ĝi estis kelkfoje alikonstruata, ĝi ne estas purstila. En ĝi oni povas trovi multe da tombaj monumentoj de polaj episkopoj kaj eminentuloj. En reĝa kastelo estas sarkofago kun cindroj de kreintoj de la pola ŝtato, Mieczysław I. kaj Bolesław la Granda. Krome interesa estas kupra basreliefo de Wit Stwosz. Antaŭ la katedralo staras monumento de Jan Kochanowski, plej granda pola poeto de XVI jarcento.

Vizitindaj ankaŭ estas Zoologia kaj Botanika Ĝardenoj, la unua en antaŭurbo Jeżyce, kaj dua en Łazarz.

Krome estas vizitindaj preĝejoj: de S-ta Mario, de Dikorpo, de Franciskanoj, de Bernardinoj kaj de S-ta Adalberto.

El la ĉirkaŭaĵo estas vizitinda **Rogalin**, kun palaco el XVIII jc. de grafo Raczyński, kaj galerio de pentrarto, kaj palaco en Kórnik, enhavanta artistajn kaj historiajn kolektaĵojn.

3. DE POZNAŃ AL POMERANIO

Forlasinte Poznań, unu horon poste ni renkontas **Gniezno** (27.000 loĝantoj), iam ĉefurbo de Pollando. Kiel diras legendo, Leĥ haltinte ĉi tie kun sia militistaro, ekvidis neston de blanka aglo sur kverko. Mirigita kaj kontenta li fondis ĉi tie sian sidejon, nomis ĝin Gniezno (vorto devenanta de „gniazdo“ — nesto) kaj de nun konsideris la blankan aglon kiel blazono de sia lando.

En tiu urbo estas vidinda antikva katedralo kun la cindroj de S-ta Adalberto, mortigita en XI jarcento de paganaj prusoj.

Post Gniezno ni preterpasas **Trzemeszno** kun antikva preĝejo el X jc., en kiu troviĝas pokalo laŭdire oferita de Dubrawka, edzino de la unua pola reĝo, Mieczysław I. kaj **Mogilno** kun preĝejo fondita en XI jc. de Bolesław la Kuraĝa. Fine ni renkontas **Inowrocław** konatan kuraclokon kun saniga salenhava marĉo. La urbo kalkulas 30.000 loĝantojn. Vidinda estas romana preĝejo de S-ta Mario el XII jc.

Sude de Inowrocław estas lago Gopło kaj urbo **Kruszwica** (legu Kruŝvica) konataj en la historio de Pollando. Laŭ legendo ĉi tie en tiel nomata „Musa turo“ mortigis musoj legendan reĝon Popiel. Restis nur ruinoj el kastelo kaj la turo. Hodiaŭa Kruszwica havas 5.000 loĝantojn.

Baldaŭ ni trapaŝas la limon de Pomeranio.

De Warszawa al Pomeranio ni povas veturi per vagonaro tra **Nasielsk**, **Sierpc** kaj **Toruń**, aŭ per ŝipo sur Wisła (Vistulo) ĝis Toruń.

4. POMORZE — POMERANIO

Sur apudmara teritorio de Balta Maro inter riveroj Odra (Oder) kaj Vistulo loĝis en antaŭhistoria tempo — slava gento Pomeranianoj, kaj sur dekstra bordo de Vistulo — keltaj Prusoj. En XI kaj XII jarcento reĝis ĉi-tie pomeraniaj princoj, kiuj estis pli kaj malpli dependaj de Polujo. En 1226

jaro unu el polaj princoj de Mazovio, alvokis germanajn Kruckavalirojn kiel helpantojn kontraŭ idolanaj Prusoj, kiuj invadadis polajn teritoriojn. La Kruckavaliroj alvenis, eks-termis Prusojn kaj ekokupis ilian landon. La nomo Pruslando restis, la venkintoj konservis por si ankaŭ la nomon de Prusoj. Ili okupis kontraŭleĝe ankaŭ Pomeranion, kaj bataladis kontraŭ siaj bonfarintoj-Poloj. Pollando venkis fine la Kruckavalirojn, kaj en Toruń packontrakto en 1466 ricevis Polujo parton de Pomeranio kun urboj: Toruń, Chełmno, Grudziądz, kaj Gdańsk.

Dum dispartigo de Polujo (1772—1795) reokupis Germanoj (prusaj reĝoj — sekvantoj de sekularizitaj Kruckavaliroj) Pomeranion, kiu ne pli frue, ol en 1920 jaro per packontrakto en Versailles refariĝis pola, esceptinte la urbon Gdańsk (Danzig) kun ĉirkaŭaĵo, kiu estas nune Libera Urbo sub kontrolo de Ligo de Nacioj, kaj devas liveri laŭ la packontrakto al Pollando liberan aliron al maro. Pollando havas en Dancigo en propra administracio — fervojaron kaj sian poŝton. La haveno staras sub kunadministrado de Polujo kaj Dancigo.

Sude je marborda zono etendiĝas ĉeno de montoj, kun la plej alta pinto Wieżyca (331m). La ĉefloko estas tie urbeto **Kartuzy**, kiun oni povas atingi facile el Dancigo. La montaro ĉirkaŭ Kartuzy havas nomon Kaŝuba Svislando. Ĝi estas tiel bela dank' al multaj pentrindaj lagoj, arbaroj kaj valoj, kiel ekzemple la valo de rivero Radunia. Ĉie tie loĝas Kaŝuboj kiuj parolas kaŝuban dialekton de pola lingvo. Originalaj estas belaj kaŝubaj brodaĵoj.

La pomerania pejzaĝo devenas el glacia epoko. Tial troviĝas ĉi-tie multaj morenaj montetoj karakterizaj lagoj, lagetoj kaj arbaroj. Plej bele aspektas Kaŝuba Svislando, Tucholaj Arbaroj kaj la lagaro en ĉirkaŭaĵo de **Brodnica** en la plej orienta parto de Pomeranio. La urbon Brodnica oni povas atingi plej facile el Grudziądz (52 km). La urbo estis fondita en XIII jarcento; ĝi kalkulas nune ĉirkaŭ 10.000 loĝantojn. El malnova urbodomo, sur ĉefa urboplaco restis nur turo kun horloĝo. El XIII jc. devenas la katolika trinava paroĥa preĝejo, en gota stilo. El malnovaj muroj restis Ŝtona Pordego (Kamienna Brama) kaj Mazura Turo ĉe rivero Drwęca. El iama granda kastelo restis nur potenca turo, 51 m alta. Proksime je ruinoj de

la kastelo estas sur tombaro iama preĝejo de Reformatoj en baroka stilo, el 1761 jaro.

Plej vidindaj urboj estas en Pomeranio: Grudziądz kaj Toruń, survoje ankaŭ Bydgoszcz, kiu apartenas politike al Poznana Vojevodio.

Toruń ĉe Wisła-Vistulo. 50.000 loĝantoj, el kiuj — 95% Poloj, 5% Germanoj — ĉefurbo de Pomerania Vojevodio. Industrio: maŝinoj, brando, nutraĵoj, famaj torunaj mielkukoj, mebloj. Komerco: greno, ligno, ledo. Toruń estas sidejo de intelekta kaj scienca movado en Pomeranio. En Toruń naskiĝis la 19. II. 1473 pola astronomo Kopernik.

La ĉefa stacidomo Toruń-Przedmieście (legu: Toruń Pjedmjesce) troviĝas sur maldekstra bordo de Vistulo. En la urbon oni devas veturi tra Vistulo, aŭ per fervoja vagonaro al la stacidomo Toruń-Miasto, aŭ per vaporŝipo, aŭ sur ponto kun helpo de fiakroj.

Historio. La urbon fondis en la jaro 1231 Kruckavaliroj, kaj donis al ĝi magdeburgajn statutojn. Toruń estis ano de Hansa. Kiam la Kruckavaliroj tro subpremegis la loĝantaron, Toruń aliĝis en 1454 al ribelo de Pomeranianoj kontraŭ ili. Kun helpo de Poloj estis la Kruckavaliroj venkitaj. La milito finiĝis en 1466 per Toruna packontrakto inter la Kruckavaliroj kaj Poloj. De tiu tempo apartenis Toruń al Polujo ĝis ĝia dispartigo en 1793, kaj havis sian plej bonan periodon. En komenco de XVII jc. Toruń estis preskaŭ tiel granda kiel Varsovio kaj kalkulis 30.000 loĝantojn. En XVII jc. suferis la urbo multe kaŭze de sved-polaj militoj.

Vidindaĵoj: plej bele aspektas la urbo el suda maldekstra bordo de Vistulo. Sur sama maldekstra bordo kuŝas ruinoj de kastelo Dybówo. La maldekstran bordon oni povas plej facile atingi de la urbo per vaporŝipo, kiu regule cirkulas tra Vistulo.

En mezo de la urbo suprenleviĝas la urbodomo el XIII jc. en gota stilo. En ĝia korto staras skulptaĵo de Flosisto. En la urbodomo lokiĝas riĉa urba muzeo kun arĥivo. Antaŭ la urbodomo staras la monumento de Kopernik. En ĉefa urboplaco troviĝas tiel nomata Artus-Kortego, konstruita en 1891 en germana renesanca stilo. Antaŭe sur la sama loko estis malnova Artus-Kortego en gota stilo, kaj poste en bela flamanda renesanca stilo.

Proksime de ĉefa malnova urboplaco oni vidas preĝejojn en gota stilo: la preĝejon de Virgulino Maria el

XIII jc. kaj grandan preĝejon de S-ta Johano ankaŭ el XIII jarcento. La preĝejo de Virgulino Maria, kaŝita inter domoj, havas ĉarmajn, malpezajn turetojn. La preĝejo de S-ta Johano estas en stilo tipa por aliaj pomeraniaj preĝejoj el tiama tempo. Internaj ornamaĵoj en ambaŭ preĝejoj estas pliparte en baroka kaj rokoka stilo. Ĉefa preĝejo de Nova urbo estas la preĝejo de Sankta Jakobo el XIV jarcento, kiu laŭdire reprezentas la plej belan gotan konstruaĵon en Pomeranio. Interne baroka kaj rokoka ornamaĵoj. En najbareco suprenleviĝas nova gota garnizona preĝejo, konstruita en 1897 jaro. Ĝian internajn oni en la lasta tempo bele ornamis per nuntempaj skulptaĵoj kaj bildoj.

Laŭlonge de Vistulo oni vidas malnovajn murojn, fortikaĵojn, grenejojn, kaj tenejojn. En la muroj troviĝas stilaj pordegoj. En la limo de la malnova kaj nova urbo etendiĝas ruinoj de iama Kruckavalira kastelo el XIII jc. Apude staras bela konstruaĵo Junkerhof. Iom pli malproksime suprenleviĝas Klinita Turo (Krzywa Wieża). En la urbo troviĝas multaj malnovaj stilaj domoj, kun renesancaj kaj barokaj ornamaĵoj, tenejoj kaj grenejoj.

Urbo-kvartalo Bydgoskie-Przedmieście havas belegan grandan vidindan parkon.

Ĉirkaŭaĵo. Toruń estas ĉirkaŭita per riĉa arbaro, kiu atingas la urbon senpere. Kasteloj estas konservitaj en **Bierzgłówek** (24 km.), en **Golub** (16 km.) kastelo kun muzeo, en **Złotorja** (7 km.) nur ruinrestaĵoj ĉe Wisła, en **Jabłonowo** (30 km.) nova palaco el la jaro 1853, en **Niedźwiedź** (47 km.) palaco kun riĉa muzeo.

Chełmża (legu: Ĥeŭmża), 24 km. de Toruń, urbeto, kun 12.000 loĝantoj, fondita jam en XIII jc., kuŝanta inter lagoj, estis dum ses jarcentoj sidejo de episkopo. Episkopa preĝejo el XIII jc. en gota stilo, bela trinava konstruaĵo el briko. Interne troviĝas ornamaĵoj en diversaj stiloj. Ĉi tie estas la plej granda sukerfabriko en Pollando.

Chełmno (legu: Ĥeŭmno) 58 km de Toruń, 52 km de Bydgoszcz kaj 40 km. de Grudziądz, kun 12.000 loĝantoj, ekzistis jam en X jc. kaj estas unu el la plej malnovaj lokoj en Pomeranio. Kiam pola princo Konrad I. invitis la Kruckavalirojn, kiel helpantojn kontraŭ idolanaj Prusoj, en Chełmno estis ilia unua sidejo. Chełmno estis ano de Hansa, kaj havis siatempe pli grandan valoron ol Toruń.

kaj Gdańsk. En XV jc. komenciĝas ĝia falo. La urbo kuŝas pentrinde sur montetoj ĉe Wisła. Iamaj malnovaj defendaj muroj estas preskaŭ tute konservitaj. Ĝis nun restis Grudziądz Pordego en gota kaj renesanca stilo. Ĉe urboplaco suprenleviĝas urbodomo el XVI jarcento, en pura pola renesanca stilo, bone konservita. Proksime oni vidas paroĥan preĝejon, kiu estis en XIII jarcento episkopa preĝejo. Ĝiaj internaj ornamaĵoj estas bonstilaj. Arte valoraj estas unua preĝejo de Benediktaninoj en gota stilo el XIII jarcento. Ĝian internaĵon beligas barokaj ornamaĵoj. Vidinda estas ankaŭ la trinava preĝejo de Franciskanoj en gota stilo el XIV jarcento kaj la preĝejo de Dominikanoj el XIII jarcento en gota stilo, nune protestanta. Apud toruna pordego suprenleviĝas la preĝejo de Sankta Spirito, ununava bela, gota konstruaĵo el briko, kun alta kvarangula turo. Post dispartigo de Polujo uzadis Germanoj la preĝejon kiel militistaran veturilejon kaj tenejon. Ĉi tiu uzado de la preĝejo ruinigis ĝin.

Bydgoszcz (legu Bidgoŝĉ) ĉe rivero Brda, 108.000 loĝantoj, el kiuj 92% Poloj, 8% Germanoj, apartenas politike al Poznana Vojevodio, sed geografie al Pomeranio.

Industrio: papero, alumetoj, greno. La urbo pli kaj pli disvolviĝas tiel en industria kaj komerca, kiel ankaŭ en kultura direkto.

Jam en XIII jarcento oni renkontas la nomon Bydgoszcz. En 1227 ekzistis ĉi tie kastelo. La urbon fondis en 1346 pola reĝo Kazimierz la Granda. Precipe dum XVI jarcento la urbo floris. Poste ĝi suferis multe pro sved-polaj militoj. La urbo denove disvolviĝas, kiam oni en 1773 komencis fosi kanalon inter riveroj Noteć kaj Brda, por tiamaniere interligi la riverteritorion unuflanke de Noteć, Warta kaj Odra kaj aliflanke de Vistulo. La kanalo estas 27 km longa kaj 20 m larĝa.

Vidindaĵoj. Paroĥa preĝejo el XV jarcento en gota stilo; interne vidindaj estas: granda altaro kaj malnova latuna baltakvujo. Pli bela estas en angulo de stratoj: Gdańska kaj Jagiellońska — la preĝejo de Klaraninoj (Klarysek). Ĝi devenas el XVI jc. kaj estas konstruita en pura, bela pola renesanca stilo. Post dispartigo de Pollando en 1772 la Germanoj uzis la preĝejon, kiel veturilejon kaj tenejon kaj poste kiel muzeon. Kiam Bydgoszcz refariĝis pola, oni renovigis la preĝejon.

Rimarkindaj estas ankaŭ la garnizona preĝejo el XVII jc. en baroka stilo, protestanta preĝejo ankaŭ el XVII jc. kaj du preĝejoj el XX jarcento.

Apud la teatro staras belega monumento de Arkpafistino kaj en parko — Diluvo. Ambaŭ monumentoj estas verkoj de skulptisto Lepke. Interesaj estas ankaŭ malnovaj viandetoj.

La urbo faras modernan impreson. Restis nur malmultaj vidindaĵoj el malnovaj tempoj. Bela estas parko. Agrablajn kaj ĉarmajn promenadojn oni povas fari precipe en malnova urbo, laŭlonge de malnovaj kanaloj.

Grudziądz ĉe Wisła, 54.000 loĝantoj, el kiuj 85% Poloj, 15% Germanoj kaj Hebreoj. Grudziądz estas ĉefloko de pomerania industrio.

Komencon de Grudziądz oni devas serĉi en X jarcento; verŝajne Bolesław la Granda, pola reĝo, starigis kastelon sur hodiaŭa kastela monto, nomata Klimek. Dum XIII jarcento konstruis ĉi-tie Kruckavaliroj kastelon, de kiu restis nune ruino kun turo. Surirante la turon oni vidas la Vistulan malaltaĵon en suda direkto ĝis Chełmno kaj Swiecie, en norda direkto ĝis Nowa, kaj en okcidento — Tuholajn arbarojn. El aliaj vidindaĵoj estas en la urbo — la katolika paroĥa preĝejo de Sankta Nikolao el XIII jarcento en gota stilo; en la preĝejo troviĝas malnova baltakvujo en romana stilo, medalionoj super preĝejo en japana stilo, kaj altaroj en baroka stilo. Proksime suprenleviĝas la preĝejo antaŭe jezuita, en renescanca stilo kun bele skulptitaj barokaj altaroj. Apude — la urbodomo, antaŭe jezuita kolegio, ankaŭ en renesanca stilo. Ĉe str. Klasztorna kuŝas antaŭa monaĥejo de Benediktaninoj en baroka stilo. Apude la preĝejo de Sankta Spirito el XIII jc., en nuna aspekto el XVIII jc. Proksime de la urbodomo etendiĝas str. Spichrzowa (strato de grenetoj kaj tenejoj); la tenejoj estis en malnovaj tempoj samtempe fortikaĵoj, de Vistula flanko. Belege aspektas la fortikaĵoj kaj la urbo kun paroĥa preĝejo, kastela monto ktp., kiam oni malsupreniras sur Vistulan bordon kaj de tie ilin rigardas. Malantaŭ la fervoja stacidomo etendiĝas urba ĝardeno kaj parko.

Norde de la urbo troviĝas Citadelo. Tuj post dispartigo de Polujo starigis en 1776 tie sur monto la prusa reĝo

Frederiko fortikaĵon, kiu en 1807 povis kontraŭstari la sieĝon de Francoj kaj Poloj.

Oriente de la urbo (14 km.) estas vilaĝo **Rogóžno** kun muroj de kastelo, konstruita en jaro 1285; ankoraŭ bone konservitaj estas du bastionoj, muroj kaj parto de konstruaĵoj. Sudoriente de Grudziądz (16 km), troviĝas malnova urbeto **Radzyń** kun relative bone konservita kastelo. Sur alia, maldekstra bordo de Vistulo kontraŭ Grudziądz kuŝas **Lubień**, hodiaŭa kolonio el XVI jarcento kun originalaj konstruaĵoj en holanda, friza stilo.

5. DANZIG — GDAŃSK

Legendoj rakontas, ke Danzig estis fondita de Wyzimir, nepo de Lech, prapatro de Lechidoj-Poloj. Depost la tempoj de la reĝo Bolesław la Granda Danzig kune kun Apudmara Lando (Pomorze), kiu tiam enhavis ankaŭ Stettin kaj la insulon Rugja, apartenis al Polujo. Johano Kosmas de Praha, en la jaro 1000 nomas „Gyddanize“ pola lim-urbo. Poste regis tiun landon vojevodoj, kies estreco ŝanĝiĝis je princa, pli aŭ malpli dependa de la polaj reĝoj. Princo Świętopelk venigis en j. 1227 al Danzig la monaĥojn Dominikanojn kaj iniciatis la ĝis nun ekzistantajn foirojn en la tago de S-ta Dominiko. Post la morto de la lasta princo Mestwin II ekregis tie la reĝo Przemysław kaj post li Władysław Łokietek. Estante okupita en aliaj partoj de la lando li venigis la Kruckavalirojn kontraŭ Waldemar II de Brandeburgio, kiu minacis al Danzig. Ili okupis Danzig kaj Pomorze. La urbon ili ekposedis per ruzo kaj faris en ĝi teruran buĉadon, kies rememoro vivas ankoraŭ ĝis nun en la popolaj kantoj de Kaŝuboj. Sub la regado de Krucistoj Danzig prosperis dum la majstro Winrich de Kniprode, tamen baldaŭ komencis periodo de subpremado kaj limigado de libereco, pri kiuj rakontas senpartiaj germanaj fontoj. La Grandmajstro Konrad Wallenrod fondis eĉ en j. 1390 apartan Novan Urbon kaj donis al ĝi privilegiojn por subfosi la signifon de Danzig. La plej nuba periodo de regado de Kruckavaliroj ekestis post la batalo apud Grunwald (Tannenberg) en j. 1410. La komturo Ulrich von Plauen antaŭ Pasko inside ordonis murdi en la Danziga kastelo la urbestrojn Konradon von Letzkau kaj Arnoldon Hecht kaj la konsilanon B. Gross kaj iliajn korpojn ĵeti en sterkon. Oni

entombigis ilin poste en la Maria preĝejo. Danzig aliĝis poste al la insurekcio kontraŭ la Kruckavaliroj kaj en j. 1454 konkiris kaj detruis ilian kastelon senpostesigne. Dum la tuta milito por aligo de Pomorze al Polujo la plej grandajn oferojn portis Danzig, sed estis vere reĝe donacita de Kazimir Jagellono en „Privilegium Casimirianum“, kiu donis al ĝi la plej grandajn avantaĝojn, kiajn oni nur povis imagi. Dum la regado de Kruckavaliroj Toruń, kuŝanta ĉe la tiama pola limo disvolviĝis kaj riĉiĝis danke al tio, ke ĝi estis komerca ĉefpunkto inter Polujo kaj Okcidento; post la reveno de Pomorze al Polujo ĝian lokon ekposedis Danzig. El profundo de Polujo sur Vistulo, kiu kune kun siaj flankriveroj trafluas la tutan landon, oni venigadis al Danzig grenon, lignon por la konstruado de la ŝipoj, linon, kanabon k. t. p.; interŝanĝe Danzig liveris al la lando produktojn de artindustrio, kiuj tiam estis modaj tiel, ke hodiaŭ la plej grandiozajn artobjektojn oni devas serĉi ne en Danzig sed en Polujo.

Dum kelkjarcenta regado pola nur unufoje la urbo kontraŭstaris la reĝon, nome kontraŭ Stefan Batory, timante limigon de l' privilegioj, tamen baldaŭ ĝiaj reprezentantoj surgenue petis la pardonon de l' reĝo. Ekzemplojn de neŝancelebla kaj senlime oferema fideleco por Polujo donis Danzig dum la svedaj militoj, kio elvokas des pli grandan admiron, ke plimulto da Danziganoj estis evangelianoj kaj la Svedoj proklamis, ke ili batalas en la nomo de tiu konfeso. Rimarkinda estas la fideleco de Danzig al la reĝo Stanisław Leszczyński kontraŭulo de Aŭgust la Saksa, kiu kaŭzis al la urbo sennombrajn perdojn. La tempoj de disdivido de Polujo estis por Danzig ankaŭ malĝojaj. Detranĉita dum la unua divido de Polujo en j. 1773 pro okupo de Pomorze flanke de Prusujo Danzig restis fidela al Polujo malgraŭ la fera ringo de prusa impostlimo, kaj falis nur pro tio, ke ĝi ne volis propravole submetiĝi. Pri la agordo, kiu tiam regis en la malfeliĉa urbo, bone atestas la memoraĵoj de Johanna Schopenhauer, la patrino de l' granda filozofo, kiu kune kun la edzo forlasis Dancigon kelkajn horojn antaŭ la eniro de prusa militistaro, ne volante simile al multaj aliaj, vivi en la urbo, kiu perdis sian republikanan liberecon. Ankaŭ la fama artisto Daniel Chodowiecki, naskiĝinta en Danzig, kiu pro gajno transloĝiĝis Berlinon kaj en j. 1773 vojaĝis Dancigon por viziti la familion, atestas

pri la sentoj de Danziganoj al Polujo. Post disigo de Polujo la urbo senigite de vivigaj fontoj falis en la vicon de tria-gradaj provincaj lokoj, kaj hodiaŭ Gdynia, kiu en la momento de ekposedo de la marbordo per Polujo estis vilaĝo kun dekkelkaj dometoj, kreskas kun rapideco de amerikanaj urboj, kio tute por Danzig ne estas profita.

Ŝatanto de antikvaj memoraĵoj trovas en Danzig multajn grandiozajn monumentojn de arto kaj arkitekturo. De la romanaj monumentoj restis nur partoj de internaĵoj en la preĝejo en Oliwa kaj de S-ta Nikolao en Danzig. La gota arkitekturo estas parto de brika konstrumaniero, kiu vidiĝas en la tuta Polujo kaj tiuj partoj de hodiaŭa Germanujo, kiuj estis iam enloĝataj de Slavoj. Kiam la gota stilo povis tiel la internan kiel ankaŭ la eksteran flankon de konstruaĵo riĉe ornami per skulptaĵoj, la brika gotstilo devis limiĝi al ornamado de la muroj per substre-kado de konkavaĵoj kaj konveksoj; tio estas la kaŭzo de multaj kavaĵoj, ornamentaj zonoj brikaj, vertikalaj ripoj k. t. p. En la tuta Pomorze oni rimarkas la deziron doni al la muroj multkolorecon, kiun oni atingis kovrante la kavaĵojn per kalktavolo forte kontrastanta kun la fono de ruĝa briko. Belegaj ornamoj de diverskoloro poluritaj bri-koj, kiuj tiel riĉe estis enkondukitaj en la preĝejo de S-ta Jakobo en Toruń, estis nur parte aplikitaj.

Ekstreme ĉarma konstruaĵo en Danzig estas la Granda Muelejo, konstruita en j. 1349 de la Kruckavaliroj, donaci-ta al la urbo de Kazimierz Jagiellono, tre interesa pro tio, ke ĝi ĝis nun funkcias movata kiel iam per la rivereto Radunia. Grandioza estas la Malliberula Turo konstruita en j. 1346 kiel fortikaĵo en la urbomuroj, ŝanĝita poste je malliberejo, kovrita per belega tegmento en la stilo de nederlanda renaskiĝo en j. 1587. Apud ĝi troviĝas la Ekzekutejo, rekonstruita en j. 1576 en la sama stilo, riĉe ornamita per skulptaĵoj, kaj la malfrugota Pafejo de S-ta Georgo el j. 1494. Proksime oni rimarkas ŝtonkonstruitan iaman pordegon nomatan Alta pro tio, ke ĝi kondukas al monteta ĉirkaŭaĵo, kiam la kontraŭa pordego kondukanta al la apudvistula ebenaĵo, ricevis la nomon Malalta. La Altan pordegon konstruis en j. 1588 Wilhelm von dem Blocke laŭ la Berchem'a pordego en Antverpen, kiu prenis ekzemplon de la pordoj de Veniza arkitekturo Michele Sanmicheli, similaj al la romaj triumfaj arkoj. La malsu-

pera parto de la danziga pordego ornamita per rustiko kun konkave skulptita branĉeto sur ĉiu ŝtono. Sur la supra frizo aperas grandiozaj blazonoj de Polujo, Pola Pomorze kaj Danzig.

Trairinte la suprenomitajn konstruaĵojn al la urbo oni ekvidas la pordon de la Longa strato. Iam ĝi estis gota en la muroj, kiuj per malpli larĝa zono ĉirkaŭis la iaman urbon. Kiam ĝi perdis sian antaŭan signifon, oni an-stataŭis ĝin en j. 1614 per alia, ĝis nun ekzistanta, pure ornama, en la stilo de malfrua itala renaskiĝo kun flandraj aliigoj. Desub la arkaĵoj de tiu pordego montriĝas belega perspektivo al la Longa strato, iom kurbiĝanta, sur kies fino aperas ĉarma urbodomo kun malpeza, gracia tureto. Ankoraŭ hodiaŭ tiu strato konservis sufiĉe grandan nombron da malnovaj domoj. Iam, kiam antaŭ ĉiu domo etendiĝis terasoj similaj al tiuj, kiuj konserviĝis en la naj-bareco de Maria preĝejo, la perspektivo estis tiel ĉarma, kiel ĝin prezentas en siaj desegnaĵoj Chodowiecki. La urbodo-mon oni rekonstruis el gota kaj la tiron kovris per belega kupra kiraso en la speco, kiun kreis la flandra renaskiĝo. En ĝia supro, simile al la preĝejo de S-ta Katerino aranĝita estas la sonorilmuziko. En la urbodomo la plej bela estas la Ruĝa ĉambrego de konsiloj, rememoriganta la plej ĉarmajn internaĵojn de italaj palacoj de malfrua renaskiĝo. Al tiu ĉambrego kondukas riĉe lignoskulptita pordo kun granda pola aglo surhavanta la blazonon de la reĝo Johano Sobieski. En la ĉambrego iom kaŝite denove aperas la pola aglo ligneskulptita. En la najbara malpli granda ĉambro oni renkontas la aglon kun la blazono de Henriko Valois, reĝo de Polujo kaj Francujo (Henriko III), kaj en la tuta urbodomo estas multe da interesaj memoraĵoj el la polaj tempoj, ekz. la horloĝo donacita de la reĝo Stanisław Le-szczyński. Iam la grandan, t. n. Blankan ĉabron or-namis la portretoj de la polaj reĝoj, de kiuj la plej bela estis tiu de Władysław IV., pentrita de la fama danziga majstro Daniel Schulz.

Malantaŭ la urbodomo ĉe la Longa Foirejo staras la Ar-tuskorto, iama sidejo de societoj de riĉaj urbanoj, ŝan-ĝita en j. 1742 je grenborso. Sur la pordego troviĝas skul-ptitaj brustbildoj de la reĝoj Zygmunt III kaj Władysław IV. Nun oni eniras tien tra la najbara domo, kies vestiblon ornamis per dancigaj antikvaĵoj konata kolektanto Giełdziń-

ski. La interno de Artuskorto formas unu ĉambregon, apogitan je kvar granitaj kolonoj subtenantaj palmoforman arkadon. Ĉiu societo, kiu tie ekzistis, ornamis laŭ sia plaĉo lokon, kaj de tio formiĝis surpriza diverseco de mebloj. Oni vidas tie tre malnovan bildon prezentantan la konkiron de Malborg de Kazimir Jagellono kune kun la dancigaj helpmilitistoj, bildon de Orfeus verko de Johano Fredeman de Vries el Leeward, fama pro siaj eldonaĵoj de bildoj de nederlanda renaskiĝo, la bildon de la Lasta Juĝo de Anton Möller, nomata „la pentristo de Danzig“, marmoran statuon de la reĝo August III, portreton de Stanisław August k. t. p. Intereson vekas malgrandaj modeloj de ŝipoj pendigitaj sub la plafono. Rimarkindaĵo estas forno alta je 12 m. de kolore poluritaj kaheloj devenanta el j. 1546.


Antaŭ la Artuskorto staras puto kun la bronza statuo de Neptuno, la verko de Adrian de Vries el j. 1620. Sur la ĉirkaŭanta ĝin fera krado devenanta el j. 1634 troviĝas polaj kaj danzigaj blazonoj.

La Longan Foirejon fermas La Verda pordego, kiu estis domo konstruita por la polaj reĝoj kaj samtempe pordo kondukanta al Mottlau la flankrivero de Vistulo, kiu formas en Danzig internan havenon. Konstruis ĝin Johano Kramer en j. 1564 en tipa stilo de nederlanda renaskiĝo kun certa aldono de itala ornamarto. La sama Kramer konstruis en j. 1569 la Anglan domon, la plej grandan privatan domon en Danzig.

En la stilo de nederlanda renaskiĝo estas la urbodomo de Malnova Urbo, la verko de Anton von Obbergen el j. 1589 interesa pro tio, ke simile al kelkaj nederlandaj domoj, la fenestroj de l' teretaĝo ne respondas al la fenestroj de la supra etaĝo, kion oni rimarkas ankaŭ en la Armilejo, ekstreme originala konstruaĵo de la sama majstro.

De la Verda Ponto sur Mottlau grandioze prezentiĝas la granda levilo havena konstruita en j. 1411, pro kiu komenciĝis la malpaco de la urbo kun la Kruckavaliroj, kiu alkondukis al la supremenciita krima mortigo de la urbestroj. Inter la brakoj de Mottlau kuŝas la Insulo de Grenejoj, sur kiu la pli malnovaj grenejoj memoras la polajn tempojn, kiam oni tie metis la grenon venigatan el la profundo de l' lando. La plej karakterizaj estas la Ansera Kolo de j. ĉ. 1400 kaj la „Reĝa grenejo“.

La privataj domoj en Danzig laŭ la norda kutimo havis



Katedralo de S-ta Mario

Danzig (Gdańsk)

largon de nur du aŭ tri fenestroj, sed alton de tri aŭ eĉ kvar etaĝoj, kun krutaj tegmentoj kaj altaj teretaĝoj, en kiuj troviĝis granda vestiblo. Tiujn mezepokajn dimensiojn konservis la domoj ankaŭ, kiam el Nederlando venis la stilo de renaskiĝo en la speco flandra aŭ itala-franca. La plej bela specimeno de malfrua itala renaskiĝo estas la domo konstruita en jaro 1618 de Johano Speyman la urbestro, kiu fariĝis fama per tio, ke dum malsato en Italujo sendis tien grandan ŝiparon kun la greno. De la posteaj posedantoj devenas la nomo de Domo de Steffens. Fama danziga skulptisto Andreo Schlüter la Maljuna en la domo por si konstruita en j. 1640 kunigis motivojn nederlandajn kun italaj kaj kreis tuton, kiu fariĝis tipa por la stilo de la domoj en Danzig.

La plej grandioza preĝejo en Danzig estas de S-ta Maria, konstruita en jaro 1402–1502, longa je 105 m., larĝa je 66 m., kun potenca, nefinita turo alta je 78 m. Same ĝia ekstero kiel ankaŭ la interno faras imponan impreson pro sia simpleco kaj potenco. Interne konserviĝis multe da valoraj antikvaĵoj, kiel la triptiko de la Lasta Juĝo, unu el la plej bonaj verkoj de Johano Memling, la triptiko skulptita en j. 1515 de Miĥaelo Schwarz de Augsburg, granda horloĝo astronomia, la verko de Johano Düringer el j. 1470 kaj la fama kolekto da liturgiaj vestoj, inter kiuj la plej malnovaj teksaĵoj devenas de la XII jc.

Malpli granda, sed ne malpli interesa estas la preĝejoj de S-ta Katarino, de S-ta Triunuo kun la kapelo de S-ta Anna, de S-ta Johano kun potenca turo, de S-ta Nikolao kun multaj polaj tomboŝtonoj kaj la lasta de la gotaj, tiu de S-taj Petro kaj Paŭlo.

La renaskiĝo postlasis neniam monumentojn en la preĝejaj konstruaĵoj, ĉar tiam kun la reformacio malfortiĝis la fervoro al konstruado de novaj preĝejoj, kaj la baroko donis nur la Reĝan Kapelon, nomitan tiel je la honoro de Johano Sobieski, kiu kune kun la primato Olszowski subtenis ĝian konstruadon. Tiun kapelon ornamas la skulptaĵoj de Andreo Schlüter la pli Juna.

El artindustrio en Danzig plej altan nivelon atingis la oraĵista, bronza kaj lignaĵista, kaj la monfarejo, gravurkaj presarto famiĝis per vico da unuarangaj verkoj.

Belan muzeon de artaj antikvaĵoj posedas Danzig en la postfranciskana monaĥejo.



Białystok

Paroĥa preĝejo

Ĉapitro III

Ekskurso al Wilno

1. DE WARSZAWA AL WILNO

Survoje al Wilno ni renkontas urbon, kiun konas ĉiu esperantisto el historio de la lingvo, **Białystok** (legu Bjaŭistok). Gedymin, litova princo konstruis ĝin en la jaro 1310. Unue Białystok estis vilaĝo, poste ĝi estis posedaĵo de kelkaj polaj eminentuloj, inter kiuj estis Czarniecki kaj Brannicki. La lasta starigis ĉi tie en XVIII palacon en rokoka stilo, kie troviĝas nun vojevodia oficejo.

En la jaro 1855 naskiĝis en Białystok aŭtoro de Esperanto, dro L. L. Zamenhof. Ĉar en la urbo loĝis diversnaciaj homoj, poloj, rusoj, germanoj, hebreoj, tiu diverslingveco igis junan Zamenhof depost frua aĝo pensi pri la ideo de lingvo komuna. La penso naskiĝinta en Białystok estis finfine realigita aliloke, en Warszawa en 1887 jaro.

Nuntempa Białystok estas vojevodia urbo, havanta ĉirkaŭ 77.000 loĝantojn. La urbo estas centro de komerco kaj industrio, precipe drapa, por nord-orienta Pollando.

Sekve ni venas al **Grodno**, distrikta urbo, kalkulanta



Białystok

Palaco de Branicki

35.000 loĝantojn. Vidinda estas kastelo, konstruita de Stefan Batory, pola reĝo. En ĉirkaŭaĵo estas Puszcza Białowieska (legu: Puŝĉa Bjaŭovjeska, Arbarego de Białowieża), provizanta lignon ne nur al la lando, sed ankaŭ al eksterlando.

Trapasinte urbeton **Orany**, ni fine venas al Wilno.

2. WILNO

Historio. **Wilno** (legu: Vilno) estis konstruita en 1320 j. de princo Gedymin. En 1387 j. pola reĝo Władysław Jagiełło enkondukas kristanismon. De tiu tempo la urbo forte disvolviĝas. La regado de Zygmunt la Maljuna kaj de Zygmunt August estis tre meritinda por Wilno. Depost la Lublina Unio en 1569 jaro, la urbo falas. Inter 1655—6 Wilno estas okupata de Rusoj. Reĝo Jan III Sobieski en XVII jc. donas al la urbo la samajn leĝojn, kiel al Kraków. En 1773 jaro post nuligo de la Jezuita monaĥejo Wilna Akademio, fondita de Stefan Batory, estas transformita je Ĉefa Lernejo Litova, el kiu Aleksander I, la rusa reĝo, kreis Universitaton, en kiu studis multaj polaj grandaj patriotoj. En



Wilno

Ostra Brama

Wilno fama pola poeto Adam Mickiewicz skribis sian poemon „Dziady“, en kiu estas priskribitaj kruelaj martiroj de pola junularo sub la rusa regado. En 1812 jaro la rusa armeo forlasas Wilno, kien, antaŭata de polaj ulanoj, enpaŝas Napoleono I. Post lia malvenko la urbon ekokupas ree la Rusoj. En la ribelo de 1831 kaj 1863 kontraŭ la rusa registaro Wilno tre aktive partoprenas.

Wilno estas unu el plej bele situitaj urboj de Polujo, inter du riveroj Wilja kaj Wilejka; ĉie montetoj, kovritaj per arboj, ĝardenoj kaj parkoj; tre pentrinda ĉirkaŭaĵo. Arĥitekturaj memoraĵoj estas tre multaj kaj belaj. En gota stilo estas konstruitaj preĝejoj de S-ta Anna, S-ta Bernardo, S-ta Johano kaj aliaj.


Oni rimarkas tre grandan influon de la itala arĥitekturo en la preĝejo de S-ta Miĥaelo, Petro kaj Paŭlo kaj multaj aliaj. Nur malmultan influon havis rusa regado, kiu konstruis nur tre malmultajn novajn preĝejojn, precipe tamen alikonstruis kelkajn katolikajn preĝejojn kaj neniigis Wilnan Universitaton.

En la jaro 1920 la urbo estis okupita de pola armeo. En 1922 jaro kunvenis ĉi tie seĝmo de Wilna lando kaj decidis aliĝi al la Pola Respubliko. Hodiaŭa Wilno estas vojevodia urbo, kalkulanta 150.000 loĝantojn.

Ekskursoj. De la stacidomo la vojo iras tra pordego Ostrabrama, kiu estas unu el 5 pordegoj en la muro, per kiu la urbo estis ĉirkaŭita en XVI jc. Super ĝi estis fondita kapelo kun bela bildo de S-ta Mario, granda sanktaĵo por ĉiuj, ne nur katolikaj sed eĉ ortodoksaj Litovanoj kaj Blank-rutenoj. Apude troviĝas preĝejo de S-ta Teresa kaj ortodoksa preĝejo de S-ta Trio.

Tra str. Ostrobramska ni iras al Plac Ratuszowy (Urbodoma placo), sur kies mezo staras urbodomo, alikonstruita en XIX jc. je teatro. Sur la placo troviĝas preĝejo de S-ta Kazimierz. Forlasinte la placon, ni iras tra str. Wielka (vidindaj domoj nro 58, 34) kaj Świętojańska, ĉe kiu estas domo nomata „Kardynalja“, estinta sidejo de episkopo Jerzy Radziwiłł, nun poŝt-telegrafa domo. Kontraŭe estas preĝejo de S-ta Johano el XIV jc. Apud ĝi Jezuitoj fondis kolezion, transformitan je Akademio, poste Universitato.

Tra str. Zamkowa ni iras al Zaułek Bernardyński, kie konserviĝis interesaj domoj, stilaj pordegoj kaj kortoj. Sekve estas 3 preĝejoj: de S-ta Miĥaelo el XVI, de S-ta



Wilno

Preĝejo de S-ta Anna

Anna el XIV eble plej bela, en gota stilo kaj de Bernardinoj el XV jc. Tra str. Królewska ni venas al Plac Katedralny (Katedrala placo), sur kiu staras katedralo de S-ta Stanisław el XIV jc. Ĝian internajon ornamas belaj bildoj, statuoj kaj monumentoj. Vidinda estas reĝa kapelo aŭ de S-ta Kazimierz, kies restaĵoj estas en arĝenta ĉerko super la altaro. En la katedralo estas ankaŭ restaĵoj de grandprinco Witold.

De la katedrala placo ni vidas monton Góra Zamkowa (Kastela Monto) kaj Góra Trzykrzyska (legu: Gura Trijkjska, Monto de Tri Krucoj). Ĉe piedo de la montoj kuŝas Botanika ĝardeno kaj iom malpli proksime ĝardeno Bernardina, en kiu troviĝas teatro. Apud norda flanko de la montoj etendiĝas Antokol, plej malnova kvartalo de Wilno. Ĝi komenciĝas de str. Arsenalska kaj iras laŭlonge de rivero Wilja. Vidinda estas en tiu kvartalo preĝejo de S-ta Petro kaj Paŭlo el XVII jc. en stilo de renesance-baroko. Vidindaj estas belega ambono en formo de Petra boato kaj kristala kandelingo. Belega estas la internaĵo, ornamita de arkoj, arkaĵoj, muroj, kovritaj per gipsaj ornamaĵoj, faritaj de italaj majstroj.

Revenante de Antokol tra str. Biskupia ni venas al placo de Napoleono, sur kiu troviĝas unu el plej vidindaj domoj en Wilno, estinta episkopa palaco en neo-klasika stilo el XVIII jc.

Kontraŭ ĝia pordego troviĝas universitata biblioteko, ĉefa arkivejo kaj malnova astronoma observejo. Sur la placo estas ankaŭ baroka preĝejo de S-ta Kruco el XVI jc.

Tra str. Uniwersytecka ni venas al hebrea kvartalo. Mallarĝaj, kurbaĵoj stratetoj konservis sian karakteron el antaŭaj jarcentoj. Ĉe str. Żydowska (legu: Jidovska) troviĝas malnova sinagogo, interesa restaĵo el XVII jc. kaj ĉe str. Pozawalna nova sinagogo en maŭra stilo.

El tiu kvartalo ni venas tra str. Jatkowa, Niemiecka kaj Trocka al str. Pohulanka, unu el la pli imponaj stratoj de Wilno, ĉe kiu troviĝas Pola Teatro.

De tie ni iras tra str. Mała Pohulanka kaj Poznańska al str. Wileńska, kiu kondukas al bordo de rivero Wilja. Ĝin trairas str. de Adam Mickiewicz (legu: Mickjeviĉ), bela nova strato. Ĝi maldekstren kondukas al plej granda placo nomata Łukiszki, placo de ribelaj martiroj el 1863 jaro.



Wilno

Str. Jatkowa (Ghetto)

Str. Wileńska proksime de Wilja trairas str. de Lelewel, kie sub nro 4 troviĝas Societo de Sciencamikoj kaj Muzeo de Scienco kaj Arto. Vidindaj estas ĉi tie riĉenhava biblioteko, arkivejo kaj muzeo.

Ĉirkaŭaĵo. Wilno posedas pitoreskan ĉirkaŭaĵon. Sur dekstra bordo de Wilja estas **Zwierzyniec** (legu: Zvjėjnjec), arbara duoninsulo, malantaŭ kiu troviĝas loko nomata **Zameczek** (legu: Zameĉek), konata en la historio. Pli malproksime inter tilioj kaj kverkoj kuŝas **Werki**, kiun Władysław Jagiełło oferis al vilnaj episkopoj. Ĉi tie estas

vizitinda parko. Proksime de Wilno estas **Zułów**, estinta propraĵo de familio Piłsudski, konfiskita de la rusa registaro dum la ribelo en 1863 j., naskiĝloko de unua pola marŝalo kaj meritplena batalinto por sendependeco de Polujo Józef Piłsudski.

Ĉapitro IV

Ekskurso al Silezio

1. DE WARSZAWA TRA CZĘSTOCHOWA AL SILEZIO (ŚLĄSK)

Ni veturas sur plej malnova fervoja linio kaj ĝis nun plej grava. Survoje estas **Żyrardów** (legu: Ĵirarduv), fabrikeja urbo kun 30.000 loĝantaro. Ĉi tie estas granda fabriko de tolo, konstruita en 1833 jaro. Sekve **Skierniewice** kun 12.000-a loĝantaro, kie estas vidindaj: estinta palaco kaj paroĥa preĝejo el XVIII jc. en stilo de Louis XVI.

Poste ni renkontas **Piotrków**, kiu estas unu el la plej malnovaj urboj de Pollando. Ĉi tie en XVI jarcento havis sian sidejon Grandpollanda Tribunalo. El la vidindaĵoj oni devas citi gotan preĝejon el XIII jc., barokan preĝejon de Jezuitoj el XVIII jc. kaj estintan reĝan kastelon. Nuna Piotrków estas distrikta urbo, havanta 50.000 loĝantojn.

Sekve ni renkontas post du horoj koron de la pola kredantaro.

Częstochowa (legu: Ĉenstoĥova) estas urbo fondita en XIV jarcento, kiam Władysław Jagiełło fondis ĉi tie preĝejon kaj monaĥejon por Paŭlinoj, starantan sur Jasna Góra (Hela Monto). La monaĥejo estis antaŭe bonega fortikaĵo, kiu kontraŭstaris invadon de Svedoj en 1655 jaro. En la sama jarcento ĝi estis bazo de Bara Konfederacio*, kies estro Puławski batalis poste por libereco de Usono.

Monaĥejo de Jasna Góra estas unua indulgenca loko, kie dufoje dum ĉiuj jaroj (15 aug., 8 sept.) kunvenas 350.000-a pilgrimaro. La preĝejo, antaŭe gota, post forbrulo en XVII jc. estis baroke alikonstruita. En kapelo, kies plafono estas kovrita per freskoj de Karl Dankward, troviĝas mirakla

* konfederacio starigita en urbo Bar kun la celo batale konservigi liberecon al Pollando.



Częstochowa

Monaĥejo Jasna Góra

bildo de S-ta Dipatrino el 1650 jaro. La kapelo estas ornamita de multekostaj votoj el la plej malnovaj tempoj de Pollando. La preĝejo havas kelkajn salonojn, el kiuj plej vidinda estas Sala Rycerska (Kavalira Salono), ornamita per bildoj, prezentantaj kontraŭsvedan batalon el XVII jc.

La monaĥejo posedas riĉenhavan bibliotekon kaj trezorejon, en kiu troviĝas vidindaĵoj historiaj kaj artistaj, donacoj de diversaj polaj reĝoj kaj episkopoj. El la preĝejo supreniĝas 100-metra turo, de kiu estas videbla pentrinda pejzaĝo, pli malproksime ruinoj de kastelo en **Olsztyn**.

Vidinda ankaŭ estas preĝejo de S-ta Familio el 1911 jaro, plej granda preĝejo en Pollando, nun finkonstruata.

Nuna Częstochowa estas industria urbo, havanta kelkdek fabrikejojn, kaj enhavanta 80.000-an loĝantaron (kun antaŭurboj 120.000). Częstochowa estas distrikta urbo.


Du horojn poste ni surveturas la karbenhavan terenon kaj industrian lokon nomatan:

Zagłębie Dąbrowskie (legu: Zagŭenbje Dombrovskje), mineja kaj industria parto de Pollando, ampleksanta spacon de 555 km², kun diversspeca karbo. Laŭ geologiaj kalkuloj ĝis 1000 m da profundo ĝi enhavas 5 miljard-tunan provizon da karbo. La eksploatado de ĉi tieaj terenoj komenciĝis jam en XVIII jarcento. La produkto de karbo en 1926 jaro estis 7,233.507 tunoj. Pro proksimeco de karbminejoj, oni ĉi tie starigis multajn fabrikejojn (34 fabr. en 1926).

En Zagłębie Dąbrowskie estas tri pli grandaj urboj. **Dąbrowa Górnicza** (legu: Dombrova Gurniĉa) 45.000-a urbo, **Bełżin** (legu: Bendzin) 60.000-a tre malnova distrikta urbo kun vidinda kastelo de Bolesław Wstydlivy (la Hontema) el XIII jc. kaj **Sosnowiec** (legu: Sosnovjec), centro de ĉi tiu ĉirkaŭaĵo, havanta 110.000 loĝantojn.

En konstruado kaj disvolviĝo de tiuj urboj estas videbla rapideco. Tial ili estas konstruitaj senorde kaj senplane. Plej grandurban aspekton el ili havas Sosnowiec.

Kelkajn minutojn poste ni transpaŝas la limon de Silezio.



Ogrodzieniec

Ruinoj de la kastelo

2. DE WARSZAWA TRA RADOM KAJ KIELCE

Oni povas al Silezio ankaŭ veturi sur alia vojo, tra Radom kaj Kielce, sed tiu vojo estas je ĉirkaŭ 100 km pli longa kaj malpli oportuna.

Survoje ni renkontas fortikaĵon Dęblin (legu Demblin), sekve ni venas al **Radom**.

Jam en la jaro 1154 Radom estas konata en la historio. Ĉi tie multaj reĝoj kaj dukoj rezidis longtempe en kastelo, kiun konstruis Kazimierz la Granda en XIV jc. En la jaro 1505 en Radom Aleksander Jagellonido konsentas la konatan sejman decidon „Nihil novi“. Nuntempe Radom estas distrikta urbo, havanta 50.000 loĝantojn.

Krom la kastelo vizitindaj ankaŭ estas du gotaj preĝejoj el XIV kaj XV jc. kaj bela monaĥejo de Bernardinoj.

Sekve ni venas al unu el la plej belaj anguloj de Pollando, montaro Świętokrzyskie.

Sovaĝa arbaro, malfacile trairebla montaro, inklinis en antaŭaj tempoj potencajn posedantojn de tiu ĉirkaŭaĵo, la krakovajn episkopojn, starigadi multajn kastelojn, el kiuj restis

nur ruinoj. Ĉefurbo de tiu pentrindega lando estas **Kielce**. Jam en XII jc. ni trovas en la historio la unuan mencion pri Kielce. De tiu tempo la urbo rapide disvolviĝas, venas homoj, allogataj de beleco de la ĉirkaŭjo.

Vidindaj estas gota katedralo el XIV jc., poste baroke alikonstruita, estinta palaco de krakovaj episkopoj, en kiu troviĝas vojevodia oficejo, havanta 24 salonojn kaj malgranda turista muzeo (str. Leonarda 14).

Nuntempe Kielce estas vojevodia urbo, kalkulanta 50.000-an loĝantaron. 2 km okcidenten kuŝas **Karczówka** (legu Karĉuvka) kun monaĥejo en baroka stilo.

Laŭvoje ni renkontas **Chęciny** (legu Ĥencini) kun ruinoj de kastelo. Ĉi tie oni eksploatas belan marmoron. **Olkusz** negranda urbo, kie iam estis minejoj de arĝento kaj plumbo kaj monfarejo.

25 km suden (20 km de Kraków) estas plej bela loko el montaro Jura Krakowska ĉirkaŭ **Ojców** (legu Ojcuŭ). Ĝi kuŝas en belega valo, ĉirkaŭata de kalkŝtonaj rokoj.

Vidintaj ĉi tie estas ruinoj de kastelo el XIV jc., baroka preĝejo el XVIII jc. kaj kastelo Pieskowa Skala, kiu bonege konserviĝis ĝis nun. Ojców havas du hotelojn, kelkajn vilaojn kaj akvokuracan sanigejon.

Veturante sur tiu linio ni lasas maldekstre apud Wisła (Vistulo) urbon **Sandomierz** (legu Sandomjeĵ), kiu estas unu el la plej malnovaj urboj, kaj antaŭe unu el la plej potencaj. El tiama tempo restis gota katedralo el XIV jc., preĝejo el XIII jc. kaj originala urbodom.

Somere oni povas sur Vistulo veturi al **Kazimierz** (legu Kazimjeĵ) kaj **Puławy** (legu Puŭavi).

3. DE POZNAŃ TRA ŁÓDŹ

De Poznań iras du vojoj: tra Jarocin kaj Lubliniec aŭ tra Łódź. La unua fervojlinio estas pli mallonga, sed neoportuna, ĉar oni devas veturi trans germanan limon (Kreuzburg).

Veturante sur la dua fervojlinio ni renkontas **Kalisz** (legu Kaliŝ), kuŝanta apud rivero Prosna. Ĝi estas unu el la plej malnovaj urboj kaj estis konata en la historio (VI jc.) sub la nomo Calissia. Nuna Kalisz estas distrikta urbo, kalkulanta 55.000 loĝantojn. Dum la mondmilito en 1914 j. Kalisz

estis tute detruita de la germana armeo. Hodiaŭ ĝi estas jam rekonstruita.

Centro de pola industrio estas urbo **Łódź** (legu Ŭudĵ), nomata „pola Manchester“. La urbo estas sufiĉe nova, ĉar ĝia disvolviĝo datumiĝas depost la Viena Kongreso en 1815 j. Tial la urbo posedas nek artistajn, nek historiajn vidindaĵojn.

Plej bone ĉi tie disvolviĝis kotona industrio. Fabrikejoj de John, Geyer, Grohmann, Poznański kaj Scheibler amasigas dekkelmilan laboristaron.

La urbo, kalkulanta 500.000 loĝantojn, estas dua urbo laŭ grandeco en Pollando.


En ĉirkaŭaĵo de Łódź estas kelkaj fabrikejaj urboj, el kiuj plej grava estas **Pabjanice**, kun 40.000 kaj **Zduńska Wola** kun 30.000 loĝantoj. Ĉi ĉiuj urboj disvolviĝis en la lasta centajro post venigo tien ĉi de teksistoj el Ĉeĥoslovakujo kaj Germanujo. Ĉi tieaj fabrikaĵoj estas transportataj, krom en la tutan Pollandon, ankaŭ eksterlanden ekz. Britujon.

Sekve ni venas al **Koluszki** (legu Koluŝki), de kie ni veturas sur la fervojlinio Warszawa — Katowice (Silezio) tra Częstochowa.



Silezio

Viraj tipoj el ĉirkaŭaĵo de Chorzów




Silezio

Zinka fabrikejo en Szarlej

4. SILEZIO (ŚLĄSK)

Silezio, kuŝanta apud rivero Odra (Oder), apartenis entute al Pollando. En XIII jarcento la reĝo Bolesław Krzywousty dividis la tutan landon inter siaj kvin filoj. Tiam Silezion ekposedis Władysław II, kiu antaŭ sia morto ankaŭ dividis tiun landon inter siaj filoj. En XIII jarcento Silezio fariĝis vasala posedaĵo de la ĉeĥaj reĝoj, sed la efektivaj posedantoj estis la polaj Piastidoj. Kiam la polaj dukoj formortis, Silezio fariĝis propraĵo de Aŭstrujo. En XVIII jarcento preskaŭ la tutan Silezion okupis Frederiko II, la prusa reĝo, kiu enkorpigis ĝin en sian regnon. Komenciĝis de post tiam la intensa germanigado. Malgraŭ tio la lando konservis sian polan karakteron, kiu estis konstatita dum plebiscito en 1921 jaro, kiam por Pollando voĉdonis 377 distriktoj, por Germanujo 74. Silezio estas la plej riĉa industria parto de Pollando. La lando enhavas grandan riĉaĵon: karbon, da kiu oni kalkulis ĉirkaŭ 180 miliardojn da tunoj. Apud la karbo-minejoj kaj minejoj de fero, plumbo kaj zinko amasiĝis la metala industrio. Plej grandaj fabrikejoj estas en Królewska Huta kaj en Huta Laury.



Silezio

Fragmento el fabrikejo Huta Pokoju

Katowice estas ĉefurbo de silezia vojevodia distrikto. La urbo kalkulas nun 70.000 loĝantojn kaj estas sidejo de episkopo kaj fervoja direkcio.

La urbo elkreskis, same kiel Łódź, dum unu jarcento, de post kiam la natura riĉaĵo de la lando amasigis ĉi tie homojn kaj malfermis novajn laborejojn.

Ĝenerala aspekto estas tute kultura. Katowice havas karakteron de eŭropa grandurbo. El la vidindaĵoj oni devas citi str. de 3-a Majo, teatron sur ĉefplaco kaj sude parkon de Kościuszko.

De Katowice ni veturas per vagonaro aŭ per tramo al **Królewska Huta**, kiu enhavas en si grandegan fabrikejon de la sama nomo. La urbo havas aspekton de grandurbo, tamen iom pli fabrikeja. Apud Królewska Huta estas vidinda ĝardeno de Reden. La urbo kalkulas nun 75.000 loĝantojn.

Świętochłowice, Lipiny estas negrandaj minejoj kaj fabrikejoj urbetoj. Plue iras **Huta Laury, Nowy Bytom**,

en kiu minejo „Huta Pokoju“ estas dua koncerne ĝian grandecon. **Piekary** malgranda urbeto estas en la tuta Silezio konata kiel indulgenca loko, havanta miraklan bildon de Dipatrino en sia malnova preĝejo; **Tarnowskie Góry** kaj **Lubliniec** estas distriktaj urboj.

La sudan kaj okcidentan parton de Silezio okupas la agrikulturaj distriktoj, kies ĉefloko estas **Pszczyna** kun interesaj ĝardeno kaj palaco.

En tiu malnova Piasta lando artistaj konstruaĵoj ne estas tiel multaj, kiel oni povus supozi, ĉar oni multe konstruis el ligno. Lignajn preĝejojn oni konstruis antaŭ nelonge. La silezia gota stilo estas iom simila al tiu en Kraków. En arĥitekturaj ornamaĵoj ni rimarkos formojn, kiuj estis influataj de la ligna slava konstruaro, pri kiu kun admiro skribas Ditmar kaj Helmholt.

Kiel ni povas rimarki la lignaj preĝejetoj en Silezio estas samstilaj, kiel tiuj en aliaj partoj de Pollando. Tia, ekzemple preĝejo en Pniów, Warszowice, Poniszów aŭ Pszczyna povas tute bone stari apud Kraków, Lwów aŭ Lublin.

Sude de la priskribita industria parto de Silezio kuŝas urbo **Cieszyn**. Ĝia deveno ne estas certa, sed oni fiksas



Silezio

Virinaj tipoj el ĉirkaŭaĵo de Piekary

kiel fondaton jaron 810. La unua historia mencio pri la urbo aperas en IX jarcento, kiam estis venigitaj ĉi tien Bernardinoj, kiuj fondis por si monaĥejon. Kiam en la jaro 1210 alproksimiĝadis tatara falango, Cieszyn fariĝis fortikaĵo.

Tuta Silezio estis kelkfoje dividata inter la posteuloj de la reĝo Bolesław Krzywousty kaj fine estis starigita duklando de Cieszyn. La urbo fariĝas ĉefa por la lando kaj ĝuas zorgon de la Piastidoj. Kiam la dukoj formortis, la duklando fariĝas posedaĵo de ĉeĥa ŝtato, poste de la aŭstria.

El la vidindaĵoj de tiu bela kaj pura urbo distingiĝas urbodomo, granda protestanta preĝejo, katolika paroĥa preĝejo kaj aliaj.

Nuna Cieszyn estas distrikta urbo, kalkulanta 16.000 loĝantojn, kaj estas ĉefa urbo de la agrikultura parto de Silezio. Ĝi krome havas certan signifon, estante grava surlima punkto. Malgraŭ tio, ke Cieszyn estas situata en agrikultura parto, ĉi tie amasiĝis multaj negrandaj fabrikejoj. Koncerne la kalkulon laŭ nacioj, Poloj estas ĉi tie en plejmulto, ĉar ili prezentas la nombron de 60%.

Ĉapitro V

Ekskurso al Kraków kaj Tatroj

1. DE WARSZAWA AL KRAKÓW

La vojaĝon ni komencas laŭ la vojo, priskribita en la ĉapitro IV, 1, traveturante menciitajn tie urbojn; Żyrardów, Koluszki, Częstochowa por fine atingi vilaĝon Granica (esp. Limo), kiu estis antaŭ la milito limstacio inter Rusujo kaj Aŭstrio, ĝi estas nun nomata **Maczki**. Ni troviĝas jam sur teritorio de Okcidenta Malgrandpolujo kaj ni renkontas survoje urbeton **Chrzanów** (legu: Ĥjanuv) kun fabrikejo de lokomotivoj, **Trzebinia** (legu: Tjebinja), gravan industriurbeton, kie lokiĝas karbominejoj, zinkejo, petrolrafinejoj, kemia kaj metala industrioj.

Ni proksimiĝas al Kraków, lasante survoje **Tenczynek** kun ruinoj de kastelo, vilaĝon **Czerna** kun belega ĉirkaŭaĵo, **Krzeszowice**, kuraclokon kaj **Skala Kmity** (Roko de Kmita), de kiu laŭ legendo saltis surĉevale por morti nobelulo Kmita pro malfeliĉa amo.

El fenestroj de nia vagonaro altiras niajn okulojn prok-



Kraków

Tombomonteto de Kościuszko

sima montopinto, kiu ne estis kreita de la naturo, sed per la manoj de dankema popolo al heroo de Pollando, Tadeusz Kościuszko, kiu batalis ankaŭ por libereco de Usono: ĝi estas tombomonteto de Kościuszko.

En kelkaj minutoj ni jam staras en stacidomo de koro de Polujo, Kraków.

2. KRAKÓW KAJ LA OKCIDENTA MALGRANDPOLUJO

Kiu volas ekkoni la pasintecon de Polujo en la tempo de ĝia plej granda disvolviĝo same ŝtata kiel intelekta, tiu volu studi la memoraĵojn de Kraków. Pri Kraków diras jam araba komercisto Ibrahim en la X-a jarcento, kaj post li la araba geografiisto Al-Bekri en la XI-a jc., ka tiu ĉi urbo estas komercista nodo inter la okcidento kaj oriento. La episkopaĵo, fondita ĉi tie en la jaro 1000, faris el ĝi restejon de latina kulturo. Boleslavo la Malrekt-buŝa decidis en la orĉono de sia lasta volo, dividante la regnon inter siajn filojn en 1139-a j., ke la duko, kies parto entenas Krako-

von, estros la ceterajn, kaj tiam Kraków fariĝis la ĉefurbo de Polujo kaj okupis la lokon de Gniezno kaj Poznań. Kiam post la malĝojaj tempoj de l' dividiteco de la regno je etaj duklandoj, Lokietek ree tiujn unuigis kaj Kazimiro la Granda ilin plifortigis kaj igis respekti, Kraków komencis la epokon de sia efektiva disvolviĝo. Kazimiro la Granda finkonstruis la gotan katedralon sur Wawel, komencitan dum Lokietek, starigis ĉi tie masonitan kastelon, kaj en la jaro 1364-a fondis la Krakovan Universitaton. Kiam lia nepino (filino de Ludoviko hungara el la familio Andegaven) Jadwiga, heredante la polan tronon, edziniĝis pro la bono de sia popolo, rezignante je siaj korsentoj, kun la litova grandduko Władysław Jagiełło, kaj tiu ĉi, kiel reĝo de por ĉiam unuigitaj popoloj, ekloĝis en Kraków, tiu urbo komencas sian plej brilan epokon. Polujo — nun granda regno — staras ĉe la pinto de sia potenco kaj restas fortega dum pli ol du jarcentoj kiel fidinda muro landlima, repuŝadanta la tatarajn kaj turkajn invadojn, kiuj tiamaniere fariĝas sendanĝeraj por la okcidenta Eŭropo. La reĝino Jadwiga testamentas antaŭ sia morto siajn trezorojn por la disvolvo de la Krakova Universitato, kaj Jagiełło en la jaro 1400-a konstruigas novan loĝejon por tiu plej supera lernejo, kiu tiam bonege disvolviĝadis kaj ĝis nun ne ĉesis esti la fiero de la pola sciencularo. Reprezentantoj de la Universitato famigis ĝiajn plej noblajn celojn dum la sinodoj en Konstanco kaj Bazileo; inter siaj lernantoj la Universitato kalkulis ankaŭ Nikolaon Kopernik, kies nomo troviĝas en la libro de tiutempaj studentoj. Nuntempe la Jagiełła (Jagiellona) Universitato kalkulas 5000 studantojn, posedas fakultatojn teologian, juran, medicinan, filozofian kaj agronomian. Ke la Universitato staras sur alta nivelo, pruvas tiaj inventoj kiel la gutigo de la aero (prof. Olszewski).

Krom tiu plej malnova lernejo ekzistas en Kraków Akademio de belaj artoj, kies longjara gvidanto estis Jan Matejko kaj kiu krom la fakultato de pentrarto kaj skulpturo posedas ankaŭ la fakultaton de arĥitekturo. Ankaŭ ekzistas Akademio minejstuda, nepre bezona en lando abunda je karbo, salo kaj petrolo, supera lernejo industria, supera lernejo de arta industrio, profesia lernejo virina por la instruistinoj de objektoj praktikaj, supera komerca lernejo kaj studejo de politikaj sciencoj por kandidatoj en la eks-terlanda servo. Krom la multaj sciencaj societoj, havantaj

la taskon subteni la disvolvon de la scienco en ĉiuj ĝiaj fakoj, ekzistas ankoraŭ en Kraków Pola Scienca Akademio ĝuanta respekton ĉe ĉiuj analogiaj institucioj eksterlandaj. El la societoj, kiuj celas al interrilatoj kun aliaj nacioj, estas menciindaj: la Societo Dante Alighieri, la Societo de Amikoj de Francujo, la Slava Societo, la Akademia Unuiĝo de Amikoj de Ĉeĥoj kaj du Societoj Esperantistaj.


* * *

Kaj nun ni transiru al la artaj restaĵoj.

Krom la konatajn romanajn restaĵojn, al kiuj apartenas la kripto de S-ta Leonardo, kunigita kun la Reĝaj Tomboj kaj la antaŭa parto de la unua katedralo, konstruita tuj post la jaro 1000-a de la reĝo Boleslavo la Brava kaj dekovrita en la jaroj 1918—20 sub la reĝa kastelo, oni trovis en Wawel famajn restaĵojn de neordinare interesa centra preĝejo, pri kiu eĉ ne estas fikseble, ĉu ĝi devenas de antaŭ aŭ de post la jaro 1000-a. La plej multajn kaj plej belegajn monumentojn arĥitekturajn restigis en Kraków la gota stilo, kiu tie ĉi meritas je aparta atento pro tio, ke ĝi kreis stilon tute alian ol en aliaj landoj, kunigante en ia speciala maniero brikon kun ŝtono, kaj aldonante anstataŭ „kontrforsoj“ (arkoj subtenaj) subtenilojn al la internavaj kolonetoj eksterflanke. Tiu ĉi speco disvolviĝis en Kraków dum Kazimiro la Granda kaj poste en la tuta Polujo. En Kraków mem estas tiastile konstruitaj la preĝejoj Katedrala, de S-ta Maria (Marjacki) kaj de Dominikanoj, krom tio en Kazimiro (Kazimierz), la antaŭa aparta urbo, nune kunigita kun Kraków — la preĝejoj de Sankta Katarino kaj de Dia Korpo (Bożego Ciała), ravantaj per siaj simpleco kaj grandiozeco.

* * *

La unua libro estis eldonita en Kraków en la jaro 1465. Kraków estis tiutempe sidejo de belaj artoj, tion pravas la agado de Wit Stwosz, kiu postlasis tie ĉi du siajn plej belegajn verkojn: la gigantan triptikon en la Maria preĝejo (el la jaroj 1477—89) kaj la maŭzoleon de la reĝo Kazimiro Jagiellona en la Wawela katedralo (el la jaro 1492). La agado de Wit Stwosz ne estis post lia morto ĉesigita, ĉar restis multaj liaj lernantoj kun lia filo en la ĉefo, kiuj daŭrigis ĉi laboron en lia spirito. Krom la tre valoran pentrarton karakterizan, oni devas mencii la verkojn de Johano




Kraków

Altaro de Wit Stwosz en preĝejo de S-ta Mario

Sues el Kulmbach en la Maria preĝejo kaj en tiu de Sankta Florjano, poste tiujn de Miĥaelo Lencz el Kitzingen en la kapelo de Montelupi en la Maria preĝejo kaj super ĉio Johanon Dürer, kiu pentris la murojn de la reĝaj palacoj en la kastelo kaj kies verko estas la ekstera flanko de l' triptiko en la Sigismunda kapelo en la Wawel. La interna flanko de tiu triptiko estis farita el arĝento de la Nünbergaj majstroj Miĥaelo Bayer kaj Petro Flötner. Sed ni revenu.


La Katedrala Preĝejo, en kiu kronis sin la polaj reĝoj kaj en kies subteraĵoj ripozas la restaĵoj de tiuj, formas kvazaŭ sorĉitan en ŝtonon historion de la pola nacio ekde la tempoj romanaj ĝis niaj tagoj. Krom la romanaj postrestaĵoj, la gota ĉefparto kaj kelkaj gotaj kapeloj, estis konstruitaj aliaj kapeloj en la stilo de renesanco pure itala aŭ renesanco pola, kiu kreigis laŭ italaj kaj flandraj modeloj.

La Preĝejo de S-ta Mario, kun belega kaj tre vasta internejo, taras neordinare fortan impreson per la pitores-



Kraków

Sarkofago de reĝino Jadwiga en la Katedralo



Kraków

Preĝejo de S-ta Mario kaj Draphalo

keco de la muraj pentraĵoj de Jan Matejko, kiuj estas al-harmoniigitaj al la tri grandiozaj fenestroj kun vitr-pentraĵoj el la fino de XIV kaj XV jc. en la flanka niĉo. La plej bela ornamo de la modesta ekstera flanko estas la du turoj ĉe la randoj de la ĉefeniĝo, unu estas pli malalta kaj pli larĝa, finita per kasko kovrita per lado (tio estas unu el la plej malnovaj de tiu speco, el la tempoj de renesanco en la nordo), kaj la dua pli alta kaj pli maldika, kronita per pinto ankaŭ lade kovrita kaj kunmetita el malgrandaj gotaj turetoj formita sur bazo de nacia konstruado ligna. El la pinto de tiu ĉi turo ĉiuhore gardisto aŭdigas je ĉiuj kvar mondflankoj sur trombono ludsignalon de belega antikva melodio (hejnalo). Se la Katedralo estis la reĝa preĝejo, de la S-ta Maria Preĝejo estis preĝejo de la komercistoj kaj korporacioj krakovaj. Inter la urbanoj, alvenintaj el Germanujo, estis homoj famaj, kiuj atingis la senatorajn rangojn en Polujo, kiel la Boner'oj, la Bethman'oj k. s., same ankaŭ la italaj patricioj, ekloĝintaj en Kraków, la Montelupi'oj kaj Celari'oj, kaj ĉiuj ili postlasis tre multekostajn kaj artajn monumentojn. La Italoj havis eĉ propran kvartalon malantaŭ la Wawel, nomitan Stradone (nune Stradom) kaj apartan kapelon en la preĝejo de la Franciskanoj.

La perlo de la Itala renesanco estas la Sigismunda Kapelo, alkonstruita al katedralo de la reĝo Sigismundo la Maljuna (komencita en 1519), verko de la florenta arkitekturo Bartolomeo Berecci. Krom la belegaj skulptaĵoj, verkoj de Giovanni Cini el Sieno, ornamas ĝian internon la monumento de Sigismundo la Maljuna (verko de Johano Mario Moseo Padovano) kaj tiuj de Sigismondo Aŭgusto kaj Anno (Jagiellonka). Ambaŭ monumentoj estas verkitaj de Santi Gucci el Firenze. Ekstere de la kapelo ravas la okulon de la vizitanto kupolo, kovrita per lado je modelo de karpa skvamo treege dike orumita. Speco de baroka stilo estas tiu de la episkopo Załuski kaj de la empire-o la kapelo de Potocki. Tiu lasta estas verko de Petro Nobile kaj pleje ornamas ĝin pentraĵo de Guercin sur la altaro kaj statuo de Kristo, verko de Thorvaldsen, kiu en tiu sama preĝejo skulptis ankaŭ la monumenton de Vladimiro Potocki, oficiro el la tempoj Napoleonaj. En la mezo de la preĝejo leviĝas sub baldakeno la altaro de S-ta Stanislavo kun



Kraków


Sigismunda Kapelo

argenta sarkofago, skulptita de Petro von der Rennen el Dancigo en la jaro 1671, de la sama majstro, kiu faris la sarkofagon de S-ta Alberto (św. Wojciech) en la Katedralo en Gniezno. Ne malŝatinda ornamo de la preĝejo estas la vitr-pentraĵoj de Josefo Mehoffer, profesoro de la Krakova Akademio de Belartoj, akirinta tutmondan famon dank' al siaj vitr-pentraĵoj en la Friburga Katedralo en Svisujo.

En la subteraĵoj de la Wawel-a katedralo en la reĝaj katakomboj kuŝas la restaĵoj de reĝoj en belegaj sarkofagoj, el kiuj du kupraj barokaj (de la reĝo Vladislavo la IV-a Waza kaj lia edzino Cecilio Renata, filino de Ferdinando la II-a) apartenas al la plej belaj en la mondo metalaj sarkofagoj. En tiuj ĉi sarkofagoj ni rimarkas ĉiujn stilojn ekde la renesanco ĝis la Biedermeiera (la sarkofago de la reĝo Augusto II-a, konstruigita de lia ido la ĉeĥa reĝo Frederiko Aŭgusto en la jaro 1839 a). Inter la reĝoj kuŝas ankaŭ du ĉefoj de la popolo kaj neniel al la reĝoj cedantaj, Tadeo Kościuszko, batalinto kiel por la libereco de



Kraków Sarkofago de Władysław Jagiełło en la Katedralo



Kraków

Tombomumento de Kazimierz
la Granda sur Wawel

Polujo tiel ankaŭ por la libereco de la Unuigitaj Ŝtatoj, kaj la princo Josefo Poniatowski, kavaliro sen timo kaj makulo, kiu forlasis la aŭstrian kortegon — kie kiel filo de la princino Kińska, li povis esperi plej grandajn honorojn — kaj iris batali por la pereanta patrujo sub Leipcigon. En aparta kriptu kuŝas en la Wawel-aj subteraĵoj la korpo de la reĝo de polaj poetoj Adamo Mickiewicz, profesoro de la slavaj literaturoj en Collège de France kiel ankaŭ de la latina literaturo en Lausanne. Estas nun venigita el Parizo ankaŭ la korpo de la dua plej granda pola poeto Julio Słowacki, kiu ankaŭ ekde nun ripozas en la Wawel-o.

La Trezorejo de la Wawel-a preĝejo enhavas neordinare valorajn objektojn, kiel la tri infulojn (episkopaj ĉapoj), el kiuj unu apartenas al la plej malnovaj el la konataj, la dua gota de la episkopo el Strzepin kun renesancaj brodaĵoj el perloj kaj la tria baroka de la episkopo el Leipcigo. Tiuj ĉi infuloj estas konsiderataj kiel la plej karaj kaj plej belaj en la mondo. Mondfama estas ankaŭ la ornato (mes-vestaĵo) farigita de Petro Kmita el Wiśnicz, vojevido krakova. La ornato, kiu devenas de antaŭ 1504-a j. estas ornamita per reliefaj brodaĵoj el la vivo de la S-ta Stanislavo kaj estas siaspeca unikaĵo. Tre arta memoraĵo de neordinara valoreco pro la kvanto de oro kaj karaj ŝtonoj kiel ankaŭ pro sia arteco estas la relikvejo de la kapo de la sama sanktulo, skulptita de la krakova oraĵisto Marcin Marciniec en la j. 1504 kaj akirita dank' al malavareco de la reĝo Johano Olbracht, lia frato la kardinalo Frederiko kaj ilia patrino la reĝino Elizabeto. Donaco de reĝino Jadwiga estas la episkopa „rational“o, distingajo simila al „palus“o portata sur ornato dum solenoj, kun elbrodita aŭtografo de la reĝino, de antaŭ 1400-a j. simila al tiu, kiun uzas la episkopoj en Eichstätt, Paderborn kaj en Toul, kaj tute per perloj brodita. El la papaj donacoj devenas la glavo de Sigismundo Aŭgusto kaj la ora rozo donacita al Mario Jozefino, la edzino de la reĝo Augusto la III-a. El la „regali“oj altiras la atenton la gota krono reĝa, trovita en Sandomiro en la j. 1912-a kune kun fera kasko kaj la kopio de la lanco de S-ta Maŭrico, kiu apartenis al kronadaj insignoj. Ankaŭ nekutime malofta memoraĵo estas la kaliko de S-ta Jadwiga la Silezia, el kristalo, kun la blazono de egiptaj Fatimidoj de la X-a jc., skatoleto el eburo, franca verko de la jaro ĉirkaŭ 1300-a kun surgravuroj el rakontoj roman-

tike kavaliraj simila al tiuj, kiuj troviĝas en la British Museum, en la kolekto de Spitzer en Parizo kaj de Bargello en Florencio. Vera unikaĵo estas la arĝenta skatoleto kun bildo de la kristanaj batalintoj, kun araba surskribo, de la tempoj de la kruc-militoj. El la bildoj de la Trezorejo la plej kara estas la „Plorado je Kristo“, verko de Quentin Metsys kun vidaĵo de Brukselo kaj de la preĝejo de S-ta Gudula en la fono.

La Wawel-a preĝejo enhavas tre grandan nombron da arras-oj muraj de unuarangaj kvalitoj de flandra laboro.

Malofta preĝejo en la mondo posedas tiel belan kolekton da sonorilegoj, kiel la Wawel-a. Per sia grandeco imponas kaj per belegeco de l' profunda sono superas ĉiujn la „Sigismundo“, farita laŭ ordono de Sigismundo I-a en la jaro 1520-a el konkiritaj kanonoj. La sveda societo S. K. F. el Göteborg oferdonis por ĝi kugletajn kuŝejojn, por ke la sonorado estu pli regula kaj iom pli facila, ĉar antaŭe por sonori oni bezonis dekdu fortajn virojn. Per trea grandeco distingiĝas ankaŭ la sonorilegoj „Kardinalo“, farigita en la j. 1455-a de la krakova episkopo Zbigniew Oleśnicki, la „Kapitula“ el la jaro 1460-a kaj „Duonsigismundo“ el la j. 1463-a, el la donacoj de Jan Tenczyński, la krakova kastelano. El la pli malgrandaj estas distinginda la „Nowak“, devenanta ankoraŭ de la XIII-a jc.

Najbare de la Preĝejo troviĝas la Metropolita Muzeo, kolektanta maloftajn memoraĵojn precipe el temploj, por gardi ilin antaŭ difektiĝo.

Nun ni transiru al la reĝa kastelo. Kiel menciite, Kazimiro la Granda konstruigis sur la loko de la ligna ŝtonan kastelon. Poste Jagiełło kaj liaj posteuloj plivastigis ĝin, kaj Sigismundo la I-a komisiis konstruon de nova al la itala arkitekto, kiun la kronikoj nomas Franciscus Stalus, kaj daŭrigis la konstruon aliaj italaj majstroj. La Kastelo disgrandiĝis bele kaj formis siaspecan unikaĵon, originalan pro tio, ke la kolonaro de la dua etaĝo estas multe pli alta ol tiu de la unua kaj tera etaĝoj, tiamaniere ĝi fariĝis malpeza kaj kvazaŭ suprenfluganta, kio aldonas neimageblan ĉarmon. Tiam kortegon ni trovos en nenia kastelo aŭ palaco itala. Tre bela kaj bon-idea estas la kunigo de la formoj gota kun la renesanca en la skulptaĵoj de la fenestroj kaj pordoj. Post la dispartigo de Polujo la Kastelo estis uzata kiel soldataj kazernoj, ĝis la lando fine en la j. 1905-a

decidiĝis elaçeti ĝin kaj komenci la rekonstruon, kiu daŭras ĝis nun kaj ne povas esti rapide finita. Indas tie ĉi citi la grandajn meritojn de la gvidando de rekonstruado d-ro A. Szyszko-Bohusz, la nuna rektoro de la krakova Akademio de bel-arto, kiu ĉiun novan planon pristudas antaŭe ĝisfunde, ĉar nefacila ja estas la afero pro la multnombraj rekonstruoj, korektoj kaj ŝanĝoj. Dum certaj arkitektoj — kiel povas servi malĝoj — ekzemple la kastelo en Marienburgo, la iama sidejo de la majstroj de Kruc-ordeno — forigas ĉiujn postajn alfarojn, kiuj povus atesti pri la historiaj okazintaĵoj kaj anstataŭ ili metas nesukcesintajn imitaĵojn de antikvaĵoj, sed efektive senigas la antikvecan karakteron, aliaj kontraŭe iras tro malproksimen en la memoraĵ-lasado kaj aldonas tiamaniere al la konstruaĵoj aspekton de pitoreskaj ruinoj, kvazaŭ ne por la vivantoj, sed por la mortintoj ili devus servi. Wawel ne ĉesos esti viva atestanto de la pasinteco, ne ĉesos instruadi nin pri la vivo de tiuj, kiuj loĝis en ĝi kaj agis, sed ne faros impreson de forgesita solecejo. Marienburgo estas plenigita per mebloj, imitantaj la antikvajn, en Wawel la instalaĵoj estos tute aŭtentikaj. La modestajn ŝparaĵojn oni elspezas por aĉeti memoraĵajn meblojn, kaj sufiĉe ofte noblaj oferantoj donas multekostajn objektojn, tiel do ankoraŭ en tiu ĉi jaro estos plene aranĝitaj kelkaj ĉambroj. Plej grandaj iliaj ornamoj, krom la mur-pentraĵoj estos la grandiozaj „arras“oj, farigitaj de Sigismundo Aŭgusto en la jaroj 1553—1564, kies nombro, antaŭe 156, nun pligrandiĝis per la revenigitaj 91 el Rusujo. Post la okupo de Varŝavo la Rusoj ilin forveturigis kaj dispendigis en la cara kortego en Gatĉino. Konforme kun la pac-traktato en Rigo la Sovjeta registaro redonis ilin kune kun ĉiuj memoraĵoj, forprenitaj siatempe de la Rusoj post la dispartigo de Polujo. 17 el ili estas de preskaŭ 5 metroj altaj kaj 10 metroj larĝaj kaj prezentas biblian enhavon, la ceteraj estas dekoraci-enhavaj, plejparte ornamitaj per blazonoj kaj monogramoj de la reĝo. La arrasoj estas faritaj en la teksejoj en Brukselo kaj la katunoj estas plej certe donoj de M. Coxcyen kaj Piter Koecke van Aelst. Tiu ĉi arras-kolekto apartenas al la plej riĉaj same kiel la kolekto de la hispana reĝo, de la Viena kortego, florenca kaj vatikana. Unu arraso, la plej malnova, de la XV-a jc., devenas el la laborejo de Pasquier Grenier en Tournei kaj prezentas la legendon pri kavaliro kaj cigno, tra kies bildoj


Kraków
Katedralo kaj kastelo sur Wawel

oni ekkonas Karlon X Kuraĝan la Burgundan kaj Filipon Bonan kiel lian patron Orienton.

En la reĝa kastelo kelkaj salonoj estas jam baldaŭ finotaj. La plej rimarkinda estas la granda salono parlamenta (sejma) kun plafono el platoj, en kiujn estis enmetitaj diversaj karakterizaj kapoj, el kiuj 30, siatempe de la Rusoj forveturigitaj, nun estas revenigitaj. En la lokon de la mankantaj estos enmetitaj novaj tute ne penantaj imiti la malnovajn.


Ne malproksime de Wawel, je la flanko de la bazaro, leviĝas la preĝejo de S-ta Andreo kun du romanaj turoj. Kiam en la jaro 1241-a la Tataroj bruligis la tiam ankoraŭ lignan Krakovon kaj ĉiujn loĝantojn forbuĉis, la staranta inter la urbo kaj kastelo antaŭurbo, konstruita ĉirkaŭ tiu ĉi preĝejo, sukcesis sin defendi.

El inter la gotaj preĝejoj, krom la jam menciitaj meritas la atenton la preĝejo de la S-ta Kruco, kies arkaĵoj apogiĝas je la muroj kaj je unu kolono enmeza kaj tiamaniere formiĝas belega palma imitaĵo. Palman arkaĵon havas ankaŭ la Hungara Kapelo en la preĝejo de S-ta Katarino kaj la malnova Sinagogo en Kazimiro (Kazmierz) konstruita en la j. 1407-a kaj refarita ĉirkaŭ la j. 1570-a. La unua apogiĝas je unu kolono kaj la dua, t. e. la Sinagogo — je kvar.

Tuj apud la menciita preĝejo de S-ta Andreo staras la preĝejo de S-ta Petro kaj Paŭlo, fondita de la reĝo Sigismundo III-a por la Jezuitoj, konstruita en la j. 1597—1635 de italaj arĥitekturistoj. Ĝi tute similas la preĝejon Al Gesŭ en Romo kaj estas kovrita per la plej granda en Polujo kupolo. Same la eksteraĵo kiel la internaĵo imponas per la neordinaraj dimensioj.

Belega ekzemplo de la pli malfrua itala baroko estas la preĝejo de S-ta Anno, kies belegajn stuk-ornamantojn verkis la eminenta Baltazaro Fontana el Como. Liaj verkoj troviĝas en ankoraŭ kelkaj lokoj de Kraków.


Vidante tiom multe da fremdaj majstroj en Kraków, oni povus pensi, ke ni ne havis proprajn artistojn. Efektive ja tiel ne estas. D-ro F. Kopera en sia antaŭ nelonge eldonita historio de la pentr-arto en Polujo citas tre multe da miniaturistoj el la mezepoko, kies antaŭnomoj same kiel familiaj nomoj pravas la pure polan devenon (kiel: Stanisław z Mogiły). Ekzistis ankaŭ korporacia pentr-



Kraków

Skalka

arto en Kraków, kiu distingiĝis per granda sendependeco, sed la nomoj de tiuj majstroj ne estas al ni konataj. Prof. J. Mycielski pruvis nun la artistan valoron de la pentristo Jan Polak, kiu postlasis en Kraków treege originalajn artbildojn el la jaroj 1465—1475. Poste en la jaroj 1475—1519 tiu artisto laboris en Bavarujo. Nun liaj verkoj troviĝas en Nationalmuseum kaj en Alta Pinakoteko en Munĥeno, kaj krom tio en Pulle apud tiu urbo. Eminentaj pentristoj krakovaj estis en la XVII-a jc.: la patro Fr. Lexycki kaj Trzycki (nomina latine Tritius), en la XVIII-a jc. Czechowicz k. t. p. En la XVI-a jc. ni havis famajn arĥitekturistojn, Gabrielon Słoński kaj lian lernanton Jan Michałowicz el Urzędowo, kiuj verkadis ambaŭ en la stilo de renesanco. Tamen ili ne estis simplaj imitantoj de la eksterlando, nur evidentigis grandan memstarecon en la ideoj. Ekde la duono de la XIX-a jc. la Krakova pentrarto leviĝadis ĝis la apogeo. Sufiĉas citi Jan Matejko, la reproduktinton de la historio de la iama granda sed tragedia Polujo, kaj Julion (Juljusz) Kossak, kiu la historion de la iama Polujo reprezentis en heroaj agoj kaj interna vivo. La plejado de la artistoj, ĉu pentristoj, ĉu skulptistoj, ariĝintaj en la Aka-



Kraków

Draphaloj

demio de Belartoj, aŭ verkintaj memstare, estis kaj estas tiel granda, ke nomi ilin ne estas eble. Unu tamen estu speciale citita, Stanisław Wyspiański, poeto kaj pentristo, kies abstraktaj vitr-pentraĵoj en la preĝejo de la Franciskanoj, elvokas admiron ĉe la plej famaj eksterlandaj specialistoj. Kiel drampoeto postlasis Wyspiański plej originalajn kaj senmortajn verkojn, kiel: La Novembra Nokto (Noc Listopadowa), Akropolis, La Edziĝo-festo (Wesele) k. t. p.

Aliaj vizitindaĵoj. Restas ankoraŭ por viziti kelkajn civilajn (nereligiajn) konstruaĵojn. Meze de la granda urboplaco leviĝas alta turo gotika, restinta post la iama urbo-domo. Krom tio la draphaloj (pole: Sukiennice), konstruaĵo gota, poste alornamita per „atiko“ de la konata al ni skulptisto Johano Mario Padovano, poste ankoraŭ plilarĝigita kaj nun prezentas neordinare pitoreskan tutaĵon, same interesan kiel la malnova gota konstruaĵo de la universitato, kiu servas nun kiel biblioteko Jagiellona, distinganta per sia belega internejo.

Kraków kiel decas al kultura kaj artista urbo, posedas vicon da riĉaj muzeoj. La plej granda estas la Nacia Muzeo, sur la etaĝo en Sukiennice (la Draphaloj), kiu

atendas sian novan loĝejon por povi plene disekspozicii siajn riĉegajn kolektojn de pentraĵoj kaj skulptaĵoj de malnovaj, nuntempaj kaj de ĉiuj branĉoj de la arta industrio. Filioj de la Nacia Muzeo estaj Muzeo de Czapski, la Domo de Jan Matejko, la Muzeo de Felikso Jasieński kaj la Muzeo de Erazmo Barącz. La Muzeo de Czapski enhavas treege riĉan kabineton numismatikan (de malnovaj moneroj), en kiu troviĝas ĉirkaŭ 260.000 moneroj kaj medaloj polaj kaj alilandaj, kolekto de ordenoj, insignoj kaj sigeloj, kabineto de gravuraĵoj, kalkulanta ĉirkaŭ 70.000 unuarangajn specimenojn kaj bibliotekon riĉan je inkunabuloj (la unuaj presitaj libroj) kaj manuskriptoj. La domo de Jan Matejko gardas memoraĵojn post tiu ĉi majstro, liajn kolektojn, de kiuj li mem kiel pure historia pentristo profitadis, diversajn skizojn fervore de li kolektitajn dum tuta lia vivo k. t. p. — La Muzeo de Feliks Jasieński, gvidata ĝis nun de tiu ĉi grandega kritikisto kaj artscienculo, entenas ĉiujn branĉojn de la malnova kaj nova arto. Plej multnombraj tamen estas la japanaj gravuroj, kiuj atingas ĝis 4.000 specoj, inter kiuj decas distingi la plej grandan en la mondo — Japanujo enkomprenita —




Kraków

Monumento de Władysław Jagiełło

kolekton de la majstro Chiro-Szige. Japanoj, vizitantaj tiun ĉi muzeon, asertas, ke ili sentas sin kiel hejme en sia patrujo. Rimarkinda estas ankaŭ la kolekto de polaj zonoj, aparteninta al la heredantoj de grafo Andreo Potocki. En tiu ĉi branĉo la pola teks-arto atingis la plej altajn rezultatojn. — La Muzeo de Inĝ. Erazmo Barącz estis kreita ankaŭ dank' al la pledoj de tiu ĉi art-kaj antikvaĵ-amanto kaj famiĝis pro la kolekto de la orientaj orsilkaĵoj (kovriloj, kurtenoj k. t. p.).

La Muzeo de princoj Czartoryski malgraŭ sia tro malvasta ejo enhavas objektojn de monda fameco. Sufiĉas citi el la art-pentraĵoj la portreton de Cecilino Galarani el Milano — verko de Leonardo da Vinci, la portreton de viro — verko de Rafaelo, la Dipatrinon kun infano de Cima da Conegliano, la Mizerikordan Samaritanon de Rembrandt, du portretoj virinaj de Van Dyck, dek miniaturnaj portretoj de Sigismundo I kaj lia familio — verkoj de Luko Cranach kaj multajn aliajn pentraĵojn de unuarangaj artistoj de diversaj nacioj. Ne malpli fama estas tiu ĉi muzeo pro siaj neordinaraj specoj de polaj armiloj, ĉevaljungaĵoj, memoraj oraĵoj, emajlaĵoj el Limoges, vestaĵoj, teksaĵoj, standardoj el sub Lepanto k. t. p. Ne mankas ankaŭ memoraĵoj egiptaj, ĥaldeaj, assiraj, siriaj, grekaj, etrusiaj, romaj, krom tio antikvaj vitraĵoj kaj saraceniaj kaheloj, kaj super ĉio kristanaj kaj bizantiaj objektoj antikvaj. El la libroj kun miniaturoj unuan lokon okupas la Codex aureus Pulaviensis de ĉirkaŭ 1100-a j., skribita per oraj literoj kun multaj miniaturoj kaj ornamoj, la malnovslava Evangelio de Aprakos de ĉirkaŭ 1300-a j. kaj luksege ornamita Pontifikato de la Płocka episkopo Erazmo Ciołek kun ilustraĵoj de Johano Carpentarius — verko el la unuaj jaroj de la XVI-a jc. La Biblioteko konsistas el preskaŭ 130 mil volumoj, inter kiuj — polaj presaĵoj el la XVI-a jc. estas 2500. La Arhivo enhavas 1300 diplomojn kaj 6000 manuskriptojn, inter kiuj multegaj specoj de diversaj skribaĵoj orientaj, armenaj, kartvelaj k. t. p.

La Jagiellona Biblioteko, apartenanta al la Universitato, kalkulas pli ol 450.000 volumojn, 3.000 inkunabulojn (atingantajn la j. 1460), kaj 9.000 manuskriptojn, el kiuj la plej malnova estas subskribita de Walafrido Strabo. El la miniaturnaj libroj distingiĝas la Codex picturatus de Baltazaro Behem kun miniaturnaj ilustraĵoj de la jam al ni



Kraków

Korto de Universitata Biblioteko
kun statuo de Kopernik

konata Johano Carpentarius. El la bindoj (libraj) la plej interesa estas tiu brodumita per perloj bindo de la reĝino Anno Jagiellidino (Anna Jagiellonka).

La Universitato posedas riĉan Muzeon de arĥeologio kaj arthistorio. Ĝi entenas ĉiujn memoraĵojn ekde la prahistoriaj ĝis la plej modernaj.

La kolektoj de la Pola Scienca Akademio entenas krom la bibliotekon ankaŭ arĥivon, memoraĵojn prahistoriajn kaj natursciencajn.

La Urba Muzeo posedas multvaloran kolekton de dokumentoj, koncernantaj la urbon Krakovon kiel ankaŭ grandan bibliotekon de simila enhavo.

La Urba Industri-Muzeo, fondita de D-ro Adriano Baraniecki, havas kiel taskon servi per modeloj al metiistoj precipe al tiuj, kiuj okupiĝas pri la art-industrio. Tial, kontraŭe al ĉiuj aliaj muzeoj, la tuto estas dividita je grupoj laŭ la materialo. Treege riĉa estas la fako de porcelano, fajenco kaj vitro, kie oni povas vidi karajn specojn

de ne nur eksterlandaj, sed ankaŭ de multnombraj polaj fabrikejoj. En la fako de teksaĵoj meritas specialan atenton la „kilimoj“ kaj tapiŝoj, teksitaj en Polujo, kaj distingigantaj per granda originaleco. Precipe la gobeleno el la fabrikejo de Radziwiłł en Korelicze, prezentanta la venkon de la litova hetmano Januŝo (Janusz) Radziwiłł sub Łojów, poste la polaj zonoj kaj — el vestaĵoj — la kolekto de kostumoj albanaj kaj turkaj. Riĉega ankaŭ estas la popola fako, precipe la artaj eltranĉaĵoj el koloraj paperoj kaj la pentraĵoj sur vitro.

La Etnografia Muzeo, kreita dank' al la nuna gvidanto Severino Udziela, entenas la fakon de la primitivaj popoloj, teksado, piaj kaj moraj objektoj, hejmaj kaj mastrumaj mebloj, modeloj de popola ligno-konstruado, tapiŝoj, brodaĵoj, eltranĉaĵoj kaj fine kompletaj vestaĵoj. Indas aldoni, ke en multaj regionoj de Polujo konserviĝis ankoraŭ la popolaj kostumoj kaj la popola arto apartenas al la plej riĉa en Eŭropo.

La nombro de la sport-unuiĝoj en Polujo kaj la distingigo de tiuj dum vet-bataloj pravas, ke la sporto en Krakovo disvolviĝas. La Vistulo ebligas la disvolvon de la remkaj naĝo-scioj. La gimnastika societo „Sokół“ havas grandajn meritojn sur la kampo de eduko de la junularo kaj ekzerciĝoj por pli maljunaj. La Parko de D-ro Jordan, profesoro de la Jagiellona Universitato, en kiu la junularo fordonas sin al la movadaj ludoj en la plena aero, estas la unua el tiuspecaj en la mondo.

En la ĉirkaŭaĵoj de Kraków la amantoj de prahistoriaj antikvaĵoj povas admiri la tombajn montetojn de Krakus kaj Wanda. Post la enterigo de la korpo de la heroo de l' bataloj por la libereco de Polujo kaj Ameriko, Tadeo (Tadeusz) Kościuszko en la subteraĵoj de la Wawela Preĝejo, anstataŭ meti al tiu ĉi meritulo laŭkutiman monumenton oni ŝut-levigis al li tomban monteton pli altan ankoraŭ ol al la laŭ-legenda fondinto de Krakovo Krakus kaj al Wanda, pri kiu diras la famo, ke por la bono de sia popolo ŝi, ne volante al fremda duko fordoni kune kun sia mano ankaŭ la landon, ĵetis sin en la ondojn de Vistulo.

Inter la monaĥejoj, kiujn Bolesław la Kuraĝa fondis por disvastigi la klerecon en la ĵus kristaniĝinta Polujo, speciale distingiĝas kiel plej granda la Benediktana Abatejo en **Tyniec**, apud Kraków, pri kiu mencias Henryk Sien-



Wieliczka

Kapelo de S-ta Antono en salminejo

kiewicz en la „Krucanoj“, de kiu krom la poste rekonstruita preĝejo restis grandiozaj ruinoj monaĥejaĵ, kiuj pitoreske elstaras sur kruta roko apud la Vistulo. Iom pli proksime de Kraków, meze de belega arbaro, sur monteto apud la Vistulo, staras eremita monaĥejo kaj preĝejo de Kamululoj (Camaldoli en Italujo), konstruita en **Bielany** en la jaroj 1617 – 1630 de Nikolao Wolski, la krona marŝalo. Ĝis nun tiu konstruaĵo estas loĝata de ordenanoj kaj ornamita per verkoj de italaj kaj polaj artistoj.


Je mejlo fore de Krakovo, ankaŭ apud la Vistulo, apud la tombo de Wanda, staras la Preĝejo kaj Monaĥejo de Cystersoj, fondita de la potenca kaj eminenta Krakova episkopo Ivo Odrowąż en la j. 1221, konstruita laŭ stilo romana kaj plilarĝigita en la tempoj de gotiko kaj baroko. Belegaj estas la balkonetoj got-stilaj. Ĝis nun tiu ĉi monaĥejo apartenas al la Cysters'oj. La paroĥa preĝejo en la sama vilaĝo estas antikva konstruaĵo ligna kaj prezentas interesan specimenon de ligna preĝej-konstruado, iam tre en Polujo disvastigita kaj kies ekzemploj ĉe ni ne apartenas al maloftaĵoj. En la lastaj jaroj turnis la atenton de la mondo je la polaj lignaj preĝejoj la fama profesoro de historio de l' arto de la Viena universitato, d-ro Jozef Strzygowski, kiu mem devenas de Bielsko apud Cieszyn, kie tiuspecaj memoraĵoj lignaj ne apartenas al esceptoj.

Kaj nun iom pri la Krakova min-industrio.

Grandan famon ĝuas la sal-minejoj en **Wieliczka** apud Krakovo la plej grandaj kaj unuj el plej malnovaj en la mondo, ĉar jam en la XI-a jc. konataj. Ĉiu vizitanto de Kraków nepre ilin vizitas. En la minejo ekzistas sep etaĝoj, atingantaj 280 m. profunden, pli grandaj kameroj estas sepdek, la plej granda havas 48 m. da alteco, la longeco de la koridoroj superas 600 kilometrojn. La plej granda el la subteraj lagetoj havas 250 m. da longeco. La atenton de la vizitantoj alforĝas la kapelo de S-ta Antonio, tuta kune kun la altaro kaj statuoj, elkavigita en la XVII-a jc. en salo, kaj la granda nova kapelo, en kiu povas oportune lokiĝi pli ol 1000 personoj kaj tamen la tuta arkaĵo estas elkavigita en salo sen iaj subteniloj.

Iom malpli grandaj ol la Wieliczka-aj estas la sal-minejoj en Bochnia, je kvin mejloj de Kraków.

La salaj minejoj etendiĝas je la sud-oriento de Krakovo. Je la okcidento, jam ekde je 3½ mejloj situigita **Tenczynek** komenciĝas la karb-minejoj, da kiuj en la Krakova vojevodio ekzistas kelkaj. La kvalito de tiu karbo estas malplibona ol la Silezia kaj la elriĉevo pli kara pro la malabundaj tavoloj, tial tiuj ĉi minejoj eĉ je eta parto ne povus sufiĉi por Polujo. Ne pli ol je 1 mejlo de la nordo de Tenczynek troviĝas minejoj de la fama nigra marmoro, kiu pro sia profunda koloro estis tre ŝatata precipe en la periodo de la baroko, kaj tial eĉ por la barokaj skulptaĵoj en la preĝejo de S-ta Stefano en Vieno estis de tie veni-



Ojców

Pejzaĝa motivo



Ojców

Sfinkso


gita marmoro. Nenio tial miriga, ke en la preĝejoj de Krakovo kaj ĉirkaŭaĵoj estas tiom multe da barokaj ornamaĵoj el nigra marmoro...

Nemalproksime, en Miękinia troviĝas porfiro, bonega materialo por sterni la stratojn. Sufiĉe ofte oni uzas tiun ĉi porfiron por arkitektaj ornamaĵoj.

El la bonoj, kiujn la riĉa Krakova tero donacas al siaj loĝantoj, menciindaj estas la sulfur-kuracaj fontoj en Krakovo mem, en la regiono Podgórze, iom pli malproksime en **Swoszowice** kaj en **Krzeszowice**, inter Tenczynek kaj Czerna.

Amantoj de malnovaj ruinoj en la ĉirkaŭaĵoj de Kraków povas viziti la ruinojn de kasteloj en **Ojców** en belega valo plena da rokoj kaj grotoj, en Tenczyn, Lanc-korona, Wiśnicz, k. t. p. Loĝataj ĝis nun kasteloj restis en **Pieskowa Skala** (Hundeta Roko) apud Ojców kaj en **Dębno** apud Bochnia.

El tiu ĉi malgranda konspekto estas evidente, ke kiu ajn venos Krakovon kaj en ĝiajn proksimajn aŭ malproksimajn ĉirkaŭaĵojn, ĉu li estos scienculo, ĉu industriisto, sportulo aŭ homo deziranta plifortigi sian sanon, trovos tie ĉi por si objektojn ŝatindajn, la naturon, industrion kaj memoraĵojn de kulturo kaj arto. Kaj la multnombraj Krakovaj ler-



Pieskowa Skala apud Ojców


nejoj kaj kolektoj pruvas, ke ĉi kulturo atingas tre malproksimajn tempojn kaj profunde en la popolon engravuriĝis.

Dum hela tago delogas iafe de malproksime, precipe se oni staras sur la tomba monteto de Kościuszko la pintoj de Tatroj, sude de Krakovo, kvazaŭ ia fantazia aperaĵo. Ni iru tien.

3. ZAKOPANE KAJ TATROJ

Suda limo de Pollando estas montaro **Karpaty**, kiu en diversaj siaj partoj havas malsamajn aspektojn. Ĝi konsistas el sabloŝtonaj rokoj, krom montaro Pieniny, kiu estas kalkŝtona.

Plej alta kaj plej vidinda parto de Karpatoj, estas granita montaro **Tatry**. Kiu nur unufoje vidis la majestatan montaron, tiu ofte vidos ĝin per okuloj de sia imago; kiu vintre staris dum ski-ekskurso sur kovrita de neĝo monto, kaj



Tatroj

Montopinto Świnica

povis admiri senlimajn amasojn da brilantaj neĝo-kampoj, tiu neniam la bildon forgesos. Eĉ tiuj turistoj, kiuj konas Alpojn, konsentas, ke Tatroj havas pli romantikan belon.

Dumvoje ni vidas belan montaran regionon, karakterizantan per arbaroj kaj paŝtejoj. Tio estas altaĵo **Podhale** (ĉirkaŭ 700 m supermara alteco). Ĉi-tie loĝas polaj montanoj, kiuj konservis apartajn kutimojn, dialekton, vestaĵojn kaj specialan Tatran stilon en ligna konstruaro.

Ĉefa urbo de Tatroj estas **Zakopane**, turista vintra kaj somera rezidejo de Pollando. La malgranda urbeto, kalkulanta 10.000 konstantajn loĝantojn, havas multe da tute bonaj kaj komfortaj hoteloj kaj pensionoj. Vidindaj estas ĉi-tie Tatra Muzeo de Dro Chałubiński, industria lernejo, kaj domo de Pola Tatra Societo, konstruita en pure tatra stilo. Tiu societo havas konstantan informojn por turistoj kaj vizitantoj (strato Krupówki 14).



Tatroj

Montopintoj Lodowy, Łomnica, Widły

Sur ĉefplaco estas vidinda monumento de Władysław Jagiełło, pola reĝo, kiu kunigis Polujon kun Litovujo, kaj monumento de Dro Chałubiński (ĉe str. de Chałubiński), kiu unua atentigis la Polojn je Tatroj.

Ekskursoj. Plej proksima montpinto estas Giewont (1900 m) tre facile atingebla de la suda flanko. De ĝi etendiĝas antaŭ niaj okuloj norden pitoreska pejzaĝo kun Zakopane malsupre. Aliflanke estas videblaj nudaj montaroj, kovritaj de eterna neĝo. Malsuprenirinte de okcidenta flanko (malfacila vojo) ni trovas belan fonteton Siklawica, kaj pli malsupre valon Strążyska (legu: Stronjiska) ne tre belan.

Vizitinda ankaŭ estas romantika valo Kościeliska, per aŭtomobilo aŭ ĉevalveturilo.

Lokon, kiun devas viziti ĉiu turisto estas belega, mondkonata „Morskie Oko“ (Mara Okulo), lago kuŝanta inter tre pitoreskaj montoj. Estas du vojoj: aŭ per aŭtomobilo (1½ h) aŭ per veturilo (3½ h) aŭ fine piede. La danĝera pieda vojo rekompencas nin per belegaj vidindaĵoj. Do dum-

voje ni renkontas valon Hala Gąsienicowa, lagon Czarny Staw Gąsienicowy (legu: Čarny Stav Gonsjenicovi, 1620 m), montan trairejon Zawrat (2160 m), valon de Kvin lagoj, kaj plej grandan tattran akvofalon Siklawica.

Se oni havas turistajn vestaĵojn (ŝuojn!) oni povas de Hala Gąsienicowa viziti la plej belan monton de polaj Tatroj Świnica (2.300 m). La ekskurso daŭras de Hala ok horojn. El aliaj montpintoj rekomendinda estas Czerwone Wierchy (legu: Červone Vjerhi) 2.130 m, vojo facila, Rysy (legu: Risi), vojo malfacila 2.500 m.

Post Tatroj oni ĉiam vizitas kalkŝtonan montaron **Pieniny**. Vojaĝante per boato sur monta rivero Dunajec, ni trairas la pitoreskan parton, nomatan „Pola Svisujo“. En kelkaj lokoj apud Dunajec, etendiĝas supren ambaŭflanke 400—500 metraj muroj el roko. Plej alta montpinto de Pieniny estas Trzy Korony (legu: Tji Koroni) 987 m.

Ĉi tie estas unu el la plej grandaj ban- kaj kuraĉlokoj, **Szczawnica** (legu: Ščavnic) kun diversaj mineralaj fontoj, sanigaj precipe por brustaj malsanuloj. Estas ĉi-tie hoteloj kaj kelkdek pensionoj.

Ĉapitro VI


Ekskurso al Lwów

1. DE WARSZAWA TRA LUBLIN AL LWÓW

Apud Warszawa ni renkontas survoje multajn vilaojn, kiuj donas al la ĉirkaŭaĵo specialan karakteron. La ĉirkaŭaĵo nomata Mazovio estas ebena, kovrita per sablo.

Poste ni renkontas jam priskribitan **Deblin**, sekve **Puławy** kun estinta palaco de princo de Czartoryski, hodiaŭa sidejo de agronomia instituto. Poste venas Nałęczów (legu: Naŭenĉuv), konata kuraĉloko, havanta tute bonajn hotelojn, pensionojn kaj vilaojn.

Sude ni lasas urbon **Kazimierz** (legu: Kaĵimjeĵ) el X jc. Ĉi tie estas vidinda ruino de kastelo kaj grandegaj grenejoj, kiuj estis ĉefpunkto por greno, iranta al Gdańsk. Poste ni venas al **Lublin**, kiu estas unu el la plej grandaj urboj de Pollando, havanta hodiaŭ 100.000 loĝantojn. La urbo estas fama en la historio pro subskribo de ambaŭflanka konsento inter Pollando kaj Litovujo en 1569 jaro. Reĝo Stefan Ba-



Pieniny-montaro

Rivero Dunajec

tory igis Lublin tribunala urbo. El vidindaĵoj oni devas citi ŝtonkastelon, katolikan preĝejon kun unika en Pollando „akustika salono“, monumenton de Pol-Litova Unuiĝo kaj antikvajn pordegojn en mezo de la urbo.

Hodiaŭa Lublin estas vojevodio kaj Universitata urbo.

Sekve iras **Jaroslław**, 30 000 loĝantoj, iam konata urbo pro mondfamaj foiroj kaj **Przemysł** (legu: Pĵemisjl) 60.000-a loĝantaro; ĉi tie dum la mondmilito estis kruelaj bataloj, ĉar la urbo estas bona fortikaĵo. Ĝi estis konstruita en X jc.

Sekve ni venas en ĉirkaŭaĵon, kies tero estas saturita de sango dum pol-ukrainaj bataloj kaj jen Lwów.

2. DE ZAKOPANE AL LWÓW

De Zakopane al Lwów ni veturas sur fervoja linio iranta ĉe piedoj de Karpatoj. La vidaĵo el la vagona fenestro es'as tre bela, montara.


Unu horon poste ni renkontas survoje urbon **Chabówka**, de kie la fervojo iras laŭlonge de rivero Raba, donanta al la vojaĝanto belan vidaĵon de intermonta rivera valo tie ĉi kaj tie surkreskita de pina arbaro. Sekve la fervojo tranĉas montaron **Beskidy**, kies tiu parto nomiĝas Gorcse. El ĝiaj pintoj estas videbla pitoreska pejzaĝo de Podhale kaj Tatroj.

Post Chabówka ni preterpasas **Rabka**, granda kurac-kaj banloko kun jodo-broma akvo. La loko estas bone loĝebla, havas multajn vilaojn kaj hotelojn.

Sekve ni renkontas negrandan distriktan urbeton **Limanowa**, kiu memoras bone la Eŭropan militon, ĉar ĉi tie oni kruele batalis kaj ĉi tie estis malvenko de l' rusa armeo. Restis nur granda monumento, memoriganta la sangajn tagojn. De Limanova laŭlonge de Karpatoj troviĝas minejoj de petrolo. Ĝia ekspluatado komenciĝis en XIX jarcento tre primitive, sed nun la tekniko estas en bona stato. Plej multe da petrolo estas elterigata ĉirkaŭ urbo **Boryslaw**. Dum unu jaro oni ĉerpas ĉirkaŭ 700.000 tunojn da petrolo, sed tiu nombro ĉiam kreskas.

Sekve ni veturas en valo de rivero Dunajec al urbo **Nowy Sącz** (30.000 loĝantoj), kiu estas grava komerca urbo kaj fervoja centro.

Survoje ni renkontas kelkajn malpli gravajn lokojn, sekve



Boryslaw

Minejo de petrolo

urbojn **Jasło**, **Krosno** kaj du ban- kaj kuraclokojn **Iwonicz** kaj **Rymanów**.

Sanok estas distrikta urbo, havanta fabrikejon de fervojaj vagonoj, iom dum la milito detruita. El la vidindaĵoj restis kastelo de polaj dukoj kaj preĝejo de Franciskanoj.

De tie la fervojo iras en pitoreska valo de rivero San.

Sekve ni traveturas urbojn **Chyrów** kaj **Sambor**, iom pli granda distrikta urbo kun 20.000-a loĝantaro kaj fervoja centro.

Fine ni venas al Lwów.

3. DE KRAKÓW AL LWÓW

Survoje ni renkontas konatan minejon en **Bochnia**, kiu produktas salon sed pli malmulte ol Wieliczka. La minejo bone teknike aranĝita estas tre vidinda.

Sekve ni renkontas urbojn distriktajn **Tarnów** kaj **Rzeszów**, kiuj havas komercan signifon, estante en ĉirkaŭaĵo de la petrolo regiono.

Post unu horo ni atingas urbon **Przemysł**, kiu estis bona fortikaĵo kaj apud kiu okazis granda batalo inter aŭs-

tria kaj rusa armeoj. La tero plenigita de sango, la multaj postmilitaj krucoj, bone rememoras la terurajn tagojn.

Post Przemyśl ni renkontas urbon **Gródek Jagielloński** kaj fine atingas Lwów.

4. LWÓW

Ĉefurbo de vojevodia distrikto. Loĝantaro 250.000.

Historio de Lwów La urbo estis fondita ĉirkaŭ j. 1250 de princo de Przemyśl Lew, kiu poste ĝin faris sia rezidenco. Ĉe piedo de konstruita kastelo komenciĝis kolonizado de loĝantaro, unue rutena, poste germana, hebrea, tatara kaj armena.

Vera ekfloro de Lwów komenciĝis nur post transiro de la urbo sub polan regadon dum Kazimiro la Granda en j. 1349. En tiu tempo Lwów havis plejparte germanan karakteron. Kazimiro la Granda donis al la urbo vastan aŭtonomion laŭ magdeburga leĝo, donante al aliaj nacioj liberecon de ĉiuj konfeso. Ne estas do mirinde, ke pro tiaspecaj aranĝoj dum tempo, kiam en aliaj ŝtatoj regis subpremoj kaj persekutadoj, la urbo rapide kreskis kaj alfluadis ĝin multe da fremdaj nacioj, konservantaj tie siajn tradiciajn leĝojn kaj kutimojn. Ni do renkontas ĉi tie: Saracenojn, Hebreojn, Armenojn, Persojn, Anglojn, Tatarojn kaj Germanojn. Lwów havis — laŭ tiama tempo — tre oportunan komercan situon. Tuta orienta komerco al Pollando, Danzig kaj okcidento, trairis al Lwów. Al konataj — preskaŭ en tuta Eŭropo — foiroj de Lwów rapidis komercistoj el Persujo, Turkujo kaj Arabio, kaj Republiko Veneta havis dum mezepoko siajn agentojn en Lwów.

Kun XVIII-a jarcento komenciĝis la falado de Lwów. Ŝajnis, ke post ĉeso de bataloj kun Tataroj kaj Turkoj, Lwów povos pli libere ekspiri, sed bedaŭrinde la sveda reĝo Karlo XII, kiu per armiloj subtenante la vojevodon de Poznań, Stanislavon Leszczyński, kandidaton por pola troŝo, kaŭzis longan militon, kiu finiĝis per almlito de Lwów kaj ĝia granda malvenko. Tiu malvenko estis tro granda por Lwów, por ke ĝi povu ĝin eksuferi, ne perdante la aŭtoritaton kaj bonstaton. La komerco, kiu antaŭe tiel floris, ekfalas kaj serĉis novajn vojojn, la urbo perdis multe da loĝantaro.



Lwów

Kapelo de Boimoj

Dum unua dispartigo de Pollando en 1772 venis Lwów sub aŭstrian regadon. La malnovan liberan urbon de Pola Respubliko oni ŝanĝis je ĉefurbo de aŭstria provinco. Anstataŭ la malnovaj privilegiaj aranĝoj ekkomencis nova formo de administrado, enkondukita de imperiestro Jozefo II en 1784. Oni kasaciis 28 monaĥejojn kaj preĝejojn, kaj iliajn ejojn oni destinis por publikaj kaj ŝtataj celoj. Pli viglan ekintereson kaŭzis poste la movado, antaŭiganta la okazintaĵojn de j. 1846, finita tamen per aligo de Krakova Respubliko al aŭstria monarĥio.

Lwów pli libere ekspiris nur kun momento de enkonduko de la nova urba statuto, bazanta je principoj de komunuma aŭtonomio (la 14. X. 1870). De tiam komenciĝis ankaŭ konstanta kaj rapida kresko de Lwów, kiu jam hodiaŭ, post akiro de sendependeco, kuraĝe povas ekstari en vico de pli gravaj eŭropaj urboj.

La nombro de loĝantaro de tiu tempo ĉiam kreskas, la stratoj kaj placoj estas plejparte reguligitaj, en urbocentro amaso da vere grandurbaj, belaj konstruaĵoj publikaj kaj privataj, belaj ĝardenoj, riĉaj bibliotekoj, muzeoj kaj artgalerioj, teatroj kaj koncertsalonoj.

Lwów estas sidejo de tri ĉefepiskopoj (rom.-kat., grek.-kat. kaj armen.-kat.), posedas en siaj muroj universitaton, politeknikan altlernejon, veterinaran akademion, komercan akademion, arbaran altlernejon, multajn gimnaziojn kaj realgimnaziojn, muzikkonservatorion, metian lernejon.

Vidindaĵoj. Preĝejoj: Katedralo rom.-katolika, situita en centro de la urbo, konstruita en gota stilo, al ambaŭ flankaj partoj estas alkonstruitaj kapeloj, posedas en maldekstra parto 64 m. altan turon, supre kun atiko en rokoka stilo. Fundamentojn sub tiun ĉi preĝejon metis en j. 1350 la reĝo Kazimiro la Granda. Interne belaj freskoj el XVIII jarcento kaj altaro, antaŭ kiu la reĝo Jan Kazimierz (Johano Kazimiro) faris en j. 1656 memorindajn ĵurojn.

Kapelo de Boimoj, aparte starante je dekstra flanko ĉe katedrala absido meritas atenton, kiel belega monumento de renesanca arto. Fondita en j. 1609 de Georgo Boim, fama lvova urbano. Interne bela altaro, skulptita el ŝtono, sur kiu oni vidas postsignojn de polihromio.

Preĝejo de Jezuitoj, fondita en 1610 j. en baroka stilo. Interne belaj freskoj, pentritaj de Johano Eckstein en j. 1750.

Katedralo armen.-katolika. Fondita komence el ligno

en j. 1390, poste finkonstruita el ŝtono en j. 1457. La gota stilo estas kunigita kun bizantia. La placo antaŭ preĝejo estas kovrita per tomboŝtonoj de lvovaj Armenoj. Malantaŭ la absido korinta kolono portas statuon de S-ta Kristoforo el j. 1736.

Preĝejo de Dia Korpo de Dominikanoj, konstruita komence el ligno en jaro 1270. Post bruliĝo rekonstruita el ŝtono kaj briko en jaro 1749 de reĝa grand-hetmano Jozefo Potocki. La ekstera konstruaĵo en stilo rokoka, apogita je jonaj kolonoj, super kiuj leviĝas **timpanono** kun subskribo: „Soli Deo Honor et Gloria“. Vidinda estas alabastra statueto de „Dipatrino kun infaneto Jezuo“, kiun forportis la episkopo Odrowaŝ el Kijów, savinte ĝin el la manoj de Tataroj en jaro 1401. Ĝi estas la plej malnova monumento de religia skulptaĵo en Lwów.

En flankaj kapelo de S-ta Dominiko oni vidas alabastran monumenton de grafino Jozefino Borkowska, verko de fama dana skulptisto Thorvaldsen.

Katedralo grek.-katolika de S-ta Georgo. Konstruita en jaro 1292 por Bazilianoj, poste rekonstruita en jaro 1748 de Atanazo Szeptycki, lvova episkopo, en stilo rokoka. Sur atiko troviĝas statuo de S-ta Georgo sur ĉevalo.

Pli belaj publikaj konstruaĵoj kaj privataj domoj. En mezo de Foirejo troviĝas urbodomo, kies konstruon oni komencis en jaro 1827 en loko de antaŭa malnova konstruaĵo el jaro 1597, kiu disfalis. Sur kvar anguloj de Foirejo staras putoj kun grandaj ŝtonaj ujoj, ornamitaj per ŝtonaj statuoj de mitologiaj diaĵoj. Ĉirkaŭantaj Foirejon domoj preskaŭ ĉiuj trietaĝaj estas malnovaj konstruaĵoj. Pli granda parto de tiuj domoj havas nur tri fenestrojn, ĉar ne estis permesite dum antaŭaj jarcentoj al urbanoj en Foirejo konstrui pli grandajn domojn.

En supra parto de Foirejo troviĝas domo (No. 6), konstruita el ŝtono en jaro 1580, en kiu ofte loĝadis reĝo Johano III.

Malnova ĉefepiskopa palaco sub no. 9 konstruita en jaro 1634. En ĝi dum malnovaj tempoj kelkfoje loĝis polaj reĝoj, tie ankaŭ mortis la reĝo Miĥaelo Wiśniewiecki. En strato de Czarniecki ni vidas palacon de Vojevodo, kaj konstruaĵojn de Vojevodia distriktoŝefo, laŭ plano de F. Księżarski, kun rimarkinda ŝtuparo, projektita de prof. Marconi. Alproksimiĝante al Batory-strato ni

vidas Palacon de Justeco, grandegan konstruaĵon de bela arĥitekturo.

Postsejma palaco, nun Nova Universitato, estis finkonstruita en jaro 1881 laŭ plano de J. Hochberger. Ĝi estas konstruaĵo duetaĝa, en riĉa renesanca stilo. Sur supraĵo de atiko metita grupo prezentas „Genion de Patrujo“. Du flankaj sidantaj figuroj imagas la riverojn Vistulon kaj Dniestron. Ĉe eniro antaŭ fronto de la konstruaĵo starigitaj estas du grupoj, skulptitaj de Teodor Rygier, prezentantaj „Klerecon“ kaj „Laboron“. En akcepta salonego, el kiŭ oni eliras al loĝio, troviĝas fama pentraĵo „Unio“ pentrita de Jan Matejko.

Ĉefstacidomo de ŝtata fervojo, monumenta konstruaĵo, estas la plej bela stacidomo en Pollando.

En strato Leona Sapiehy ni vidas belan, grandan konstruaĵon de Politeknika Alternejo, konstruita en jaro 1877 laŭ plano de prof. Zacharjasiewicz.

Muzeoj kaj bibliotekoj. Urba muzeo de artindustrio (str. Hetmańska 20) kun Urba Artgalerio, en kiu troviĝas pentraĵoj de Matejko, Grottger, Siemiradzki k. m. a.

Naturhistoria Muzeo de Dzieduszycki (str. de Rutowski 18). La muzeo posedas unu el plej eminentaj en la mondo ornitologiaj kolektoj.

Nacia Instituto de Ossoliński, kun riĉa biblioteko kaj gabeto de polaj moneroj kaj medaloj.

Urba arĥivo.

Muzeo, fondaĵo de princa familio Lubomirski kune kun gabeto de armiloj, troviĝas en orienta parto de Nacia Instituto „Ossolineum“.

Raclavica Panoramo. La konstruaĵo troviĝas sur postekspozicia placo, ĉarme situita. Ĝi estas grandioza verko de famaj polaj pentristoj, unika en la mondo. (Batalo de T. Kościuszko kontraŭ Rusoj apud Raclawice).

Monumentoj. Al plej vidindaj monumentoj apartenas: Monumento de la plej granda nacia poeto Adam Mickiewicz, sur Maria-placo; monumento de reĝo Jan Sobieski sur la Hetmana bulvardo; monumento de nacia heroo Kiliński, en samnoma parko; monumento de Aleksander grafo Fredro, patro de pola komedio; la plej malnova estas la monumento de hetmano Jabłonowski, sur Hetmana bulvardo, proksime de la nova belega konstruaĵo de



Lwów

Monumento de Jan III Sobieski

Urba Teatro. Multaj belaj monumentoj troviĝas sur la tombejo Łyczaków.

Proksimaj ekskursoj el Lwów. Lwów havas en sia proksimeco tre belajn promenejojn kaj ekskurslokojn; inter ili **Brzuchowice**, eleganta klimata somerrestadejo, kun vastaj pinarbaroj, kaj **Lubień Wielki** (Granda Lubień), kuracloko kun sulfur-banejoj.

Estas ankoraŭ proksimaj al Lwów kaj orienta landlimo de Polujo kelkaj interesaj urboj kun historiaj kasteloj, ruinoj kaj aliaj vidindaĵoj. Oni povas nomi **Łuck**, **Zbaraż**, **Beresteczko**, **Dubno**, **Krzemieniec** (Kŝemjenjec) kaj aliaj lokoj, famaj pro bataloj kontraŭ Tataroj, Turkoj kaj Kozakoj sub la gvidado de atamano Chmielnicki (Ĥmijelnicki). Multaj el ili estas cititaj en trilogio de H. Sienkiewicz. Polujo devis multfoje bataladi, protektante ne nur sin mem, sed la tutan Eŭropon kaj ĝian kulturon. Tial la kulturo de la landlimaj urboj restis ofte tree primitiva. Sendube gajnis la ĝenerala kulturo de Eŭropo: ne povis disvolviĝi loka kulturo.

Nur iom post iom disvolviĝanta pacema kaj paciga ideo esperantista povas helpi kaj ŝanĝi fine bataleman mondon en mondon vere homaranan.

Ĉapitro VII

Pollandaj mineralaj fontoj, banlokoj kaj klimataj kuraclokoj

Entute ekzistas en Pollando pli ol 130, kun tre diversaj kuracaj kvalitoj:

1) Por stomakkuracado ekzistas multaj alkaliaj mineralaj fontoj kun bikarbonatoj kaj kloridoj de natrio, magnezio, kalcio: Krynica, Szczawnica (Ŝĉavnic), Wysowa, Rymanów, Krościenko.

2) Skrofulozo kaj similaj malsanoj tre bone kuraciĝas en: Ciechocinek (ch = ĥ), Rabka, Iwonicz (cz = ĉ), Rymanów.

3) Por reŭmatismo, artrito kaj urinorganaj malsanoj ni havas: Ciechocinek, Delatyn, Truskawiec, Inowrocław, Jastrzębie (Jastjembje), Iwonicz, Busko.

Ĉi tiuj taŭgas ankaŭ por diversaj virinmalsanoj, precipe tamen Krynica, Żegiestów (Ĵegjestuv).

Por fizioterapio estas multegaj kuracejoj kaj klimataj lokoj: Druskienniki, Ojców, Zakopane, Zaleszczyki (szcz = ŝĉ), Nałęczów (Naŭenĉuv) kaj multaj aliaj.



Ciechocinek

Banejoj

Ni priskribos plej gravajn kuracejojn laŭ alfabeto.

Busko, ŝtata mineralkuracloko; fontoj salsulfuraj. Stacidomo: Kielce aŭ Szczucin (Ŝĉucin). Konata jam de 12-a jarcento. Temperaturo jara modera. Ekzistas 9 mineralaj fontoj kun sulfhidrogeno, karba acido kaj natria klorido. Ĉeestas ankoraŭ magnezia sulfato, natria sulfato kaj fero. Estas banejoj kaj marĉbanejoj.

Kuracigas: reŭmatismo, artrito, skrofulozo, lueso, haŭtaj malsanoj.

Bystra, monta klimatkuracloko, krakova vojevodio. Tre bele situata, montetoj, arbaroj. Por resaniĝuloj kaj trolaciĝintaj.

Chabówka (Ĥabuvka), vojevodio Kraków, monta klimata kuracloko, 428 m super la mar-nivelo. Montaro kaj arbaro.

Ciechocinek (ch = ĥ) Ŝtata mineralbanejo; fontoj salaj kaj jodo-bromaj. Sur la maldekstra flanko de la Vistulo, 46 m super la marnivelo, proksime al Toruń, vojevodio Warszawa (Varŝava). Tre fortaj fontoj kun salakvo. Estas salbanoj kaj salmarĉbanoj. Artrito, graseco, sukermalsano; daŭraj virinaj malsanoj; reŭmatismo, skrofulozo, komenca tuberkulozo (ĥirurga); nervaj malsanoj; stomakaj malsanoj, rahito, kronikaj haŭtaj malsanoj; kontraŭindiko: tuberkulozo, nefrito, malkompensitaj kormalsanoj; akra lueso.

Czarniecka Góra; vojevodio Kielce, stacidomo Niekłań. Monta kaj arbara klimata somera kuracloko.

Delatyn; vojevodio Stanisławów, orienta Malgrandpolujo. Monta klimata kuracloko, belege situata 458 m super la marnivelo.

Druskienniki, vojevodio Białystok; ebenaĵo kun arbaro kaj sabla tereno, sur la maldekstra flanko de la rivero Niem, proksima al Litovujo. Salfontoj kun sulfhidrogeno kaj radioemanacio. Famaj marĉbanoj, fizioterapio. Reŭmatismo, artrito, kronikaj virinaj malsanoj; nervaj malsanoj; trolaciĝo.

Inowrocław; salakvaj fontoj, vojevodio Poznań. Krom salo kuireja ĉeestas jodo kaj bromo. Artrito, reŭmatismo, rahito, skrofulozo, nervaj malsanoj. Kontraŭindikoj: tuberkulozo.

Iwonicz; sur la norda deklivo de la Karpataj montoj, vojevodio Lwów. Tre bele situita proksime al la petrolminejoj. Jam delonge konataj akvofontoj parte kun inflama gazo (metano). Salakvo jodobroma, enhavanta krom tio natrion, kalion, lition, karbonatojn kun gaza karbacio, kiu agrabligas la uzadon de la akvo. Skrofulozo, malsano de la limfaj glandoj, ŝveloj kaj inflamoj, ostaj malsanoj, rahito, artrito, lueso, arteriosklerozo, virinaj malsanoj, intestaj malsanoj.

Jastrzębie; vojevodio silezia; distrikto Rybnik; salakvofontoj jodobromaj; belege situita en monta kaj arbara ĉirkaŭaĵo. Skrofulozo, reŭmatismo, artrito, virinaj malsanoj, nervaj malsanoj (iskiaso), ostaj kaj haŭtaj malsanoj.

Jaworze (Javoĵe); vojevodio silezia, 400 m super la marnivelo, monta arbara klimatkuraĵloko. Anemio, neŭrasteno, neŭralgio, histerio.

Kartuzy; pomerania vojevodio, belege situita super lago, monta, arbara ĉirkaŭaĵo kun multaj lagoj. Jam delonge nomita pomerania Svisujo pro pentrinda, bela situacio. Klimata kuraĵloko.


Kazimierz apud la Vistulo; vojevodio Lublin; somera klimatloko.

Konstancin; apud Warszawa; modela somera klimatloko.

Kosów; vojevodio Stanisławów; proksime stacidomo Kołomyja. Monta ĉirkaŭaĵo, — Karpatoj — belega situacio 415 super la marnivelo. Somera kuraĵloko, propraĵo de la d-ro Tarnawski. Specialaj naturkuracaj metodoj.

Krościenko apud Dunajec (rivero); fontoj mineralaj kun tre bona akvo acidkarbona, uzata kiel tabla akvo, enhavanta salon kuirejan. Belega ĉirkaŭaĵo, 420 m super la marnivelo.

Krynica; ŝtata fontkuracejo, klimata kuraĵloko, fontoj salakvaj, enhavantaj feron. Banoj salaj kaj marĉbanoj. Unu



Krynica

Novaj banejoj

el la plej disvolvitaj polaj kuraĵlokoj. Vojevodio Kraków, 590 m super la marnivelo. Ankaŭ vintra sportejo. Akvo gaza acidkarbona, tre gustuma. Anemio, virinaj malsanoj, kormalsanoj, reumatismo. Kontraŭindiko: tre disvolvigataj kormalsanoj, tuberkulozo, arteriosklerozo.


Krzeszowice apud Kraków; fontoj sulfuraj, banoj. Reŭmatismo, artrito.

Lubień Wielki, vojevodio Lwów, sulfaj fontoj. Belega situacio, parko, 298 m super la marnivelo. Konstatita tre granda abundo de sulfuro, pli on en aliaj eŭropaj fontoj. Reŭmatismo, artrito, kronikaj inflamoj de ostoj kaj artikoj, iskiaso, haŭtaj malsanoj, lueso.

Marbordaj klimataj kuraĵlokoj.

Malvasta pola marbordo estas tre taŭga por klimataj someraj kuraĵlokoj kun mara klimato. Dum somero multe vizitata. Fervojo de Warszawa al Danzig kunligas marbordon kun tuta Pollando.

Maraj kaj sunaj banoj sur la plaĵoj estas tre aplikataj pere de la nuntempa kuracarto por multaj malsanoj kaj por personoj laciĝintaj de la urba vivado. Kelkaj semajnoj



Krynica

Ĝenerala aspekto

somere ĉe la maro, du, tri semajnoj ĉe montoj en Zakopane bonege influas kaj fortigas nervojn.

Duoninsulo **Hel** prezentas tre taŭgan someran maran stacion; apude estas **Gdynia** kun belega plaĝo kaj modernaj hoteloj, **Oksywia**, **Hallerowo**, **Rożewie**, **Kuźnica**.

Morszyn; fontoj salakvaj kun magnezia sulfato; vojevodio Stanisławów, ĉe Karpataj montoj.

Graseco, artrito, arteriosklerozo, hepataj malsanoj (ŝtonetoj hepataj), skrofulozo.

Nałęczów; vojevodio Lublin; klimata kuracloko.

Ojców apud Kraków; belege situita klimata kuracloko en valo, ĉirkaŭita per altaj montoj kun famaj historiaj grotoj de la tempo de pola reĝo Łokietek. Pentrinda ĉirkaŭaĵo, unu el plej belaj en Polujo.

Otwock; apud Warszawa; klimata kuracloko, lastatempe tre disvolviĝita; tereno sabla, tralasebla, seka. Tre taŭga kuracejo por tuberkulozo kaj nervaj malsanoj.

Rabka; vojevodio Kraków; fontoj salakvaj jodobromaj kaj klimata kuracloko; bele situita, speciale por skrofulozo, reŭmatismo, artrito. Jam delonge uzata por infanaj malsanoj.

Rymanów; vojevodio Lwów; salakvaj fontoj jodobro-



Lubień Wielki

Pejzaĝa fragmento

maj. Bona klimata kuracloko, vasta arbara monteta ĉirkaŭaĵo.

Solec; vojevodio Kielce, stacidomo Szczuczyn (Ŝĉuĉin). Fontoj sulfurosaj, bela ĉirkaŭaĵo.

Swoszowice; fontoj sulfuraj; apud Kraków.

Szczawnica (vidu p. 92); vojevodio Kraków, plej bela Karpata ĉirkaŭaĵo; jam delonge konata kiel plej pentrinda en Polujo. Salakvaj fontoj kun karbona acida gazo.

Tuberkulozo, kataroj de la pulmono kaj laringo; hepataj kaj renaj malsanoj.

Truskawiec; vojevodio Lwów; fontoj sulfosalaj forte radioaktivaj. Kuracloko monta, somera, belega situacio en montaro, proksime al la fama Borysław, petrolminejoj; 400 m super marnivelo. Arbaro, montetaro. En valo ĉirkaŭita de montoj; ŝirmita kontraŭ ventoj.

Artrito, reŭmatismo, kronikaj malsanoj de spiraj organoj.

Ustroń; vojevodio silezia; stacidomo Golezów. Somera kuracloko, mineralaj banoj, marĉaj banoj.

Wisła tute proksime al Ustroń. Belege situita 500 m super la marnivelo inter arbara montaro. Komenciĝas pola rivero Vistulo de sub la montaro. Tre trankvila, somera, klimata kuracloko por nervomalsanoj, trolaciĝintaj personoj.

Wysowa; vojevodio Kraków, stacidomo Grybów. Ĉirkaŭaĵo monta, arbara; mineralaj fontoj kun karbacio kaj



Szczawnica Noktejo

fero, krom tio jodo kaj bromo en malgranda kvanto. Klimata kuracloko.

Zakopane; pentrinda kuracloko monta kaj arbara, speciale por vintraj sportoj (vidu p. 90). Sanigejoj por komenca tuberkulozo. Sanigejo de la akademio junularo, sanigejo de la instruistoj k. a.

Zaleszczyki; vojevodio Tarnopol, kuraca loko kun preskaŭ suda klimato ĉe la rivero Dniestr.

Por resaniguloj, ripozuloj kaj komenca tuberkulozo.

Zawoja; monta kuracloko ĉe la Babia Góra 500 m super marnivelo. Por resaniguloj, trolaciĝuloj, nervaj malsanoj.

Żegiestów; sur la dekstra bordo de la rivero Poprad; belega situacio inter montetoj kaj arbaroj; salakvaj fontoj kun abunda karba acido. Gazaj banoj.

Anemio, skrofulozo, virinaj malsanoj, por resaniguloj.

Ni citis ĉi-tie nur malmultajn kuraclokojn; ekzistas ankoraŭ multaj, kiuj iom post iom disvolviĝas, precipe post la aranĝo de balneologia katedro en Kraków, kie instruas prof. Korczyński, al kiu mi estas tre dankema pro kelkaj valoraj sciigoj kaj fotografaj kliŝaĵoj.

Esperantaj grupoj kaj U. E. A.-delegitoj:

Centra Organizo: Pollanda Esperanto-Delegitaro, Kraków, Smoleńska 9

Organo: „Pola Esperantisto“, monata, la sama adreso

Białystok: Zamenhofa Esperanta Societo, str. Zamenhofa 14 A

Bielsko: Esperanta Grupo, Dro J. Haas, Bahnstrasse

Boryslaw: Esperanta Grupo de TUR

Bydgoszcz: Societo Esperanto, A. Hinc, Kościuszki 5

Dąbrowa Górnicza: Esperanto-Societo „Tagiŝo“, J. Izraelowicz, Król. Jadwigi 32

Janów: Rondo de fidelaj Esp-o Amikoj.

Kalisz: Pola Esperanto Asocio, A. Lasiński, Al. Józefiny 33

Katowice: Societo de Esperanto-Amikoj, ul. Wawelska 3/II

Kołomyja: U. E. G. gimnazio Grupo, Ukraina gimnazio

Kraków: Societo Esperanto, Smoleńska 9

— Pola Esp. Klubo,

Królewska Huta: Rondo Esperantista, E. Kołodziej, Ligota Gór. 60/III

Łódź: Societo „Laboro“ str. Zamenhofa 17

— Pola Esp. Societo, W. Pfeiffer, Piotrkowska 47

Lublin: Filio de Pola Esperanto-Asocio, Namiestnikowska 37/I

— „Laboro“, S-o Szoferów, róg Zamojskiej i Bernardyńskiej

Lwów: Esperanta Societo, str. Boularda 5

— Laborista Societo, str. Ormiańska

Przemyśl: Rondo Esperantista, L. Blech, Jagiellońska 6

Radom: Pola Esp. Societo, ul. 1 Maja 32

Roździeń: Esperanto-Grupo „Espero“, T. Niedźwiedź, Szosowa 18

Sieradz: Esperantista Grupo, J. Sztulman, ul. Tad. Kościuszki

Sosnowiec: U. E. A.-Grupo, str. Kościelna, „La Ornamo“

Warszawa: Pola Esperantista Societo, Żórawia 6

— Pola Studenta Esp-ista Societo, Leszno 19/5

— Esperant. Rondo „Konkordo“, Marszałkowska 141

Warszawa: Laboro, s-o Koss, Leszno 28
— Akademia Esp-ista Rondo ĉe Juda Hejmo, Nowy
Świat 21
Zawiercie: Amikoj de l' Esperanto, L. Klepaczewski, Szkoła 2.

Delegitoj de U. E. A.

Andrychów: Samuel Monderer, dentkuracisto
Biała Podlaska: Chaim Rozmaryn, denttĉnikisto, Skrz.
poczt. 39.
Białystok: Jakób Šapiro, ĵurnalisto, Lipowa 33
Bielsko: Dr. Julius Haas, dentkuracisto, Bahnstrasse
Bitków: Roman Wulczek, oficisto, Kasa Chorych
Bochnia: Jan Zarychta, salministo
Borysław: Dro Janusz Rauch, industriisto, Naftahaus Dro
Rauch & Co.
Bydgoszcz: Francisko Prengel, priv. instruisto, Kościelna 1/II
Chorzów: Tomasz Bywaletz, inspektoro, ul. Szkolna 20
Chrzanów: Jakób Weinberger, lingvo-instruisto, ul. Sokola
Cieszyn: Ludwik Krysta, ŝtata oficisto, Stary Targ 10
Czersk: Kazimierz Majorkiewicz, instruisto
Czortków: Hillel Oberländer v. Sternberg, bibliotekisto, ul.
Główna 95
Dąbrowa Górnicza: Józef Izraelowicz, ul. Król. Jadwigi
N-o 32.
Dubno: Majer Lichtensztejn, lernanto, dom Sznajdera
Grudziądz: Ferdynand Neumeuer, instruisto, ul. Mickiewicza 5
Hajduki Wielkie: Maksymiljan Janik, tajloro
Jaremce: Helena Sobotnicka, bibliotekistino, biblioteko
„Ruch“
Kalisz: Alexy-Leszek Lasiński, ĵurnalisto, Aleja Józefiny 33/33
Kamienica Polska: Antoni Peltz, instruisto, No. 87
Kartuzy: Franciszek Sielke, instruisto, ul. Gdańska 23
Katowice: Jan Tichawski, fervoja oficisto, ul. Plebiscy-
towa 25/III
Kołomyja: Orest Kuźma, gimnazia profesoro, Nowa ulica 6
Koluszki: Stanisław Sudelik, fervoja oficisto, Stacja
Kraków: Ignacy Wiesenberger, fabrikdirektoro, ul. Powiśle 12
Królewska Huta: Emil Kołodziej, elektromuntisto, ul. Ligota
Górnicza 60/III
Krzemieniec: Bazyli Doroszenko, instruisto, Pocztowa 28,
Gimnazjum ukraińskie

Leśmierz p. Łęczyca: Stefan Skupieński, lernejestro
Leśna Podlaska: Teofil Adam Koziara, direktoro de seminario
Łódź: Remigjusz Męczyński, prokuristo, Bank Zachodni, ul.
Piotrkowska 52
Lubania n. Pilicą: Józef Bulski, instruisto
Lublin: Czesław Pruski, ŝtatoficisto, ul. Konopnicka 8 m. 7
Lwów: Władysław Niżnik, poŝtoficisto, Dyrekcja Poczt.
Ostrołęka: Maurycy Jagoda, librotenisto, Skrzynka poczt. 3
Poznań: Leonard Borkowski, instruisto, ul. Różana 4 a
Przemyśl: Leon Blech, kandidato filoz., ul. Jagiellońska 6
Radom: Wolf Wajsfus, Piłsudskiego 16
Radziejów: Dro Kazimierz Lewiński, kuracisto
Rosochacz p. Jagielnica: Halina Domańska, bienposedantino
Siedlce: Bolesław Żmuda, konstruisto, ul. Błonie 4
Siemianowice: Stanisław Reichmann, komercoficisto, ul.
Wandy 24 H
Sieradz: Józef Sztulman, lernanto, ul. Tad. Kościuszki
Sokal: Orest Karawan, studento, Zabuzę, Bielska 154
Sosnowiec: Bol. Czechowski, instruisto, „La Ornamo“, ul.
Kościelna
Stoczek Łukowski: Józef Poniatowski, instruisto
Stryj: Arie Hoszowski, petrola industriisto, ul. Trybunalska 24
Strzemieszyce: Roman Dobrzański, industriisto, Zakłady wa-
pienne
Sucha k. Żywca: Stanisław Pęksa, ŝtata notario
Toruń: Dro Ignacy Dziedzic, advokato, ul. Szeroka 43
Tuczyn k. Równa: Henryk Flam, instruisto
Tustanowice: Franciszek Trunkwalter, ministo, Wolanka
Warszawa: Stanisław Essigman, dentkuracisto, Marszałkow-
ska 130
Wieluń: Wacław Janczurowicz, ĉefo de malliberejo, Często-
chowska 11
Wilno: K. Geršater, banka fakestro, ul. Piłsudskiego 23 m. 12
Zakopane: Tadeusz Kaciczak, komercisto, Kościeliska
Zawiercie: Ludwik Klepaczewski, instruisto, Szkoła 2
Żółkiew: Emanuel Hay, asekuristo
Żychlin: Romuald Sołoniewicz, doktoro de medicino
Żyznów: Bronisław Pruc, instruisto, ad Strzyżów n/W.

K o r e k t o: Paĝo 10, verso 6 *anstataŭ*: apud la katedralo,
legu; nuna katedralo

TABELO DE ENHAVO

	paĝo
Antaŭparolo	3
Nuntempa Polujo	5
Ĉapitro I. <i>Warszawa</i> (f-ino H. Weinstein)	10
Ĉapitro II. <i>Ekskurso de Warszawa al Poznań, Pomeranio kaj Danzig.</i>	
1. De Warszawa al Poznań (M. Trochimowski)	29
2. Poznań (M. Trochimowski)	30
3. De Poznań al Pomeranio (M. Trochimowski)	34
4. Pomeranio (Dro I. Dziedzic)	34
5. Danzig — Gdańsk (Pastro Dro T. Kru- szyński, trad. B. Kuhl)	40
Ĉapitro III. <i>Ekskurso de Warszawa al Wilno</i>	
1. De Warszawa al Wilno (M. Trochimowski)	47
2. Wilno (f-ino H. Weinstein)	48
Ĉapitro IV. <i>Ekskurso al Silezio</i>	
1. De Warszawa tra Częstochowa al Silezio (M. Trochimowski)	54
2. De Warszawa tra Radom kaj Kielce (M. Trochimowski)	57
3. De Poznań tra Łódź al Silezio (M. Tro- chimowski)	58
4. Silezio (M. Trochimowski)	60

Ĉapitro V.	<i>Ekskurso al Kraków kaj Tatroj</i>	
1.	De Warszawa al Kraków (J. Alfus) . . .	63
2.	Kraków (Pastro Dro T Kruszyński, trad. E. Wiesenfeld)	64
3.	Zakopane kaj Tatroj (Dr-ino K. Rouppertowa)	89
Ĉapitro VI.	<i>Ekskurso al Lwów</i>	
1.	De Warszawa al Lwów (M. Trochimowski)	92
2.	De Kraków al Lwów (M. Trochimowski)	94
3.	De Zakopane al Lwów (M. Trochimowski)	95
4.	Lwów (H. Schnützer)	96
Ĉapitro VII.	<i>Banlokoj kaj kuraĉlokoj</i> (Prof. Dro O. Bujwid)	102
	Esperantaj grupoj kaj U. E. A.-delegitoj .	109

O R G A N I Z O

DE ĜENERALA TUTLANDA EKSPOZICIO

EN POZNAŅ EN LA JARO 1929

Pollando, malgraŭ antaŭdiroj de ĝiaj malamikoj, malgraŭ nefavora propagando, kiun oni kontraŭ ĝi disvastigadis, montriĝis organismo forta kaj vivoplena. Ruinigita de la milito en dimensio, kiel neniu alia ŝtato, ĝi baldaŭ leviĝis kaj per laboro de sia loĝantaro ekstaris en unua vico de eŭropaj popoloj.

Kiu vojaĝas tra aliaj landoj, kiu diligente legas eksterlandan gazetaron, tiu baldaŭ konvinkiĝos, ke ne ekzistis alia lando, pri kiu aperus tiom da falsaj, maljustaj kaj eĉ malicaj opinioj, kiom pri Polujo. Kvankam en la lastaj jaroj ĉi-opinio komencis ĝisfunde ŝanĝiĝi, tamen oni devas ĝin pravigi.

Eksterlando Pollandon ne konas, aŭ konas ĝin nesufiĉe.

Ni, Poloj, dolore ĉi tion sentis kaj ankoraŭ sentas.

Tial aŭdiĝas en plej vastaj rondoj de nia popolo voĉoj, ke estas necese forigi ĉi tiun mankon.

Nenio pli bone por tiu ĉi celo taŭgas, ol Tutlanda Ekspozicio, kiu povas montri ĉion, kion Pollando kreis sur anima kaj mastruma kampoj.

Ĉi tiun ideon devas realigi projektata en jaro 1929

ĜENERALA TUTLANDA EKSPOZICIO.

Organizo de granda ekspozicio ne estas facila. Scias tion plej bone la nacioj, kiuj havas ĉi-rilate sperton per aran-

ĝado de ekspozicioj, kiel Francujo, Germanujo, Britlando kaj Usono.

Polujo, ĝis nun nesperta, alpaŝas al la laboro singardeme, pro tio ekspozicia komitato studas funde ĉiujn demandojn, ligitajn kun ĝia aranĝo.

Se eksterlandaj ekspozicioj, instalitaj ofte per grandega kosto, intencis ekbrili per potenco de sia lando, Pollando, ne posedante tiajn bonajn cirkonstancojn, kiel riĉaj, de la naturo dotitaj kaj malnovaj eŭropaj ŝtatoj, volas nur montri, ke ĝi laboras, disvolviĝas kaj estas en Eŭropo unu el faktoroj de ordo kaj paco.

Ni ne volas imponi al la mondo per ŝajno de riĉaĵoj kaj lukso — ni volas nur elvoki admiron por nia ĉiutaga peniga laboro, per kiu ni en plej malfavoraj kondiĉoj starigis renaskitan, post centjara mallibero, patrujon.

Ni komencis la grandan verkon nur kun unu ĉefa ideo: servi al nia lando.

La ĵetita ideo elvokis eĥon en tuta Polujo. En la vicoj troviĝas tuta popolo kun la registaro.

Por ni Ĝenerala Tutlanda Ekspozicio devas esti instruo kaj animleviĝo, por la eksterlando — dokumento, ke Pollando en la meza Eŭropo iĝas morala kaj mastruma potenco.

Dr. Stanisław Wachowiak.

De 4 ĝis 15 septembro 1927

VII ORIENTA FOIRO EN LWÓW


Ĉiujara, universala foiro de specimenoj kaj modeloj el ĉiuj branĉoj de produktado.

La tuta Pollando kaj 23 fremdaj landoj partoprenas. Grandega kunveno de komercistoj, industriistoj kaj agrikulturistoj. Vigla partopreno de l' eksterlando inter eksponantoj, aĉetantoj kaj vizitantoj.

Speciala permeso de la Ministerio de Industrio kaj Komercio por enveturigi la eksterlandajn komercaĵojn.

Semoj, foiro de brutaro, porkoj kaj ŝafoj, foiro de kortaj birdoj, kolomboj kaj kunikloj.

TUTLANDA EKSPOZICIO DE LABORAJ ĈEVALOJ.



Sub protekto de
MARŜALO KAJ ĈEFMINISTRO JÓZEF PIŁSUDSKI
Komunikacia Ekspozicio
ampleksanta

fervojaron, komunikaciojn kontinentan, maran, riveran, aeroplanan, telegrafan, radian, poŝtan kaj telefonan. 33 %-a rabato por fervojoj, libera revena transporto de komercaĵoj.

Informoj kaj lokado en ekspozicio
en CENTRA OFICEJO DE L' ORIENTA FOIRO
Telefono interurba Nro 5-37.

VENANTOJ AL WARSZAWA

RENKONTIGAS NUR

EN KAFEJO-RESTORACIO

„GASTRONOMIA“

STR. NOWY-ŚWIAT 16

KIE ĈIAM KONCERTAS KONATA VIENA SEKSTETO
LA EJO MALFERMITA DE 9 H. MATENE ĜIS 4 H. NOKTE

KRAKÓW

„PAVILLON“

PLEJ KOMFORTA RESTORACIO KAJ SOMERA KAFEJO

GVIDANTO: JAN BISANZ

UNUARANGA KUIREJO. — SALONA MUZIKO
*Strato Szczepańska (Ściepanjska), angulo Planty, vis-à-vis-
Palaco de Belaj Artoj.*

UNUARANGA RESTORACIO GRAND-HOTEL

J. BISANZ, SŁAWKOWSKA 5

TELEF. 48 KAJ 4445

SOMERA KAFEJO KAJ RESTORACIO

de J. BISANZ

ĉe planty — angulo de str. Wiślna kaj Zwierzyńska
Tramvoja haltejo Nr. 5 kaj 6

BONGUSTAJ MANĜAĴOJ EN LIBERA AERO

A. HAWELKA

Komercejo de koloniaj varoj, vinoj, alkoholaĵoj kaj bongustaĵoj
RESTORACIO KAJ MATENMANĜAJ ĈAMBROJ

RENKONTEJO DE VOJAĜANTOJ

PROPRAJ MAŜINAJ MALVARMIGEJOJ

FONDITA EN LA JARO 1876

KRAKÓW, RYNEK GŁ. 34, PALACO SPISKI
(PROpra DOMO)

HOTELO FRANCA

HOTEL FRANCUSKI

STRATO PIJARSKA

UNUARANGA HOTELO

PREZOJ: UNULITA ĈAMBRO Zł. 7—12, — DULITA Zł. 14—23

A. PIASECKI

AKCIA SOCIETO

RYNEK 47 KAJ 27

BONEGAJ SUKERAĴOJ KAJ ĈOKOLADOJ

HOTELO POLLER

SZPITALNA 30 TELEF. 262

vis-à-vis Urba Teatro

RESTORACIO EN HOTELO

POLLER

de W. MROZOWSKI

Tagmanĝo kvarplada Zł. 4.—
kaj à-la-carte.

Ĉambro: unulita de Zł. 3.40

dulita de Zł. 6.—

SALONOJ POR KUNVENOJ

ESPERANTA KRAKOVA JUVELISTA FIRMAO

A. NEUBERG

STR. FLORJAŃSKA 2

rekomendas malkostajn diversspecajn artistajn juvelojn,
orajn kaj arĝentajn.

HORLOĜOJ DE UNUARANGAJ EŬROPAJ FABRIKOJ
MALALTAJ PREZOJ

**UNUARANGA
HOTELO SASKI**

SŁAWKOWSKA 3, TELEF. 37

PERSONA LIFTO, ĈAMBROJ TUTE RENOVIGITAJ
PREZOJ DE 4—11 ZŁ. KUN 20 % KOMUNUMA IMPOSTO

**KRYNICA
ŜTATA KURACLOKO**

situata en norda parto de Karpatoj, 590 m s. m. n.

Tutjara sezono

I. sezono somera de 1. majo ĝis 30. de oktobro

II. sezono vintra de 1. de novembro ĝis 30. de aprilo

Salakvoj alkaliaj fero-teraj = Akvo de Zuber plej forta alkalia
salakvo de Eŭropo. = Banoj mineralaj karbaci aj kaj marĉaj.
Instituto, provizita je ĉiuj modernaj instalaĵoj. = Banoj sun-
aeraj. = Unuaranga komforto de loĝejoj en sanatorio kaj
novaj banejoj. = Dum vintra sezono oni aplikas en kurac-
domo banadojn mineralajn, marĉajn, hidropation, elektran
terapijon, kvarcan lampon. = Mineralaj banadoj en novaj
banejoj. = En la sama domo loĝejoj, restoracio kaj legejo.
Centra varmigado de tuta sanatorio kaj banejo, elektra
lumo. = Vintraj sportoj kaj aliaj distraĵoj.

ZAKOPANE

SOMERA REZIDEJO DE POLLANDO
KAJ CENTRO DE VINTRAJ SPORTOJ

SENPERA FERVOJA KOMUNIKO KUN
ĈIUJ POLAJ URBOJ

UNUARANGAJ HOTELOJ KAJ PEN-
SIONOJ. KAFEJOJ KAJ RESTORACIOJ

SANIGEJOJ KUN PLEJ MODERNAJ
ARANĜOJ. ELEKTRA LUMO

PLEJ BONA ELIRPUNKTO POR
EKSKURSOJ AL TATROJ

BELEGAJ EKSKURSOJ - SOMERAJ SPORTOJ -
PARKO - KONCERTOJ - DANCINGOJ - TEATRAJ
PREZENTADOJ - GLITVETURILAJ VOJOJ - SKI-
AJ VOJOJ KUN 2 PLEJ GRANDAJ EN EŬROPO
SALTEJOJ

INFORMAS:

ZARZĄD UZDROWISKA, ZAKOPANE

*JODO-BROMAJ SALAKVOJ!
KURACLOKO!*

RABKA

*SENPERA FERVOJA
KOMUNIKO KUN*

*WARSZAWA
WILNO
LWÓW
POZNAŃ
KATOWICE*

*JARA FREKVENTO:
11.000 PERSONOJ*

„Stilo kaj esprimmaniero estas bonegaj kaj plastikaj kaj denove pravigas la favoran opinion... Ĉiu esperantisto legos ĉi tiun apartan literaturaĵon kun ĝuo kaj utilo.. (*Heroldo de Esperanto*, No 21 el 27. V. 1927)

Jen mallonga eltiraĵo el recenzo de unu el plej gravaj gazetoj pri

„DIBUK“

fama teatraĵo de Ŝ. An-ski, trad. de I. Lejzerowicz, L. K., kiu aperis antaŭ nelonge en eldono de J. Alfus, Kraków XXII, Al. Dembowskiiego 10 (Pollando)

Ĝia malalta prezo de sv. fr. 0.70 devigas al aĉeto!

Ricevebla en Kongresa Vendejo en Danzig

UNUARANGAJ

VARSOVIA HOTELO

LWÓW

PLAÇO BERNARDYŃSKI

Centra varmigado

Varma akvo

Telefonoj en la ĉambroj

HOTELO SANS-SOUCI

LWÓW

STR. SZAJNOCHY

Komforto


Telefonoj en la ĉambroj

UNUARANGA
HOTELO KAJ RESTORACIO
IMPERIAL

Lwów, str. 3 Maja 3

KOMFORTO — PREZOJ MALALTAJ


UNUARANGA
KAFEJO KAJ DANCING FAMILIA
»DE LA PAIX«, LWÓW
EN MEZO DE LA URBO, PLACO MARJACKI 7



CENTRA KUNVENEJO DE EMINENTA PUBLIKO
KONCERTO DE SIMFONIA ORKESTRO
POR DANCING ESTAS AMERIKA JAZZ

KAFEJO KAJ RESTORACIO
„LOUVRE“
LWÓW, STR. 3 MAJA 12

Loĝejo vizitinda
Plej granda kolekto de ĵurnaloj, ankaŭ esperantaj



VESPEREKABAREDO — DANCING
FAMILIA RESTORACIO

UNUARANGA SUKERAĴEJO
KAZIMIERZ SOTSCHER KAJ E. DUDEK

LWÓW, PLACO MARJACKI 5
KONTRAŬ MONUMENTO DE MICKIEWICZ

REKOMENDAS SIN AL VENANTOJ
KIEL KUNVENEJO EN CENTRO DE
LA URBO. — TRINKAĴOJ VARMAJ,
MALVARMAJ — TORTOJ —
SUKERAĴOJ — VARSOVIA PASTO

RESTORACIOJ, KAFEJOJ EN LWÓW

FRANCA RESTORACIO (kaj ĝardeno), (Restauracja francuska)
Lwów, placo Marjacki 5
rekomendas maten-, tag- kaj vespermanĝojn dum koncerto,
prezoj malaltaj, la loĝejo estas malfermita ĝis 1-a horo nokte.
La estraro.

RESTORACIO KAJ VEGETARANA MANĜEJO
(Restauracja i kuchnia jarska)
„HYGJENA“
Lwów, str. 3 Maja 10

KAFEJO IMPERIAL, Dancing
(Kawiarnia Imperial)
Lwów, str. Legionów 5 I etaĝo
Lumaj efektoj. — Prezoj malaltaj.

KAFEJO ROMA (Kawiarnia rzymska)
Lwów, str. Akademicka 25

RESTORACIO DE ŻÓŁCIŃSKI (Restauracja Żółcińskiego)
Lwów, str. Batorego 32

DIVERSAJ ADRESOJ EN LWÓW

Magazenó de kilimoj kaj teksaĵoj
IZABELA SIEMIANOWSKA Lwów, placo Bernardyński 12

Sukeraĵoj kaj ĉokoladoj
J. B. RAUCH Lwów, str. Legionów 33

Artistajn memoraĵojn el Lwów sur ledó kaj vitro, albumojn
kaj poŝtkartojn ilustritajn rekomendas
LEON PROPST, Lwów, Placo Marjacki 3

DRVKARNIA
NARODOWA
W KRAKOWIE
VLWOLSKA¹⁹
LTEL404



PRESAS ELDONAĴOJN EN ĈIUJ
LINGVOJ JE MODERAJ PREZOJ.

SPECIALAĴO: ROTOGRAVURO
(TIEFDRUCK)

ELDONANTO DE:
»HISTORIO DE PENTRARTO EN POLUJO«,
»SZTUKI PIĘKNE« (BELAJ ARTOJ)
MONATA REVUO

ETNOGRAFIAJ KAJ HISTORIAJ BILDOJ,
GVIDLIBROJ TRA POLAJ MUZEOJ
KAJ
ALIAJ UNUARANGAJ,
VALORAJ ELDONAĴOJ.

ESPERANTAJ PRESTIPOJ PROVIZE

NOTICÓJ



6969

23/9.68

Książnica Podlaska

im. Ł. Górnickiego w Białymstoku



KP-F14-0002196

